


**tiel  
diru!**



COMPILATION :  
***LENTAIGNE***

**5000 expressions**

Cercle espérantiste de l'Agenais  
"LAÛTE!" \* F 47340 Laroque Timbaut  
1984

## AVERTISSEMENT

**TIEL DIRU** ne vise pas à donner une source inépuisable de solutions à tous les problèmes qui peuvent se poser. Le but poursuivi est essentiellement **pédagogique**.

**TIEL DIRU** s'adresse plus spécialement à ceux qui, ayant dépassé le stade de l'étude, s'apprêtent à mettre le pied à l'étrier et qui ne doivent pas oublier que "Apprendre une autre langue, ce n'est pas mettre de nouvelles étiquettes sur des objets connus, mais s'habituer à analyser autrement ce qui fait l'objet de communication" (MARTINET.

Eléments de Linguistique Générale).

Dans cette intention, nous avons rassemblé, autour d'environ 1000 mots, quelque 5000 expressions, tirées du PROVERBARO (Zamenhof), du PLENA ILUSTRITA VORTARO (Waringhien) et de DOMFABRIKO (Kalocsay-Csiszar).

C'est toujours pour raisons **pédagogiques** que la partie française est, soit seulement amorcée, soit présentée sous sa forme courante, qui ne coïncide pas exactement avec la formulation Esperanto. Ceci, afin que l'usager soit davantage frappé par l'Esperanto.

Les expressions figurées, consacrées, sont nombreuses en Esperanto. On peut regretter qu'elles ne soient pas plus utilisées.

Et pourtant, qui s'attendrait à trouver dans un grand nombre de langues le

"PRI LA LUPO RAKONTO, KAJ LA LUPO RENKONTE" qui correspond

- pour le français à : "Quand on parle du loup..."

- pour le suédois à : "När man trollden..." (quand on parle du troll, il arrive)

- pour le finlandais : "Siinä paha..." (quand on parle du vieux = le diable)

- pour le hongrois : "Ha farkasok kozeveredté..." (quand on parle du loup...)

et même pour le chinois : "Sho Zhao-Zao Zhao-Zao dao" (quand on parle de TS'AO-TS'AO TS'AO-TS'AO arrive) (général chinois du 3ème siècle).

ainsi que pour le japonais : "U wasa o sureba kage"  
(quand on jase de quelqu'un apparaît son ombre).

Une expression comme "Esti inter martelo kaj amboso" se comprend d'elle-même. Mais il en est qui nécessitent l'usage du Plena Ilustrita Vortaro, que ne possède pas obligatoirement votre interlocuteur ou correspondant. (Ex: Forfluu infano kune kun la bano = senkuraĝige mi ĉion rezignas. PIV). Employez-les avec circonspection!  
**REMARQUES**

1) Le PLENA VORTARO (PV) et le PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV) (Waringhien) restent les ouvrages de base auxquels vous vous réfèrerez constamment.

2) Dans DOMFABRIKO (Kalocsay-Csiszar) nous avons trouvé des formes plus simples ou plus modernes. Nous les avons préférées à des formes plus classiques ("Paroli estas arĝento, silenti estas oro" au lieu de "Parolo estas arĝento, oron similas silento". (PROVERBARO).

3) Les quelques rares néologismes sont signalés par des guillemets ("kompano", "lici").

4) Nous avons introduit parfois des phrases plus complexes, sans la traduction, pour que ceux qui visent plus haut puissent trouver matière à effort personnel.

5) **TIEL DIRU!** est un outil de travail. N'hésitez pas à souligner les expressions qui vous intéressent et à l'enrichir éventuellement en puisant uniquement dans le PV ou le PIV, ce qui sera garantie de fiabilité.

6) A "**TIEL DIRU!**" correspond "**KIEL DIRI?**", lequel contient 5000 expressions groupées autour de 67 thèmes. Pour 1/5 environ, les deux ouvrages contiennent les mêmes expressions. Mais aux 44 épithètes qui accompagnent le mot "caractère" dans "**KIEL DIRI**", on n'en retrouve que 12 dans "**TIEL DIRU**". Pour cette raison la mention KD 26/1... signifie que vous avez grand intérêt à consulter en plus **KIEL DIRI** au paragraphe 1... du chapitre 26.

A noter que **KIEL DIRI** + **TIEL DIRU** contiennent ensemble de 8000 à 9000 expressions différentes.

Faites-en un usage constant. Vous progresserez à coup sûr.

7) Dans le cadre de la ligne tracée, nous sollicitons toute remarque constructive. Merci!

8) Abréviations : qq. = quelqu'un (iu)

qqc. = quelque chose (io)

**TIEL DIRU** tute ne celas solvi ĉiujn problemojn. Ĝia celo estas esence **pedagogia**. Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhofa stilo.

Ĝi sin turnas ĉefe al homoj, kiuj post studado de la duagrada kurso, pretas ekuzi efektive Esperanton en la praktiko. Tiuj homoj devas nepre memori, ke: "Lerni alian lingvon, tio ne estas meti novajn etiketojn sur jam konatajn aferojn, sed ja kutimiĝi je nova analizo de tio, kion oni volas komuniki." (Martinet)

La materialon ni ĉerpis el la **PLENA ILUSTRITA VORTARO** kaj el **DOMFABRIKO** (Csiszar-Kalocsay) kun la permeso respektive de G. **WARINGHIEN** kaj de **CSISZAR ADA**, kiujn ni varme dankas.

**TIEL DIRU** sin turnas al franclingvanoj. Sed povas ĉerpi el ĝi ankaŭ alilingvanoj.

**TIEL DIRU** estas kvazaŭ suplemento al **KIEL DIRI?** Ambaŭ enhavas ĉirkaŭ 5000 esprimojn. Se oni konsideras, ke 1000/2000 troviĝas en la du libroj, kiu posedas kaj **TIEL DIRU** kaj **KIEL DIRI?** disponos pri ĉ. 8000/9000 malsimilaj esprimoj.

Tamen la uzo de la **PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV)** restas absolute nepra!

## A

1. **ABANDONNER (S')** \* Cedi, fordoni sin al ĉagreno.

**ABEILLE (ABELO)** \* Diligenta kiel abelo.

**ABÎME (ABISMO)** \* Faŭkanta, senfunde profunda abismo. (béant). La aglo kvazaŭ falis en la abismon. Esti sur la rando de l'abismo (être au bord de l'abîme). Kuŝas abismo inter ambaŭ opinioj (entre les deux opinions).

**ABONDANCE (ABUNDO)** \* Tro da enspezo ne estas tro da pezo (abondance de biens ne nuit pas).

**ABONNER (S') À (ABONI)** \* Aboni la gazeton. KD 22/18

**ABOYER (BOJI)** \* Boji kontraŭ iu. Li ĉiam bojas kontraŭ ĉio (maugrée) \* Hundo bojas, homo vojas (Les chiens aboient, la caravane passe).

**ABRUTIR (STULTIGI)** \* Stultigi infanon per troa laboro, per senĉesaj admonoj kaj riproĉoj (par un travail excessif, par d'incessants reproches).

**ABSENCE / ABSENT (NEĈEESTO)** \* Brili per neĉeesto. Ekskuzi sian foreston. La forestanto estas ĉiam malprava (les absents ont toujours tort).

**ACCABLER (V. INJURE)**

10. **ACCAPARER** \* Laboro absorbas lian tutan korpon (l'accapare tout entier).

**ACCÈS (ATAKO)** \* Atako de kolero, frenezo.

**ACCORD (KONSENTO)** \* Mi principe konsentas kun vi en tio (d'accord en principe avec vous). Silenta interkonsento (accord tacite).

**ACORDER** \* Doni al iu sian filinon, kiel edzinon (accorder la main de sa fille à quelqu'un).

**ACCROCHER (S')** \* Dronanto eĉ herbeton kaptas avide (s'accroche avec l'énergie du désespoir).

**ACCUEIL (AKCEPTO)** \* Li faras al ni decan akcepton. Renkonti plaĉon ĉe iu (rencontrer un accueil favorable).

**ACCUEILLIR (AKCEPTI)** \* Akcepti iun afable, froste, varme, gastame, senceremonie, kun etenditaj brakoj. KD 55/6.7

**ACCULER (ALPREMI)** \* Alpremi al muro. Esti premata en direkto al la maro (parlant de : l'ennemi).

**ACCUSER (KULPIGI) (V. CHIEN)**.

**ACHAT (AĈETO)** \* Fari siajn aĉetojn en butikoj.

20. **ACHETER** (AĈETI) \* Aĉeti : firme, kontante, kredite, aŭkcie (aux enchères), je modera prezo. .../ Aĉeti teon por unu franko. Mi ne povas permesi al mi la aĉeton de tiu luksaĵo. Ju pli da aĉetantoj, des pli alta la prezo. (Plus il y a d'acheteurs, plus les prix montent). Aĉeti ion por iom da neniom (pour moins que rien). KD 27/1

**ACTE** (AGO) (V. AGIR) \* Ago : arbitra, aŭtokrata, maŝina, justa, nobla, prudenta (raisonnable, sensé), singarda, (prudent), kolera, partia. Determini la motivojn de ago. KD 3/1...

**ACTION** (AGADO) \* Homo de agoj (homme d'action) Havi plenan liberecon de agado. Risorto, motivo de lia agado. KD 3/1...

**ADIEU** (ADIAŬ) \* Adiaŭ por ĉiam. Letero de adiaŭ. Per abrupta adiaŭ.

**ADVENIR** (OKAZI) \* Okazu, kio okazos (advienne que pourra).

**AFFAIRE** (AFERO) \* La afero sidas en bonaj manoj. La afero statas tiel (en est là). Pririgardi la staton de la afero (où en est l'affaire). Tio estas afero tute privata. Plenumi la kurantajn aferojn. Zorgu pri la propraj aferoj (= ne ŝovu la nazon en fremdan vazon) (occupez vous de vos affaires). Mi tute ne volas min miksi en la konduko de tiu afero. KD 2/1...

Dronigi ion en silenton (étouffer une affaire). Negocaj aferoj estas severaj (les affaires sont les affaires). Fari bonan negocon (faire de bonnes affaires). KD 27/1...

**AFFAMÉ** (MALSATA) \* Ventro malsata oreton ne havas (ventre affamé...). Sata malsatan ne povas kompreni (un "repu" ne peut comprendre un affamé). Malsata kiel lupo (une faim de loup).

**AFFIRMER** (ASERTI) \* Kategorie aserti. Tio estas tre diskutebla aserto. Aserto ne estas pruvo ("Je n'avance rien que je ne prouve" : Pascal).

**AFFRANCHIR** (AFRANKI) \* Kio estas la afranko por tiu presaĵo? Afranki per memorfesta poŝtmarko (commémoratif). Ne sufiĉe afrankita letero. Punpago pro ne sufiĉa afranko. La korespondado kun soldatoj estas senafranka (jouit de la franchise postale).

**AFFRONT** (V. OFFENSE).

30. **ÂGE** (AĜO) \* Kian aĝon vi havas? / Kia estas via aĝo? / Kiom da jaroj vi havas? Tio venas kun la aĝo. Atingi grandan/profundan aĝon (un âge avancé). Havi plenajn 46 jarojn (46 ans accomplis). Li estas samaĝa kiel mi (il a mon âge). Li ne havas la decan aĝon por decidi tion (pas assez mûr pour prendre une décision). KD 5/1.2.3

**AGIR** (AGI) (V. ACTE, ACTION) \* Agi por ies bono, por komuna bono, laŭ sia kapo (n'en faire qu'à sa tête), laŭ sia bontrovo (bon plaisir), sub masko de virto, por sia propra intereso. Kiel li agis kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ li (j'agirai envers lui, comme il a agi envers moi).

**AGIR (S'AGIT)** (TEMAS) \* Pri kio temas? / Pri kio estas la demando? Tute ne temas pri tio.

**AGRÉABLE** (AGRABLA) \* Kunigi/ ligi utilon kun agrablo (joindre l'utile à l'agréable). Estas plezure aŭdi, ke... (il est agréable d'entendre dire que...).

**AIDE** (HELPO) \* Efika helpo. Helpo en la ekstrema bezono (en cas d'extrême urgence). Doni fratan helpon. Kun la helpo de... Havi la firman decidon helpi al vi. Avara je helpo. Rifuzi al iu sian helpon. Forte min doloras la nepovado helpi vin (je regrette vraiment de ne pouvoir vous aider). Helpate de neniu, mi... Neniun helpanton plu mi deziras (je n'ai plus besoin de personne). Helpu al vi, vin helpos Di' (aide-toi, le ciel t'aidera).

**AIGUILLE** (KUDRĪLO) (V. CHERCHER).

**AILE** (FLUGILO) \* La timo havigis/donis al li flugilojn.

**AIMER** (AMI) (V. AMOUR) \* Ami : filon, hundon, kafon, honoron, laboron. Ami : danci, ŝerci, fanfaroni. Ami : plej kore/el la tuta koro. Enamiĝi reciproke (s'éprendre l'un de l'autre). Li amis kaj estis amata. Ami unu la alian. Li ĵuradis per la ĉielo kaj la tero, ke li amos ĝis la morto. Amu vian proksimulon, kiel vin mem (aime ton prochain comme toi-même). KD 7/1...

**AINSI** (TIEL) \* Estas tiel kaj ne alie (= tiel estas, tiel restas) (c'est ainsi et pas autrement).

**AIR** (AERO)(ASPEKTI) \* Aero : seka, humida, sufoka. Freŝigi la aeron (renouveler l'air). Bona horo por preni freŝan aeron (pour prendre l'air).

Vivi en libera aero \* Projektoj en aero (faire des projets en l'air). \* Vivi per sistemo de "el mano al buŝo" (vivre de l'air du temps). \* Libera kiel birdo aera (libre comme l'air). \* Aspekti malsane, mizere, malbele (Avoir l'air malade...).

40. **AISE** \* Vivi sate kaj glate (vivre à l'aise).

**ALCOOL** (ALKOHOLO) \* Drinkado bestigas homon (l'alcool abrutit l'homme).

**ALLER** (IRI) \* Vagi kiel turmentata animo (aller comme une âme en peine). Li paŝadis tien kaj reen ĝis malfrua nokto (allait et venait).

**ALOUETTE** (ALAŬDO) \* Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto (= Ne gutas mielo el la ĉielo...) (attendre que les alouettes tombent toutes rôties).

**AMABILITÉ** (AFABLECO) \* Via ĉarma afableco. Havu la afablecon skribi... Mi afable petis lin, ke li sidiĝu. Dankon pro la speciala afableco, kiun ili montris al mi (merci pour l'amabilité toute particulière qu'ils m'ont témoignée).

**AMBITION** (AMBICIO) \* Ekzistas laŭdaj ambicioj (ambitions louables). Havi la ambicion fariĝi... Lin spronas ega ambicio (il est stimulé par une immense ambition). Meti limon al sia senbrida ambicio (mettre un frein à son ambition démesurée).

**ÂME** (ANIMO) \* Ekvilibro de animo. Malkaŝi, nudigi sian animon. El la fundo de animo. Travidi ies animon (lire dans l'âme de quelqu'un). Rekomendi sian animon al Dio. Fordoni sian animon al la diablo (vendre son âme au diable). Preĝi por ies animo. Vagi kiel turmentata animo (aller comme une âme en peine). Esti la animo de la entrepreno. Agi grandanime (faire preuve de grandeur d'âme). Sana menso en sana korpo (une âme saine dans un corps sain). Klopodi sen limo per korpo kaj animo (se donner corps et âme).

**AMENER** (VENIGI) \* Kio vin venigis ĉi tien? (Quel bon vent vous amène?).

**AMÉRIQUE** (V. DÉCOUVRIR)

**AMI** (AMIKO) (V. AMITIÉ) \* Amikoj : komunaj, fidindaj, nedisgeblaj, intimaj, ĉiamaj (de toujours). Neglekti, malzorgi, perfidi amikon.

Malfermi siajn brakojn al amiko. Konsideri iun,



kiel amikon. Unu amiko mia. Cedi al insista premo de kelkaj amikoj. Aro, areto da amikoj, da "kompanoj". Amiko de amiko estas ankaŭ amiko. Gardu min Dio kontraŭ amikoj, kontraŭ malamikoj mi gardos min mem. KD 8/1...

50. **AMITIÉ** (AMIKECO) (V. AMI) \* Amikiĝi kun... (= ligi amikajn rilatojn kun iu) (se lier d'amitié). Sigeli amikecon (sceller une amitié). Honori iun per sia amikeco. Donacetoj subtenas amikecon (entretiennent l'amitié). KD 8/1.

**AMOUR** (AMO) (V. AIMER) \* Amo : blinda, arda, fajra, trompita, sekreta. Flamigi, bruli, ardi pro (de) amo al (por) iu. Konfesi sian amon al iu. La amo estas blinda. Oni ne facile forgesas sian unuan amon. La amo estas tiel forta, kiel la morto. Feliĉa ĉe monludo, malfeliĉa en amo (heureux au jeu, malheureux en amour) KD 7/1 + 9/1...

**AN** (JARO) (V. ANNÉE. ÂGE) \* Kurbiĝi/ klinita sub la pezo de la jaroj. Forkuris la jaroj. Mi estas 18-jara./ Mi havas 18 jarojn./ Mi estas 18 jarojn aĝa. KD 5/1...

**ÂNE** (AZENO) \* Ve! kia azeno mi estas! \* La hufobato de l'azeno (le coup de pied de l'âne).

**ANNÉE** (JARO) (V. AN) \* Novjaraj bondeziroj. Novjaro.

**ANONYMAT** (ANONIMECO) \* Sin kaŝi sub anonimeco / inkogniteco. Persono, kiu deziras resti anonima. Vojaĝi inkognite, sub la nomo "Februaro".

**ANTIPATHIE** (ANTIPATIO) \* Havi kontraŭ iu antipation naturan.

**À PEINE** (APENAŬ) (V. PEINE).

**APÔTRE** \* Hipokriti honestecon (faire le bon apôtre = faire la chattemite).

**APPARENCE** (ŜAJNO) \* Ŝajno trompas (les apparences sont trompeuses). La ŝajno estas kontraŭ ni. Laŭ la ŝajno (à en juger par les apparences). Sub ŝajno de pieco (sous des dehors dévots). Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero. (ne vous fiez pas aux apparences).

60. **APPARTENIR** (APARTENI) \* La estonteco apartenas al ni! (l'avenir...). En tia konfuzaĵo, kiel rekoni la miaĵon? (dans un tel fouillis, comment reconnaître

ce qui m'appartient (= est à moi). Kio mia, tio bona.

**APPEL** (APELACIO) \* Apelacii al la publika opinio.

**APPÉTIT** (APETITO) \* Dum la manĝado venas apetito. Bonan apetiton! Veki, stimuli, eksciti, senti, perdi apetiton. Manĝi sen apetito. KD 40/1...

**APPLAUDISSEMENT** (APLAŬDO) \* Ektondras tempesto da aplaŭdoj. Neĉesema aplaŭdo (interminable).

**APPLIQUER** (APLIKI) \* Apliki praktike tion, kion oni lernis. La rimarko tre bone aplikigas en tiu ĉi okazo.

**APPRECIER** (ŜATI) \* Nur suferinto ŝatas feliĉon. (seul celui qui a souffert apprécie le bonheur).

**APPRENDRE** (LERNI, SCIIĜI) \* Oni lernas instruante. Bona majstro lernas ĝismorte (on apprend à tout âge). Multe lerni el siaj vojaĝoj. KD 33/1...

Sciiĝi pri io el onidiroj (apprendre quelque chose par on-dit).

**APPUYER** (APOGI) \* Apogi la kapon sur la mano. Apogi sin sur ies brako. Sidi kun tempio apogita sur la mano. \* Feliĉe trovi apogon ĉe iu.

\* Sin apogi sur la rezono kaj ne sur siaj sentoj.

**ARAIGNÉE** (ARANEO) \* Havi muŝojn en la cerbo (= Muŝo zumas en lia kapo) (il a une araignée au plafond).

**ARBRE** (ARBO) \* Fleksu arbon dum ĝia juneco. La arboj lin malhelpas vidi la arbaron. Kia arbo, tia frukto (c'est au fruit qu'on connaît l'arbre).

70. **ARC** (ARKO) \* Havi du ŝnurojn al sia arko.

**ARGENT** (MONO) \* Bezoni, prunti, elspezi, ricevi, elfeti, disipi, disŝutadi monon. Mono por kovri la kurantajn elspezojn. Li ne havas monon elfeteblian, superfluan. Domaĝi la monon (plaindre l'argent).

Mono elfetita tra fenestro (= al la kloako). Tempo estas mono. La riĉaĵo ne liveras feliĉon (ne fait pas le bonheur). El lia mano ĉiu monero elglitas (l'argent lui fond dans les mains). Havi strikte da mono (à peine suffisamment). Fari el mono sian dion. \* Ili ludas kartojn je grandaj sumoj.

\* Akcepti por kontanta mono vortojn, kiuj ne havas indon. KD 53/5

**ARGUMENT** (ARGUMENTO) \* Solida argumento. Ĵongli per argumentoj. Refuti argumenton. Ĉerpi

el sia arsenalo da argumentoj. Argumento, kiun estas malfacile kontraŭdiri.

**ARME** (ARMILO) \* Ataka, defenda, pafa, tranĉa armilo. Armita ĝis la dentoj. Alpreni, demeti la armilojn. Doni armilojn en la manojn de malamiko (donner des armes contre soi-même). KD 11/9.13 + 42/5

**ARRANGEMENT** (V. PROCÈS).

**ARRÊTER** (HALTI/IGI) \* Eĉ se mi volus nun halti, mi jam ne povus. (jam ne = ne plu)

\* Haltigi sian rigardon sur ies vizaĝo.

**ARRIÈRE** (MALANTAŬE) \* Unu paŝo antaŭen, du paŝoj posten (un pas en avant, deux pas en arrière). Ataki iun de malantaŭe. Kun la kapo klinita malantaŭe(n).

**ARRIVER** (ALVENI, OKAZI) \* Alveni ne atendite (à l'improviste). Alveni ĝustatempe (au bon moment). Alveni en sia loko de destino (à bon port). Lia alveno koincidas kun mia deiro (départ).

\* Kio okazis (qu'est-il arrivé?) Okazu, kio okazos. (arrivera ce qui doit arriver). Tio povas okazi en ĉiu tago. La samo okazis al mi, kiel al vi (il m'est arrivé la même chose qu'à vous). Facile povus okazi, ke ...us.

\* Neniu scias, kio morgaŭ lin trafos (personne ne sait ce qui peut lui arriver = de quoi demain sera fait).

**ARTISAN** (METIISTO) \* Koniĝas majstro laŭ sia verko (à l'oeuvre on connaît l'artisan).

**ASSURER** (S') (CERTIĜI) \* Ili volis certiĝi, ĉu... (ils ont voulu s'assurer que...).

80. **ATTAQUER** (ATAKI. STURMI) \* Ataki urbon, landon. Ataki iun de malantaŭe/inside/aldorse. \* Ataki reputacion, honoron, la virton de virino. Rebati atakon (riposter). \* Nerezistebla sturmo (un assaut irrésistible).

**ATTEINDRE** (ATINGI. TRAFI) \* Atingi rezulton, sukceson, rekompencan, perfektecon, ies konsenton. Celo atingita per du vojoj (but atteint de deux façons). Neatingebla perfekteco. Mi penos atingi, ke... (je tâcherai de)

\* Trafi iun per kuglo. Trafita de kancero. Neniu scias, kio morgaŭ lin trafos (V. ARRIVER).

**ATTEINTE** \* Damaĝi ies reputacion (porter atteinte)

à la réputation de quelqu'un).

**ATTENDRE** (ATENDI) \* Atendi pacience. Atendi ion, kiel mesion. Granda surprizo atendas vin. La tagmanĝo atendas vin. Li venis ne atendite. Kion mi povas ankoraŭ atendi de vi? Mi tion ne atendis de vi. Atendi kun streĉita atendo la rezulton de ekzameno (attendre avec anxiété...). Oni ne devas atendi, ĝis la domo renversigus (on ne doit pas attendre la dernière extrémité pour...) Oni ne devas atendi, ĝis la registaroj decidis (pri E.) (on ne doit pas attendre que les gouvernements prennent une décision pour...). Mi atendis, ĝis ili ĉesos paroli (j'ai attendu qu'ils s'arrêtent de parler).

**ATTENTE** (ATENDO) \* Streĉa atendo (attente anxieuse). Malgraŭ, kontraŭ ĉia atendo. Lia atendo estis trompita.

**ATTENTION** (ATENTO) \* Altiri la atenton. Okupi la atenton. Koncentri sian atenton. Streĉita atento (attention soutenue). Esti objekto de atento. Mi turnas vian atenton sur tio, ke... (j'attire votre attention sur le fait que...). Rekomendi al ies atento la legadon de ... Veki la atenton de la aŭskultantoj. Atentu, ke vi ne falu! Atentu min kaj aŭdu! (écoutez - moi donc). Tute malatenti la riproĉojn. Senatente kunpuŝigi kun iu (bousculer quelqu'un sans faire attention).

**ATTIRER** (ALTIRI) (V. ATTENTION)

**ATTRAIT** (ALTIRO) (V. FRUIT DÉFENDU)

**AUDITOIRE** (AŬDANTARO) \* Plene konkeri siajn aŭdantojn.

**AUTANT (QUE)** \* Kiom estas eble (autant que possible). Manĝu, kiom vi bezonas. La afero, kiom mi memoras, okazis subite (autant que je m'en souviens) \* Mi ne volas ripeti miajn vortojn, des pli ke ĉiu el vi facile mem trovos la respondon. (Tiom pli = des pli).

90. **AUTORITÉ** (AŬTORITATO) \* Ĝui grandan aŭtoritaton super iu. Fari diskretan uzon de sia aŭtoritato. Sapei ies aŭtoritatecon. Tio, kion diras pri tio grandaj aŭtoritatoj. Ĉiu submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj. \* Citi aŭtoritatulojn, por apogi siajn dirojn (citer des voix autorisées).

**AUTRE (ALIA) \*** Sen ia alia vorto li eliris. Tio estas tute alia afero. La rezulto estis tute alia, ol ni esperis. Agi alie mi ne povis. Al la plejmulto restas nenio alia por fari, ol migri. Ŝi estis tute alia, ol kiel li ŝin imagis al si (elle était tout autre que ce qu'il se l'imaginait). Nek io, nek alio (ni cela, ni cela). Inter aliaĵoj rakonti, ke... (entre autres choses raconter que...) \* Ili ne vidis unu alian. Komprenante unu la alian, la popoloj... Ili kuris unu post la aliaj. Ili kunigis tapiŝojn unu kun la aliaj. La registaroj ĵetas homojn unujn kontraŭ la aliajn. (Remarque : unun serait logique dans "unu kun la aliaj". Cependant on ne met l'accusatif qu'après le pluriel "unuj").

**AUTRUCHE (STRUTO) \*** Struta politiko. Strute kaŝi la kapon en sablon (pratiquer la politique de l'autruche). \* Havi ŝtalan stomakon (avoir un estomac d'autruche).

**AVALER (GLUTI) \*** Senmaĉe gluti. Fari misgluton/ Gluti misvojen (avalér de travers). Gluti ion per unu gluto (avalér d'un trait). \* Engluti multon amaran (avalér la pilule). Ĉiun blagon li glutas glate! (Il avale tous les bobards).

**AVANTAGE (AVANTAĜO) \*** Akiri avantaĝojn el io. Promesi avantaĝojn. Tre avantaĝaj kondiĉoj. Baze de reciprokaj avantaĝoj. Zorgi nur pri la propra avantaĝo (rechercher son avantage).

\* Ŝanĝiĝi avantaĝe (changer à son avantage).

**AVARE (AVARA) \*** Patroj avaras, infanoj malŝparas (à père avare, fils prodigue).

**AVENIR (ESTONTECO) \*** Estonteco estas nia/ apartenas al ni. Bela futuro al li promesiĝas (il a un avenir prometteur). Havi fidon en la futuro. Tio estas sekreto de la futuro. En plej proksima futuro (dans un avenir proche). Nuba estonteco (sombre). La tempon venontan ankoraŭ neniu konas (personne ne connaît l'avenir).

**AVERTIR (AVERTI) \*** Avertu ŝin, ke ŝi ne venu (dites lui qu'elle ne vienne pas). Mi vin avertas, ke li en tia stato estas kapabla je ĉio. \* Tio estas averto por ni. Doni al iu malgrandan averton.

**AVEU (KONFESI) (V. AVOUER) \*** Laŭ sia propra konfeso. Eltordi/ eldevigi el iu konfeson (arracher

des aveux).

**AVEUGLE** (BLINDA) \* Blinda : amaso, obeemo, konfido, amo, kolero, fervoro, konfido, neceseco. Blinde : kredi, sin ligi. Blindigita de pasio, de rutino, de partieco. \* Palpi la murojn kiel blinduloj. Inter la blinduloj reĝas la strabuloj (au pays des aveugles...) \* Perdi la lumon (= blindiĝi).

100. **AVIS** (OPINIO) \* Kiom da kapoj, tiom da opinioj (autant de têtes, autant d'avis = les avis sont partagés). Mia persona opinio estas ke...

**AVOIR** (HAVI. POSEDI) \* Kio estas al vi? (qu'est-ce que vous avez?/ qu'est-ce qui vous arrive?) \* Nin ĉiam ravas, kion ni ne havas (on a toujours envie de ce qu'on n'a pas). Ju pli oni posedas, des pli oni avidas (plus on en a, plus on en veut) V. Main. Langue pendue. Timbre fêlé. Avoir pied. Tête sur les épaules. Dernier mot. Vocation. Chaleur (j'ai chaud).

**AVOUE** (KONFESI) (V. AVEU) \* Post konfeso venas forgeso (faute avouée est à moitié pardonnée). \* Mi devas konfesi, ke mi... Konfesi al iu sian amon.

**AVRIL** (APRILLO) \* Aprila vetero, trompa aero (en avril ne te découvre pas d'un fil).

## B

**BAIN** (BANO) \* Preni banon ĉe la marbordo.

\* Forfluu infano kune kun la bano! (= senkuraĝiĝe mi ĉion rezignas!) (jeter le bébé avec l'eau du bain).

**BAISER** (KISO) \* Kiso de Judaso. Kovri, superŝuti iun per kisoj. Pluvo da kisoj. Nur unu kiseton! Kisi iun sur la frunto. Sendi kisojn per la mano, per la fingroj. Premi kison sur la vango(n) de iu.

**BALANCER** (BALANCI) \* Nerve balanci la piedojn. Balanci la kapon laŭ takto de la muziko. Jese, reveme balanci la kapon. \* La ŝipo balanciĝas sur la maro.

**BALAYER** (BALAI) \* Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo (à chacun son métier...et les vaches seront bien gardées).

**BANALITÉ** (BANALAĴOJ) \* Tro gurditaj banalaĵoj (des banalités toujours ressassées).

**BARBE** (BARBO) \* Barbo bele kombita, /distaŭzita (en désordre). Falsa barbo (= postiĉa). Karesi al iu la barbon. Barbostopla vizaĝo (un visage avec une barbe de plusieurs jours). Tuj antaŭ ies nazo (au nez et à la barbe de quelqu'un).

\* Ĵuri per la barbo de la Profeto.

110 **BASE** (BAZO) \* Formi la bazon de io. Mankas al ĝi bazo. Bazita sur la realaĵo. Rigardi ion kiel bazan fundamentan principon.

**BATEAU** (ŜIPO) \* Ŝipo kun plene levitaj veloj. Servi sur ŝipo. KD 67/22...34 (80 expressions).

\* Ili remas en la sama boato (embarqués sur la même galère).

**BÂTON** (BASTONO) \* Preni bastonon de migrulo (prendre son bâton de pèlerin). \* Ĵeti bastonon en la radon (mettre des bâtons dans les roues).

**BATTRE** (BATI) (V. COUP) \* Draste draŝi iun (battre comme plâtre) (draŝi = battre le grain/rosser) \* Forĝu feron dum ĝi estas varmega (il faut battre le fer quand il est chaud). \* batali kontraŭ ventmuel-ejoj (se battre contre les moulins à vent). \* Pente bati sian bruston (battre sa coulpe).

**BAYER** \* Gapi kiel bovido (bayer aux corneilles).

**BEAU** (BELA) (V. BEAUTÉ) \* Tio estas tro bela por esti vera. \* Virino tiel bela, kiel povis krei nur la naturo. Nekompareble bela. \* Estus tre bele, ke mi povu... (ce serait vraiment chouette, si je pouvais...)

**BEAUCOUP** (MULTE) \* Havi multon por fari (avoir beaucoup à faire).

**BEAUTÉ** (BELECO) (V. BEAU) \* Koscii sian belecon. Supertera beleco. Havi idealan /diecan belecon (divine beauté). \* Konfesi sian amon al fascinanta belulino (avouer son amour à une enjoleuse).

**BEC** (BEKO) \* Havi bonan bekon \* Tio fermis la buŝon al niaj kontraŭuloj (clouer le bec).

**BÉNÉDICTION** (BENO) \* Donaci benon (donner sa bénédiction). Bona infano estas beno de Dio. \* Benita estu la frukto de via ventro. Milda lando, benata de la naturo. La nepoj vin benos, se vi pacienco eltenos (vos petits-fils vous béniront, si vous savez tenir patiemment). La posteuloj benos mian memoron. \* Kurbiĝadi kiel diablo

en akvo benita (se démener comme un diable dans un bénitier).

120. **BERCEAU** (LULILO) \* De lulilo ĝis ĉerko (du berceau à la tombe).

**BERCER** (SE) (V. ILLUSION)

**BESOIN** (BEZONO) (V. NÉCESSAIRE) \* En okazo de bezono. Brula bezono. Natura bezono. \* Senti bezonon de nutraĵo. Havi moderajn/grandajn bezonojn Havi urĝan bezonon pri io. Devigata/pelata de bezono (poussé par le besoin), /de neceso. Helpo en ekstrema bezono. Al ĉiu persono laŭ ties bezono (à chacun selon ses besoins). Ili servas nur por la okazoj de efektiva bezono. Mi ne konsilus uzi senbezone ...on. Ni ne bezonas timi, ke oni ilin reciproke konfuzos (il n'y a pas besoin de craindre qu'on les confonde).

**BESTIALITÉ** (SOVAGĜECO) \* Kian gradon de sovaĝbesteco povas atingi la genta malamo! (jusqu'à quel point de bestialité peut aller la haine entre ethnies).

**BÊTE** (BESTO) \* Esti kiel ĉasata besto (être comme une bête traquée). \* Stulta kiel ansero (bête comme une oie). \* Serĉi tuberon sur junko / haron en ĉiu supo (chercher la petite bête) (= Displitigi harojn)(fendre un cheveu en quatre).

**BÊTISE** (STULTAĴO) \* Kroni eraron per eraro (faire bêtise sur bêtise).

**BEURRE** (BUTERO) \* Tio alportos iom da graso por nia kuirejo (mettre du beurre dans les épinards).

**BICYCLETTE** (BICIKLO) \* Rajdi sur biciklo (aller à bicyclette). Estas malpermesite bicikli en parko. La posta rado de biciklo idlas (fait roue libre).

**BIEN** (BONO) \* Agadi bonfare/filantrope (faire le bien). Oferi sian tempon/monon al la komuna bono (sacrifier son temps, son argent pour le bien commun). \* Ne repagu bonon per malbono (ne rendez pas le mal pour le bien). \* Fino bona, ĉio bona (tout est bien qui finit bien).

\* Kiel bonokaze! (comme ça tombe bien!) \* Plibono estas malamiko de bono (le mieux est l'ennemi du bien). \* Esti varme en ies favoro (être bien en cour). \* La afero prezentas sin sub favora aŭspicio (se présente bien). \* Perei/droni kun homoj kaj varoj (= kun homoj kaj musoj) (périr



corps et biens).

**BIENFAIT** (BONFARO) \* Ili ĝuas ĉiujn bonojn de la vivo/civilizacio. \* Bono farita ne estas perdita (Un bienfait n'est jamais perdu). \* Bonfaron oni facile forgesas.

130. **BIENTÔT** (BALDAŬ) \* Tio ne estos tre baldaŭ (ce n'est pas pour bientôt).

**BILE** (GALO) \* Elverŝi sur iun sian galon/mishumoron (décharger sa bile) \* Mi ne volas fari al mi aflikton pro tio (= tio ne devas min ĉagreni) (je ne veux pas me faire de bile pour cela).

**BLAGUE** (BLAGO) \* Blage troigi (dire des blagues un peu exagérées). Gluti blagon. KREDU min, tio ne estas blago (croyez moi, ce n'est pas du bidon).

**BLANC** (BLANKA) \* Nigro sur blanko. Blanka kiel tolo (blanc comme un linge) \* Plenigi la blankojn de formulo.

**BLESSER** (VUNDI) \* Kun tiaj personoj, oni devas esti tre singardema por ne ofendi ilin (on doit faire très attention de ne pas les blesser).

**BLEU** (BLUA) \* Bati bluaĵojn al iu (donner des coups provoquant des bleus). Havi bluaĵojn sur la okuloj (avoir des bleus aux yeux).

**BOEUF** (BOVO) \* Doni ovon por ricevi bovon (donner un oeuf...).

**BOIRE** (TRINKI. DRINKI) \* Trinki je/pro ies sano. Trinki el sia kavigita mano (boire dans sa main). Trinki glason de ĝisrevido.

\* Drinki kiel funelo (entonnoir) /kiel spongo. Drinki ĝis falo sub la tablon. \* Fordrinki sian monon (dépenser son argent en boisson). \* Abomeni trinki akvon (avoir l'eau en horreur). \* Doni al iu manĝi kaj trinki.

- "Nu, donu al li tamen por trinki", patro diris. (Hugo-Kalocsay). KD 62/1...

**BOIS** (LIGNO) \* La homo estas el karno, ne el ligno. \* Kun kurbiĝema karaktero (= akordiĝema) (être du bois dont on fait les flûtes). \* Esti en postebria stato (avoir la gueule de bois). KD 10/1...

**BON** (BONA) \* Deziri al iu ĉion bonan. Vi estas tre bona al/kontraŭ mi (envers moi). Kio estas bona por vi, estas bona por mi. Ĉiu estu bona kaj kompatema al sia frato (que chacun soit bon et compatissant pour son frère).

\* Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme (on est bien partout, mais on est mieux chez soi).

\* Li estas bona por nenio. \* Ne estas bone, ke ...u.

**BONTÉ (BONECO)** \* Havu la bonecon, alporti...

**BONHEUR (FELIĈO)** \* Feliĉo : pura, sennuba, perdita, facile atingebla. Akiri, perdi feliĉon. Ebria de feliĉo. Radii de feliĉo. Naĝi en plena feliĉo. Sopiri al feliĉo. Ĝoji pri ies feliĉo. Akompanu vin feliĉo. Homa feliĉo estas pasema (éphémère). Feliĉo estas delikata floro (le bonheur est fragile).

La riĉaĵo ne liveras la feliĉon (l'argent ne fait pas le bonheur) \* Nur suferinto ŝatas feliĉon (seuls, ceux qui ont souffert apprécient le bonheur) KD 20/I

**BOUCHE (BUŜO)** \* Havi larĝan/ĝisorelan buŝon (fendue jusqu'aux oreilles). Ŝaŭmanta buŝo (qui écume). \* Lasi ion elgliti el la buŝo. \* Stari kun malfermita buŝo. Buŝmalferme gapi (bayer aux corneilles). \* Iri/flugi de buŝo al buŝo (kalumnio). \* Tio fermu la buŝon al niaj kontraŭuloj (que ceci cloue le bec à nos adversaires). \* Vi forprenis tiun vorton de sur mia lango (tu m'as retiré le mot de la bouche). \* Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras (on ne fait pas la fine bouche).

**BOUE (KOTO)** \* Tiri iun en la koton (traîner quelqu'un dans la boue). Surĵeti/surkrii iun per koto kaj ŝlimo (couvrir de boue).

**BOURSE (MONUĴO)** \* Monon aŭ vivon (la bourse ou la vie). \* La sako mizeras (la bourse est plate).

**BOUT (EKSTREMAĴO)** \* Li ne sciis, kiel li komencu la aferon (par quel bout commencer). \* Esti ĉe la limo de sia pacienco (à bout de patience).

**BRAS (BRAKO)** \* Levi la brakon. Porti ion sub la brako. Preni infanon en la brakoj. Kruci la brakojn. Resti/sidi kun krucitaj brakoj. Sin apogi sur ies brakoj. Ĵeti sin en la brakojn de iu. Prezenti la brakon al virino. Iri brako en brako/brakon en brako. Fortiri/elŝiri sin el ies brakoj. \* Kapti iun ĉirkaŭ la trunko (à bras le corps).

**BREBIS (ŜAFINO)** \* Unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas (il ne faut qu'une brebis galeuse pour infecter un troupeau).

**BRIQUE (BRIKO)** \* Alporti sian briketon al konstruo/sian ŝtonon por konstruo.

**BRISER** (ROMPI) \* Rompi la glacien (= malaperigi la ĝenon).

150. **BROUILLARD** (NEBULO) \* Nebulo etendiĝas super la valo. Ŝvebas densa nebulo super la marĉejo (flotte au-dessus du marécage). Nebulo densa kiel kaĉo. Densa nebulo kvazaŭ tranĉebla kiel per klingo (à couper au couteau). Malaperi en nebulo (s'évanouir dans le brouillard).

**BRUIT** \* Ne faru tian bruon! \* Granda frakaso en akvoglaso (= Multe da bruo por nenio). Pli da bruo ol da faro (plus de bruit que de besogne). \* Famo cirkulas (un bruit circule). Malvera famo. Disvastigi famon (répandre un bruit).

**BUT** (CELO) \* Konduki al la celo. Havi malican celon (avoir un but caché). Trafi sian celon (atteindre son but). \* La fina celo estos atingita, kiam...

## C

**CACHER** (KAŜI) \* Klopodi kaŝi ion (s'efforcer de cacher qqc.). Li havas ion kaŝindan (il a qqc. à cacher). Kaŝi ion antaŭ iu. Ĉu mi kaŝos antaŭ A., kion mi faras? (Vais-je cacher à A. ce que je fais?). Kaŝi al si la vizaĝon post la manoj (se cacher le visage). Mia ringo ne estus tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi (on n'aurait pas cherché si longtemps ma bague, si vous ne l'aviez si habilement cachée) (V. Abrégé pratique de la Grammaire Esperanto n° 32).

**CADEAU** (DONACO) \* Donacetoj subtenas amikecon (les petits cadeaux entretiennent l'amitié).

**CAFÉ** (KAFO) \* Kuiru kafon (faire le café). Preni kafon. Ili aranĝis kafobabilan kunvenon (ils nous ont réunis autour d'une tasse de café)

**CALCUL** (KALKULO) (V. COMPTER)

**CALENDES** (KALEDOJ) Formeti ĝis la grekaj kalendoj (= en la tago de sankta Neniemo) (renvoyer aux calendes).

**CALENDRIER** (KALENDARO) \* La unua de januaro de la malnova rusa kalendaro respondas al la 14a de la nova (correspond à...) (non pas : "korespondas"!)

**CALIFOURCHON** (Ā) \* Rajde sur...

160. **CALME** (KVIETA) \* Plena senvento. Antaŭtempesta silento (le calme avant la tempête).

**CALMER** (KVIETIGI) \* Kvietigi doloron, soifon.

Milda respondo kvietigas koleron. \* La vortoj de la kuracisto trankviligis la malsanulon.

**CALOMNIE** (KALUMNIO) \* Fia kalumnio (ignoble). Surĵeti iun per koto de kalumnio. Disporti kalumnion inter la popolo. Kalumnio fondita sur nenio. Esti alarmita de kalumnia kampanjo. Kontraŭ kalumnio helpas nenio (rien à faire contre la calomnie). Se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas (Calomniez, calomniez, il en restera toujours qqc.). Estu ĉasta kiel glacio ; estu pura kiel neĝo - vi ne evitos la kalumnion (quoi que vous fassiez vous n'éviterez pas la calomnie).

**CAMP** \* For! subite kiel eble! (fiche moi le camp!).

**CAPABLE** (KAPABLA) \* La plej forta kaj kapabla el ĉiuj. Ĉu ni estus ne kapablaj fari tion? Por kiu okupo vi sentas vin pleje kapabla? (pour quoi vous sentez-vous le plus capable). Virino en tia stato estas kapabla je ĉio. Ĉu vi opinias min kapabla por tia malnobla ago? (me croyez-vous capable d'un acte aussi bas?).

**CAPACITÉ** (KAPABLO) \* Manifesti sian kapablon. Doni al iu ŝancon montri siajn kapablojn. Dank'al siaj esceptaj kapabloj, li... (grâce à ses dons exceptionnels...). Havi kapablecon por desegnado (être bon en dessin).

**CAPRICE** (KAPRICO) \* Cedi al ĉiuj kapricoj de X... Li estas plena je pacienco por ŝiaj kapricoj. Kaprica kiel aprila vetero.

**CARACTÈRE** (KARAKTERO) \* Karaktero (naturo, humoro) : gaja, feliĉa, milda, olea, arda, ŝercema, hardita, egala, kompleksa, / acida, melankolia, kurbiĝema, eksplodema kiel pulvo, obstina kiel azeno...ktp. \* Ne ĉiuj homoj havas egalan karakteron. Profunda disonanco inter la karakteroj. Lia karaktero estas por mi enigmo. Ŝi apartenis al tiu kategorio de karakteroj, kiu... Li havas malsaman karakteron, ol la mia (différent du mien). Malbonaj trajtoj de karaktero. KD 26/1...

**CARAVANE** (KARAVANO) \* Hundo bojas, homo vojas (les chiens aboient...).

**CARESSE** (KARESO) \* Avari la karesojn. Karesi iluziojn.

170. **CARROSSE** (KALEŜEGO) \* Vivi larĝe kaj lukse (rouler carrosse).

**CARTE (KARTO)** \* Sterni kartojn sur la tablon (abattre ses cartes). \* Havi plenan liberecon de agado (avoir carte blanche).

**CAS (OKAZO/KAZO)** \* En okazo de neceso/de efektiva bezono. En escepta/en ekstrema okazo. En plej bona okazo, mi povus veni... (dans le meilleur des cas, je...). En la plimulto da okazoj (dans la majorité des cas). En la okazo, se...(dans le cas où...). Ekzistas okazoj, kiam la partecipo... (il y a des cas où le participe...). La rimarko aplikigas bone en tiu okazo. Mi povas citi cent similajn okazojn.

\* Tio estas kazo de eksedziĝo (c'est un cas de divorce). Ne ekzistas du identaj kazoj. Tio estas kuranta kazo de gripo. Benigna/maligna kazo.

**CASSER (ROMPI)** \* Rompi al si la femuron (femuraron). Rompi bastonon sur ies kapo. Liaj dentoj rompiĝis sur tio (il s'est cassé les dents sur...). Senĉese gurdi ion en ies orelojn (casser les oreilles à qq.). \* Kiu rompis, tiu pagu (qui casse les verres les paie).

\* Frakasi vazon en koleratako (briser un vase dans un accès de colère).

**CAUSE (KAŬZO)** \* Ofte de kaŭzo senhava venas efiko plej grava (petites causes, grands effets).

**CÉDER (CEDI)** \* Cedi al siaj pasioj, al peto, al deziro, al kaprico, al tento, al dormo... \* Cedi sian lokon, seĝon. \* Ĉio cedas al tiu, kiu posedas monon (tout cède devant l'argent).

**CEINTURE (ZONO)** \* Tiri pli strikta la zonrimenon (serrer la ceinture).

**CÉLIBATAIRE (FRAŬLO)** \* Ĝisosta/ ŝtoniĝinta/ olda fraŭlo (célibataire endurci). Senedzul(in)o.

**CENDRE (CINDRO)** \* Paco al lia cindro!

**CÉRÉMONIE (CEREMONIO)** \* Ne fari multajn ceremoniojn.

180. **CERTAIN (CERTA)** \* Mi ne estas certa, ĉu li venos (Je ne suis pas certain qu'il vienne). Pli ol certe. Certe, kiel duoble du estas kvar. Ĉe li oni neniam povas esti certa pri tio. Oni ne havas absolutan certecon, ĉu...(on n'a pas la certitude absolue que...).

**CÉSAR (CÉZARO) (V. RENDRE)**

**CEUX** \* Mi ne estas tia homo, kiu faras ĉagrenon al belulinoj (je ne suis pas de ceux qui...)

**CHACUN** (ĈIU) \* Ĉiu ajn (tout un chacun).

\* Ĉiu por si - por ĉiuj Di' (chacun por soi, Dieu pour tous).

**CHAGRIN** (ĈAGRENO) (V. CEUX) \* Cedi, fordoni sin al ĉagreno (s'abandonner à son chagrin). Puŝi iun en senfundan ĉagrenon (pousser qq. au désespoir).

**CHAIR** (KARNO) \* La karno estas malforta.

\* Homo ne estas el ligno sed el karno (n'être pas de bois) \* Ĝi estas nek viando nek fiŝo.

\* Sango de mia sango, karno de mia karno.

\* Tranĉi rekte en la karnon (tailler dans le vif).

**CHAISE** (SEĜO) \* Alŝovi seĝon al iu (donner une chaise à qq.).

**CHALEUR** (VARMO) \* Sufoka/prema varmo. Varmege kiel en infero. \* Agrabla sento de varmo \* Teni al si varme la ventron. \* Estas varme al mi (j'ai chaud).

**CHAMEAU** (KAMELO) \* Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio (il est plus aisé pour un chameau d'entrer par le trou d'une aiguille que pour un riche d'entrer dans le royaume de Dieu).

**CHAMPIGNON** (FUNGO) \* Kreski kiel fungo post pluvo.

**CHANCE** (ŜANCO. FORTUNO) \* Havi fortunon ĉe la ludkartoj. \* Bona ŝanco. \* Esti favorato/dorlotato de Fortuno. \* Havi plej multe da ŝancoj esti elektita. Niaj ŝancoj kreskis/malkreskis.

\* Ne estas multaj ŝancoj, ke li alvenos ĉi-vespere. Doni al iu ŝancon montri siajn kapablojn.

**CHANDELLE** (KANDELO) \* Bruligi kandelon ĉe ambaŭ finoj (par les deux bouts).

**CHANGER** (ŜANĜI) \* Ŝanĝi la tukojn de sia lito. Ŝanĝi loĝejon (changer de logement). Ŝanĝi la aŭtomobilon. Ŝanĝi la trajnon. Ŝanĝi sian opinion. \* La vetero ŝanĝiĝas. La cirkonstancoj ŝanĝiĝis. \* Radike ŝanĝi ion.

**CHANTER** (KANTI) \* Kanti laŭte, el la tuta gorĝo. Ŝi kantas agrable sed ne ĉiam ĝuste. Kanti kun akompano de liuto.

**CHAPEAU** (ĈAPELO) \* Demeti la ĉapelon antaŭ iu. Veni al iu kun la ĉapelo en la mano. Li ne

sciis, kion fari pri sia ĉapelo. \* Ordinare malgranda ĉapeto sidis ie sur ŝia kapo (elle portait d'habitude une petite toque négligemment posée sur la tête).

**CHAPELET** (ROZARIO) \* Trapreĝi/trafingri preĝe la rozarion (dire son chapelet)

**CHARGE** (ŜARĜO) \* Sur lin falas la ŝarĝo. Fleksiĝi sub peza ŝarĝo. Fali sub la ŝarĝo. Senti ion, kiel ŝarĝon pezan. Forŝovi/deskui de si la ŝarĝon (se libérer d'une charge). \* Preni sur sin la moralan ŝarĝon de la afero. Ricevi honoran ŝarĝon (une charge honorifique). \* Esti ĝena ŝarĝo por ĉiuj. \* Ĉiu havas sian ŝarĝon (soucis).

**CHARITÉ** (BONKORECO) \* Amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara (charité bien ordonnée commence par soi-même).

**CHARMANT** (ĈARMA) \* Kiel ĉarma estas vi! Kiel bone kaj ĉarme estas, se fratoj vivas kune. \* Ĉio sia estas plej ĉarma. \* Kiele junulo povus kontraŭstari al la ĉarmoj de malĉastulino? (comment un jeune homme pourrait-il résister aux charmes d'une prostituée?).

**CHARRETTE** (ĈARO) \* Kvina rado ĉe veturado (la cinquième roue de la charrette).

200. **CHARRUE** (PLUGILO) \* Ne jungu la boyon malantaŭ la plugilo (= ne iru la fadeno antaŭ la kudrilo) (il ne faut pas mettre la charrue devant/avant les boeufs).

**CHASSER** (ĈASI. PELI) \* Kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun (il ne faut pas courir deux lièvres à la fois). \* Elpeli iun kiel favan hundon (chasser qq. comme un chien galeux).

**CHAT** (KATO) \* Kato : miaŭas, ĝibigas la dorson, kraĉospiras, ŝpinas (= "ronronas"), faras velurpiedon, buliĝas. Ne karesu la katon kuspe (= kontraŭ la haroj) (à rebrousse-poil). Fali plandalsube kiel kato (retomber sur ses pieds).

\* Vivi kun iu, kiel hundo kun kato. \* Kiam kato promenas, la musoj festenas (quand le chat n'est pas là, les souris dansent). \* Brogito eĉ sur akvon blovas (chat échaudé...) \* Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas (la nuit tous les chats sont gris) \* Ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas (il ne faut pas réveiller le chat qui dort).

**CHÂTEAU** (KASTELO) \* Konstrui aerajn kastelojn

(châteaux en Espagne).

**CHAUD** (V. CHALEUR).

**CHAUSSURE** (ŜUO) \* Reenŝuigi siajn piedojn (remettre ses chaussures) (laŭ Beaucaire) \* Havi, porti ŝuojn sur la piedoj (avoir des chaussures aux pieds) \* Enigi siajn piedojn en ŝuojn (mettre ses chaussures) (laŭ Delcourt). \* Tiuj ŝuoj ne eltenas la akvon (prennent l'eau). \* Farigi al si ŝuojn laŭmezure (se faire faire des chaussures sur mesure). KD 64/14.15.

**CHEMIN** (VOJO) \* Montri al iu vojdirekton (= orienti iun pri la vojo) (montrer le chemin à qq.). Tio estas la sola vojo. Vojo rekta estas plej mallonga (la ligne droite est le plus court chemin d'un point à un autre). Serĉi la vojon. La vojo estas libera. Trovi la ĝustan/bonan vojon. Pli bone estas reiri ol perdi la vojon. Devii de la ĝusta vojo. Iri dorsdirekten (rebrousser chemin). \* Ni povas per kurba vojo al rekta celo veni (tous les chemins mènent à Rome). \* Iri laŭ la vojo de la justo (suivre le droit chemin).

**CHEMINÉE** (KAMENO) \* Kamentubo kiu tiras malbone.

**CHEMISE** (ĈEMIZO) \* Esti en nura ĉemizo. Esti en siaj ĉemizmanikoj (être en manches de chemise). \* Li fordonus ĉion sian ĝis lasta ĉemizo (il donnerait tout jusqu'à sa dernière chemise). \* Kuspe faldi manikojn (retrousser les manches). \* Li zorgas pri ĝi, kiel pri neĝo pasintjara (il s'en soucie comme de sa première chemise).

**CHERCHER** (SERĈI) \* Serĉi ion en ĉiuj anguloj (dans tous les coins) \* Serĉi kudrilon en fojnstako (chercher une aiguille dans un tas de foin). Serĉu, vi trovos. \* Oni plu serĉas, kion li diris, kiam li finis paroli (on cherche ce qu'il dit après qu'il a parlé). \* Serĉi tuberon sur junko (chercher la petite bête). \* Sendi venigi la kuraciston (envoyer chercher le médecin).

210. **CHEVAL** (ĈEVALO) \* Ĉevalo : henas, baŭmas, kalcitras, stamfas, karakolas, kapriolas (hennit, se cabre, rue, piaffe, caracole, gambade). Ĝi trovas, galopas, amblas (aller l'amble).

Ĉevalo : beja, piga (bai, pie). Konduki ĉevalon per la kolbrido. Lasi al ĉevalo la bridon sur la



kolo. Instigi ĉevalon per vipo. Fali de ĉevalo.  
\* Al ĉevalo donacita oni ne esploras la dentojn  
(ne pas faire la fine bouche).

**CHEVEU** (HARO) \* Dissplitigi harojn (couper des cheveux en quatre) (= harfendado) \* Ili kaptis unu la alian je la haroj (se sont crépé le chignon).  
\* Lia vivo pendas de hareto (ne tient qu'à un cheveu/fil).

**CHEZ-SOI** (HEJME) \* Sentu vin kiel hejme (soyez comme chez vous). \* Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme (on est bien partout, mais encore mieux chez soi).

**CHIEN** (HUNDO) \* Alkateni hundon al la pordo. Elĉenigita hundo. Eduki hundon. Martirigi hundon. Hundo kun stumpa vosto. \* Hundo foriras subtirante voston (la queue basse). \* Li fajfis por sia hundo. \* Azilo por perditaj hundoj.

Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia (qui veut noyer son chien, l'accuse de la rage). Bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo. Kiu bojas, ne mordas (tous les chiens qui aboient ne mordent pas). Elpeli iun, kiel favan hundon (chasser qq. comme un chien galeux). Hundo bojas, homo vojas (les chiens aboient, la caravane passe). \* Al hundo ja "licas" rigardi episkopon (un chien regarde bien un évêque). \* Hunda vivo (une vie de chien).

**CHIFFRE** (CIFERO) \* Senvalora nulo (un zéro en chiffre) \* Parolantaj ciferoj.

**CHIGNON** (HARTUBERO) (V. CHEVEU).

**CHOISIR** (ELEKTI) \* Elekti inter pluraj ebloj. \* Mi elektis lin, kiel prezidanto (je l'ai choisi en tant que - moi - président). Mi elektis lin kiel prezidanton (lui, président) = mi elektis lin prezidanto (je l'ai "fait" président). \* El du malbonoj pli malgrandan elektu (de deux maux, il faut choisir le moindre).

**CHOSE** (AFERO) (V. AFFAIRE) \* Afero : kuranta, konata, delikata, tute certa. Per kio la afero lin tuŝas? (en quoi est-il concerné?). Tio estas tute alia afero (c'est tout autre chose). Por ĉiu faro estas horo (chaque chose en son temps). Preni la aferon grave al la koro (prendre la chose à coeur). KD 2/1

**CIEL** (ĈIELO) \* Esplori la aspekton de la ĉielo.

\* Se la ĉielo falus sur la teron! \* Movi ĉielon kaj teron (remuer ciel et terre). \* La ĉielo volu, ke... (puisse le ciel). Pro la ĉielo. En la nomo de la ĉielo (au nom du ciel). \* Helpu al vi, vin helpos Di' (aide toi et le ciel t'aidera). \* Ne gutas mielo el ĉielo (V. ALOUETTE).

**CIRCONSTANCE** (CIRKONSTANCO) (V. PERMETTRE)

\* Ĉe tiaj cirkonstancoj / ĉe malfavoraj, neantaŭvideblaj cirkonstancoj (en raison de telles/imprévisibles circ.). Pro diversaj cirk. Pro stranga koincido / Per stranga renkontiĝo de cirk. (par un curieux concours de circ.). Subigi sin al la cirk. (= oni devas sin klini antaŭ la cirk. = akomodiĝi al la cirk.) (se soumettre, se plier, s'adapter aux circ.). Tio dependas de pure okazaj cirk. (du plus pur hasard). Per la forto de cirk. Tiu cirkonstanco ĵetas plenan lumon sur la aferon. Raporti pri ĉiuj cirk. Mildiga/malpraviga cirk. (circ. atténuante). **CIRCONVENIR** \* Lasi sin kapti per lertaj vortoj/ per flatoj (se laisser circonvenir par de belles paroles).

**CLAIR** (KLARA) \* Klara kiel la suno (clair comme le jour). Klara kiel kelo nokte (ironiquement : clair comme dans un tunnel). Havi klaran ideon pri io (être au clair). \* Klare akcenti la vortojn. Ne klare komprenebla. Estas sufiĉe lume, por ke oni povu ĉion klare distingi.

**CLASSE** (KLASO) \* En la kioma klaso vi estas? (en quelle classe êtes-vous?).

**CLÉ** (ŜLOSILO) \* Esti la ŝlosilo/ la solvo de io. Trovi la ŝlosilon de problemo.

**CLOCHE** (SONORILO) \* Kiu aŭdis la unuan, aŭdu ankaŭ la duan (qui n'entend qu'une cloche n'entend qu'un son).

**CLOU** (NAJLO) \* Unu najlo alian elpuŝas (= oni elbatas kojnon per kojno) (un clou chasse l'autre).

**COCHON** \* Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn (jeter des perles aux cochons/pourceaux).

**COEUR** (KORO) \* Koro : bona, pura, milda ; kruda, sensenta. \* Koron : fendi, malpezigi, malŝarĝi fendi, rompi, ŝiri, trabori. \* Lia koro mildiĝas, jubilas, tremas, sangas ; flamas, ardas, kunpremiĝas. \* El la tuta koro : ami, ĝoji, labori. Senkore konduiti.

Ami plej kore. \* Havi la koron libera (le coeur léger). Elverŝi, nudigi sian koron (s'épancher). Mia koro neniel emas al rido (je n'ai pas le coeur à rire). Preni la aferon grave al la koro (prendre la chose à coeur). Gardi ion sur la koro (avoir qqc. sur le coeur). Penetri ĝis la koro de la temo (au coeur du sujet).

\* For de la okuloj, for de la koro. \* Fari ion pli ĝeme ol eme (plus à contre-coeur que de bon gré). \* Kuraĝo ĉion atingas (à coeur vaillant, rien d'impossible). \* Fari fieran mienon al ludo mizera (faire contre mauvaise fortune bon coeur).  
KD 30/14.

**COLÈRE** (KOLERO) \* Kolero : neretenebla, senbrida, elĉenigita; retenata, justa. \* Li ne havas kaŭzon por kolero. Elverŝi sur iun la ardon de sia kolero (donner libre cours à sa colère). Kvietiĝis lia kolero (il s'est calmé). Li bridis sian koleron. \* Kolero estas miskonsilo (la colère est mauvaise conseillère). KD 26/6...

230. **COMÉDIE** (KOMEDIO) \* Ne komediu! (= ne faru scenojn) (ne joue pas la comédie!).

**COMME** (KIEL. ĈAR. KIOM. SAME KIEL)

\* Ĉar ŝi alvenos morgaŭ, mi devas prepari ĉambron por ŝi (comme elle arrive demain,...). Ĉar vi estas servema, mi faros al vi donacon (comme vous êtes serviable, je...).

\* Mi elektis lin kiel prezidanton (je l'ai choisi comme/pour président).

\* La uzado de la artikolo en Esperanto estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj (est comme dans les autres langues).

\* Kiom mi konas miajn infanojn, ili sukcesos (comme je connais mes enfants, ils réussiront).

**COMPARAISON** (KOMPARO) \* En komparo kun sia filino, ŝi estas milda (si on la compare à sa fille, elle a un caractère doux). \* Komparo ne estas pruvo (comparaison n'est pas raison).

**COMPLICE** (KOMPLICO) \* Komplici kun iu (= kune kuiru la kaŭzon kun iu) (être complice de qq.). Denunci siajn komplicojn. Pruvi ies komplicecon.

**COMPLIQUÉ** (KOMPLIKA) \* La afero estas pli komplika, ol ke ni povus ĝin aranĝi per turno de la mano (la chose est trop compliquée pour

qu'on puisse l'arranger d'un tour de main).

**COMPRÉHENSIF** (KOMPRENEMA) \* Rigardi la aferojn kun pli kompatema okulo (regarder les choses d'un oeil plus compréhensif/compatissant).

**COMPRENDRE** (KOMPRENI) \* Absolute nenion kompreni. Bone komprenigi ion al iu. Esti mem-komprenebla/komprenebla per si mem (ça va de soi). Kion vi komprenas sub tio ĉi?(que comprenez-vous par là?). Kompreni la gravecon de io.

\* Ne kompreni ŝercon (ne pas comprendre la plaisanterie). \* Facile komprenas ĉiu, kiu nur deziras kompreni (comprend, celui qui veut bien comprendre) ou, inversement : il n'a a pire sourd...

**COMPTER** (KALKULI) \* Kalkuli : laŭ la fingroj, en la kapo, mense, pense; ĝuste, erare. Laŭ proksimumaj kalkuloj (à première vue, approximativement). Se kalkuli vaste (en comptant large). Preni en kalkulon (prendre en compte). Tio estas ekster kalkulo. \* Mi kalkulas pri vi por helpi lin. Malamiko kun kiu oni devas kalkuli. Ni devas kalkuli kun la kutimo. \* Bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj (les bons comptes font les bons amis).

**CONCERNER** (KONCERNI) \* Tio ne koncernas min. Min ne tuŝas la afero. Per kio la afero lin tuŝas? Senti sin aludita de io (se sentir concerné). Koncerne min (en ce qui me concerne).

**CONCLUSION** (KONKLUDO) \* Veni al la konkludo. Ĉerpi/tiri konkludon.

**CONCOURS** (KONKURSO) \* La interesatoj en la konkurso sin turnu al... (ceux qui sont intéressés par ce concours doivent s'adresser à...).

240. **CONDAMNER** (KONDAMNI) \* Ne aŭskultinte, ne kondamnu (ne condamnez pas à l'aveuglette).

**CONDITION** (KONDIĈO) \* Necesa kaj sufiĉa kondiĉo \* Meti al io la kondiĉon, ke ...u (je mets une condition, c'est que...) \* Fari el io la unuan kondiĉon de io (la première condition pour cela, c'est...)

\* Plenumi la kondiĉojn postulatajn por konkurso (remplir les conditions de l'examen). \* Esti en bonaj/mizeraĵ kondiĉoj, por efike labori./ \* Mi venos, kondiĉe ke la vetero estos bela (= se la vetero estos). Mi pardonos, kondiĉe ke vi neniam plu konduku tiel malbone (= sed ne plu konduku tiel...).

**CONDUITE (KONDUTO)** \* Indigniga konduto (une conduite révoltante). Sengena konduto. Enigme, senkore, mistere konduti. Ĉu tio estas la konduto de honesta edzo? Kiam vi kondutos, kiel decas al bone edukita fraŭlino? Atendi rekompencan por sia bona konduto.

**CONFIANCE (KONFIDO)** \* Konfido naskas konfidon. Mi montros min inda je via konfido (digne de votre confiance). Meti sian konfidon en iun. Trompi/misuzi ies konfidon. Perdi ies konfidon.

\* Blinde fidi al iu (avoir une confiance aveugle en qq.).

**CONFIDENCE (KONFIDENCO)** \* Fari al iu konfidencojn. Se diri konfidence, mi... (parlant en confidence/en toute confidence, je...).

**CONNAÎTRE (KONI)** \* Koni ion ĝisfunde (à fond). Konu vin mem (connais toi toi-même). Mi konas vin pli bone, ol vi mem vin konas (mieux que ce que vous vous connaissez). Koni iun laŭnome. Fari la konon de iu (la connaissance de qq.). Konatiĝi kun iu (faire connaissance de qq.).

\* Kiom mi konas miajn infanojn, ili sukcesos (comme je connais mes enfants, ils réussiront). \* Mi konas lin tiel longan tempon, kian povas ampleksi mia memoro (je le connais d'aussi loin que ma mémoire puisse se souvenir). \* Fari sin tute nerekonobla.

\* Oni konas lin, kiel blankan lupon (il est connu comme le loup blanc). \* Kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalias (comme on connaît ses saints, on les honore). \* Kia arbo, tia frukto (c'est au fruit qu'on connaît l'arbre).

**CONSCIENCE (KONSCIENCO. KONSCIO)** \* Havi puran, trankvilan, senmakulan konsciencan. Havi sian konsciencan en ordo. La konscienco lin ne turmentas (avoir une conscience élastique). Ne fari el io problemon de konscienco. Obei sian konsciencan. Io peze kuŝas sur lia konscienco (= io ŝarĝas lian k.) (il a qqc. sur la conscience).

\* Decidi laŭ sia konscienco. Agu ĉiam tiel, kiel diktas al vi via konscienco (faites ce que vous commande votre conscience). \* Li havas konsciencan ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos (il a pleine conscience que ses efforts porteront un jour leur fruit). \* Konscii pri sekvaĵoj/konsekvencoj

de io. Koscii pri sia senkapableco (avoir conscience de son incapacité).

**CONSEIL (KONSILO)** \* Konsilo : senefika, superflua, senutila, vana. \* Konsilon : peti, sekvi, observi, donadi, forĵeti, akcepti, fidi. \* Tiri profiton el ies konsilo. Kion utilas konsilo se ne aplikata. \* Dormo donas konsilon (la nuit porte conseil). \* Sonorilo vokas al preĝejo, sed mem neniam eniras (les conseillers ne sont pas les payeurs).

**CONSENTIR (KONSENTI)** \* Silento estas konsento (qui ne dit mot consent).

**CONSEQUENCE (KONSEKVENCO)** \* Pesi, konsideri la sekvojn, la konsekvencojn de io. Koscii pri la konsekvencoj de io. Antaŭe nevideblaj konsekvencoj. Tio havos por konsekvenco...

250. **CONSIDÉRER (KONSIDERI)** \* Post longa konsidero. \* Konsideri ion laŭ ties plej bona flanko \* Ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras la aferon.

**CONSOLATION (KONSOLO)** \* Ĉerpi konsolon el preĝo.

**CONSTRUIRE (KONSTRUI)** \* Konstrui sur sablo/sur roko.

**CONTENTER (KONTENTIGI)** \* Kontentigi la katon kaj kune la raton (on ne saurait contenter tout le monde et son père) \* Kontentigi per malmulto/nemulto.

**CONTRADICTION (KONTRAŬDIRO)** \* Barakti en kontraŭdiroj (être en proie à des contradictions). \* Ne toleri kontraŭdiron (ne pas supporter la contradiction) \* Veni en kontraŭecon kun si mem (se mettre en contradiction avec soi).

**CONTRAIRE (KONTRAŬO)** \* Rekte la malo de tio, kion vi deziris (exactement le contraire). \* Konvinkiĝi pri la kontraŭo (être convaincu du contraire). Aseri la kontraŭon/la malon de io. \* Eĉ tute kontraŭe (c'est tout le contraire).

**CONTRE (KONTRAŬ)** \* Kiu ne estas kun mi, tiu estas kontraŭ mi (celui qui n'est pas avec moi est contre moi).

**CONTRÔLE (KONTRŬOLO)** \* Perdi la estrecon de si mem (perdre le contrôle de soi).

**CONVERSATION (KONVERSACIO)** \* Vigla, gaja konversacio. \* Teni konversacion. Sin enmiksi en konversacion. Ŝanĝi la temon de konversacio

(= salti de unu temo al la alia) (passer d'un sujet à l'autre = du coq à l'âne) \* Fariĝi objekto/temo de babilado, / de klaĉo (de cancans). KD 49/1... (150 expressions)

**CONVICTION** (KONVINKO) \* Rokofirma konvinko. Mi venis al la firma konvinko, ke... Tuŝu la religiajn konvinkojn de neniu \* Nekonvinkebla ŝtipkapulo (quelle bûche).

260. **COQ** (KOKO) \* Koko kokerikas (kokeriko!) \* Vivi kiel kuko en butero (être comme un coq en pâte) \* Saltadi el unua al deka (sauter du coq à l'âne).

**CORDE** (ŜNURO) \* Meti jugon sur sian kolon (se mettre la corde au cou) \* Havi du ŝnurojn al sia arko (deux cordes à son arc) \* En dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu (parler de corde dans la maison d'un pendu).

**CORDONNIER** (ŜUISTO) \* Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truoj (les cordonniers sont toujours les plus mal chaussés).

**CORNE** (KORNO) \* Preni la bovon per la kornoj (le taureau par les cornes).

**CORPS** (KORPO) \* Sana menso en sana korpo (une âme saine...) \* Kapti iun ĉirkaŭ la trunko (à bras le corps) \* Perei/droni kun homoj kaj varoj (= kun homoj kaj musoj) (périr corps et biens) \* Klopodi sen limo per korpo kaj animo (se donner corps et âme).

**CORRESPONDANCE** \* Neglekti sian korespondaĵon.

**CORRESPONDRE** \* La fortoj ne ĉiam respondas al la kuraĝo (et non : "korespondas"! (V. CALENDRIER)

**CÔTE** (DEKLIVO) \* Delikata deklivo (pente douce). Supreniri deklivon.

**CÔTÉ** (FLANKO) \* Paŝi flanko ĉe flanko. Stari ĉe la flanko de iu. Turni sin aliflanken/ al alia flanko. \* Tio estas lia malforta flanko (son point faible). Konsideri ion laŭ ties plej bona flanko (envisager qq. par le bon côté). Lasi flanke la demandon pri ... (laisser de côté la question de...).

**COU** (KOLO) \* Fali sur la kolon de iu (= ĵeti sin sur la kolon de iu) (sauter au cou de qq.) \* Riski sian kolon/haŭton. Rompi al si la kolon (se casser le cou). Kapti iun je la kolo/nuko (mettre la main au collet de qq.) \* Meti jugon sur sian kolon (se mettre la corde au cou) \* Preni la piedojn

en la manojn (= kuri senbride) (prendre ses jambes à son cou). \* Sidi ĝiskole en peĉo (être dans la purée jusqu'au cou) (peĉo = poix).

270. **COUCHER** (KUŜI) \* Kiel oni sternas, tiel oni dormas (Comme on fait son lit, on se couche) (sous-entendu : kiel oni sternas la tukojn).

**COUDE** (KUBUTO) \* Sin apogi sur la kubuto. Puŝi iun per kubuto. \* Bori al si vojon per kubuto (se frayer un chemin en jouant des coudes) \* Lukti/agi ŝultro ĉe ŝultro (lutter coude à coude).

**COUDÉE** \* Havi plenan liberecon de agado (avoir les coudées franches/carte blanche).

**COULEUR** (KOLORO) \* Koloro : gaja, viva, vigla, okulofenda (qui jure), kria, tranĉa, kruda. \* Pentri ion per vivaj koloroj. La sep koloroj de ĉielarko. \* Kiom da homoj, tiom da gustoj (des goûts et des couleurs il ne faut pas disputer).

**COULPE** \* Pente bati la bruston (battre sa coulpe).

**COUP** (BATO) \* Pluvigi batojn sur ies dorson (les coups tombent dru). Oni regalas lin per batoj (rouer de coups). Meriti bastonbatojn. Doni al iu piedon en la postajo (des coups de pied au c.) \* Rebati ekbaton (rendre les coups) \* La batoj de la sorto. \* Doni al iu la finofaran baton (le coup de grâce).

\* Li kovas friponaĵon (il mijote un mauvais coup). Troviĝi sub valido de iu paragrafo (de la leĝo) (être sous le coup d'un article de loi). \* Frakasi vazon en koleratako (brisé un vase sous un coup de colère/accès de colère).

**COUPABLE** (KULPULO) \* Ne ĉiu akuzito estas kulpulo (un prévenu n'est pas forcément coupable).

**COUPE** (POKALO) \* La glaso superpleniĝas (la coupe est pleine) \* De parolo ĝis faro estas tre malproksime (= inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi) (entre dire et faire il y a un monde = il y a loin de la coupe aux lèvres).

**COUR** \* Esti en favoro ĉe la princo. Sidi varme en ies favoro (être bien en cour).

**COURAGE** (KURAĜO) \* Perdi, repreni kuraĝon. Kolekti sian kuraĝon. Distingiĝi per kuraĝo. Inspiri kuraĝon al iu. Verŝi kuraĝon en ies koron. Kuraĝo ĉion atingas. KD 42/9

280. **COURIR** (KURI) \* Kuri senbride, kiel rabia (= preni la piedojn en la manojn) (courir comme



un enragé, un dératé). Kuri ĝis perdo de la spiro. Kuri apenaŭ tuŝante la teron (il vole!) \* Premio por plej rapida kurado.

**COURS** \* Fari, gvidi, viziti kurson de Esperanto. \* Lasi liberan flugon/kuron al sia fantazio (donner libre cours à sa fantaisie).

**COUTEAU** (TRANĈILO) \* La tranĉilo estas metita al li sur la gorĝon (il a le couteau sous la gorge).

**COÛTER** (KOSTI) \* Kostu kiom ĝi kostos, mi... (= je kia ajn kosto) (ça coûtera ce que ça coûtera, mais je...).

**COUTUME** (KUTIMO) \* Revigligi malnovajn kutimojn (faire revivre...).

**COUTURE** \* Ebenigi la kudrojn de jako (aplatir les coutures d'une veste).

**COUVERTURE** (KOVRILO) \* Eltiri la tapiŝon el sub iu (tirer la couverture à soi).

**CRAINdre** (TIMI) \* Timi iun/ion kiel fajron. Treme timi iun (avoir une peur bleue de qq.). Mi timas, ke oni vin aŭskultas.

**CRASSE** (MALPURO) \* Esti gliuĝema de malpuro (être collant de crasse).

**CREUSER** (FOSI) \* Li fosas al si mem tombon (il creuse sa propre tombe).

290. **CREVER** (KREVI) \* Krevi kiel sapveziko (comme une bulle de savon).

**CRIER** (KRII) \* Oreltranĉa/orelŝira krio (un cri déchirant). \* Krii el la tuta gorĝo/ Kriegi ĝis raukiĝo (crier à en devenir rauque). Kriegi kvazaŭ oni lin tranĉus (comme si on l'assassinait). Hurli kiel ŝakalo \* Lasu ilin krii, kion ili volas \* Inter lupoj krii lupe (hurler avec les loups).

**CRITIQUE** (KRITIKO) \* Gala, amara, malsolida, pozitiva kritiko (amère, inconsistante, positive). La kritiko trafis sian adreson (la critique a atteint son but) \* Akcepti senkritike ĉion, kion diras la gazeto \* Kritika spirito ne akceptas aserton sen informo pri ĝia origino kaj valoro (un esprit critique n'accepte pas...) \* Kritiki estas facile, fari malfacile (la critique est aisée mais l'art est difficile) \* Ne kritiku onin, ĉar oni povas ankaŭ vin kritiki (ne critiquez pas les autres si vous ne voulez pas l'être vous-même).

**CROC-EN-JAMBE** \* Faligi iun krurfalĉe = krurfalĉi iun.

**CROIRE (KREDI)** \* Kredi ion kun grandaj rezervoj (fidi nur la proprajn okulojn). Nekredema Tomaso. Blinde kredi al iu. Ne kredu al li eĉ unu silabon (n'en croyez pas un traître mot). Li absolute ne volas kredi, ke... Kredi eĉ la plej nekredoblajn aferojn (les choses les plus invraisemblables). KD 52/4 \* Ne kredi al siaj oreloj/ al siaj okuloj (Ne pas en croire ses oreilles, ses yeux). \* Hipokriti kredon, kiun oni ne havas (être un peu tartuffe).  
**CROISER** \* Rompi lancon kun iu (= polemiki) (croiser le fer).

**CROIX (KRŪCO)** \* Fari al si la signon de kruco.

**CRUCHE (KRUĈO)** \* Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis fine ĝi rompiĝas (tant va la cruche à l'eau, qu'à la fin elle se casse).

**CULPABILITÉ (KULPECO)** (V. COUPABLE)

\* Konstati ies kulpecon. Lia kulpeco ne plu estas duba. Ĵeti la dubon sur iun. KD 24/20...

**CURIOSITÉ (SCIVOLO)** \* Veki la scivolemon. Kontentigi/satigi la scivolon de iu. Nesatigebla, nekvietigebla sciavido (insatiable désir de savoir).

Bruli de scivolo.

## D

300.**DANGER (DANĜERO)** \* Danĝero minacas, pendas super iu. Averti iun pri danĝero. Kuri en danĝeron/ en sian pereon. Defii danĝeron. Fali en danĝeron. Kuraĝe fronti, spiti, alfronti danĝeron. Esti absolute ekster danĝero. Esti en ekstrema, morta danĝero. Publika danĝero.

**DANSER (DANCI)** \* Ŝiaj plandoj jukas de dancemo (la danse la démange). Akceli la kadencon de danco. \* Li ne scias sur kiun piedon stariĝi (il ne sait sur quel pied danser). \* V. CHAT.

**DATE (DATO)** \* Kiun tagon de la semajno ni havas hodiaŭ? (quel est le jour de la semaine aujourd'hui?). Kiun daton ni havas hodiaŭ? (quelle date est-ce aujourd'hui?). Pasko ĉi-jare falas en Marton (Pâques tombe en Mars, cette année). Tiu modo datiĝas jam de ok jaroj.

**DÉ (KUBO)** \* La kubo estas jam ĵetitaj (les dés sont jetés = le sort en est jeté = alea jacta est). \* Feliĉa ĵeto (joli coup de dés).

**DÉBATTRE (BARAKTI)** \* Barakti kiel fiŝo ekster

la akvo (se débattre comme un beau diable). Barakti en financa embaraso.

**DÉBAUCHER** (DELOGI) \* Delogi iun. Forlogi iun al vojo malbona (entraîner qq. dans une mauvaise voie).

**DÉBROUILLER** (ELTURNIĜI) \* Li ĉiam trovas eblon por elturniĝi (il trouve toujours moyen de se débrouiller).

**DÉBUT** (KOMENCO) \* Ĉiu komenco estas malfacila.

**DÉCIDER** (DECIDI) \* Firma, saĝa decido \* Estis decidite, ke... \* Decidi laŭ sia konscienco, laŭ la okazintaĵoj (suisant les évènements). Translasi la decidon al la sorto \* Rezervi al si la rajton pri decido. Venigi iun al decido. Ŝanĝi sian decidon. Tre malfacile atingita decido. Decido graveda je gravaj sekvoj (lourde de conséquences). Tiu argumento multe pezis sur mia decido.

**DÉCOUVRIR** (MALKOVRI) \* Li malkovris la malkovritan Amerikon! (il croit découvrir l'Amérique).

310. **DÉDAIGNER** \* Malatenti la riproĉojn, la kritikojn.

**DÉFAUT** \* Manke de pli bona (à défaut de mieux) \* Propran ĝibon neniu vidas. (personne ne voit ses défauts).

**DÉFENDABLE** \* El teoria vidpunkto tio estas pravigebla (du point de vue théorique c'est défendable)

**DÉFENSE** (DEFENDO) \* Preventa defendo \* Plej bona defendo estas atako.

**DÉFENSIVE** (DEFENSIVO) \* Sin teni je la defensivo.

**DÉFRAYER** \* Fariĝi objekto de temo/klaĉo (défrayer la conversation, la chronique).

**DEHORS!** \* Pafiĝu for! Ekspedu vin for! (fichez-moi le camp!)

**DÉLIT** (DELIKTO) \* Kapti ĉe l' freŝa faro (prendre en flagrant délit).

**DÉLUGE** (DILUVO) \* Post mi la diluvo! Post mia malapero renversiĝu la tero.

**DEMAIN** (MORGAŬ) \* Neniu scias kio morgaŭ lin trafos (personne ne sait de quoi demain sera fait).

320. **DEMANDER** (PETI. DEMANDI) \* Prema, insista peto. Peti konsilon, pardonon.

\* Demandu lin, kiu li estas (demandez lui qui il est). Mi min demandas, ĉu... (je me demande si...) \* Direkti sian peton al iu. Esti surda al ies

peto (faire le sourd).

**DENT** (DENTO) \* Li jam faligis la laktodentojn \* Liaj dentoj klakas. Grincigi la dentojn \* Kunpremi la dentojn (serrer les dents) \* Montradi minace la dentojn. Armita ĝis la dentoj \* Liaj dentoj rompiĝis sur tio (il s'y est cassé les dents).

\* Murmuri tra la dentoj.

**DÉPENDRE** (DEPENDI) \* Ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras la aferon (tout dépend de la façon d'envisager la chose).

**DÉPENS** \* Lerni el propra damaĝo (apprendre à ses dépens).

**DÉPENSE** (ELSPEZO) (V. DETTE) \* Preni sur sin la elspezojn. Kontribui al la elspezoj. Centfoje turni kaj returni la monon antaŭ elspezo. Mono por kovri la kurantajn elspezojn \* Li timis devontigi sin al pagado de grandaj sumoj (il ne voulait pas s'engager à de grandes dépenses).

**DÉPENSIER** \* Li havas truon en la manplato (il a les mains trouées). La mano lin jukas (la main le démange). El lia mano ĉiu monero elglitas (toute pièce glisse de sa main).

**DERNIER** (LASTA) \* Havi la lastan vorton en diskuto. Ĉu tio estas via lasta prezo? Tio estis la lasta afero por fari (c'était bien dernière chose à faire) \* Plej bone ridas, kiu laste ridas (rira bien qui rira le dernier).

**DÉSERT** (DEZERTO) \* Prediki en dezerto. Voĉo krianta en la dezerto.

**DÉSESPOIR** (MALESPERO) \* Malespera krio. Peli iun en senesperecon (pousser qq. au désespoir). Enfali en malesperon. Droni en senespereco. Estas nenia motivo por malesperi. Malesperi pri la homaro.

**DÉSIR** (DEZIRO) \* Deziro : varmega, plenumita, pia (chaud, accompli, pieux). Deziri : ripozi, legi, kuri. Deziri al iu ĉion bonan (désirer du bien à qq.). Kion vi povas pli deziri? Ĉio iris laŭ lia deziro. Lia deziro por mi estas ordono (ses désirs sont des ordres). \* Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro.

\* Estus dezirinde, ke...(il serait à souhaiter que...)

330. **DESTIN** (SORTO) \* Ĉiu forĝas sian sorton (chacun forge son destin).

**DÉTAIL** (DETALO) \* Droni en detaloj. Prilumi la detalojn. Preterlasi la detalojn. Kun la pleja detaleco (avec la plus grande minutie). Konsideradi ion ĝis la plej etaj detaloj (jusqu'aux moindres détails)

**DETTE** (ŜULDO) \* Ŝarĝi sin per ŝuldoj (contracter des dettes). Sidi en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj/la oreloj. Droni en ŝuldoj. Amasigi ŝuldon sur ŝuldon. Konfesi ŝuldon (reconnaître). Liberigi/malŝarĝi iun de liaj ŝuldoj. Preni ŝuldon sur sin (prendre à son compte). \* Riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniuj (qui paie ses dettes, s'enrichit).

**DEUIL** (FUNEBRO) \* Ĵeti iun en funebro (endeuiller par ex : toute une famille). Sin izoli en sia funebro. Li funebras iun (en deuil de qq.). Survesti funebro (porter le deuil).

**DEUX** Certe, kiel duoble du kvar \* Du botoj faras paron (= el du unuj unu paro). \* Neniam aliaj povas fariĝi pli feliĉaj, ol ni ambaŭ (jamais personne d'autre ne peut devenir plus heureux que nous deux). Ambaŭ kune vivi ni ne povas (il n'est pas possible que nous puissions vivre tous les deux ensemble).

**DEVENIR** (FARIĜI) \* Kio fariĝis el vi? (qu'êtes-vous devenu?). Mi ne scias, kio fariĝos el mi (ce qu'il adviendra de moi). Fariĝu, kio volas (= Okazu, kio okazos!) (advienne que pourra!).

**DEVOIR** (DEVO) \* Plenumi sian devon (accomplir). Havi plenumotajn devojn. Kalkuli ion kiel devon (considérer qqc. comme un devoir). Neglekti siajn devojn (négliger). Havi rigidan koncepton de siaj devoj. Oni parolas pli ofte pri siaj rajtoj ol pri siaj devoj.

**DEVOIR** (ŜULDI) (V. DÉPENSE) \* Mi ŝuldas al vi grandan dankon! Mi ne volas esti ies morala ŝuldanto (je ne veux pas avoir de dette morale envers qui que ce soit).

\* Vi ŝuldas al mi tri mil frankojn, kiun sumon vi pagu je la unua postulo (Vous me devez une somme de 3000 F, laquelle (somme) vous devrez payer dès que je l'exigerai).

**DIABLE** (DIABLO) \* Diable! Al ĉiuj diabloj! Mil diabloj! Barakti kiel fiŝo ekster la akvo (= kurbiĝadi kiel diablo en akvo benita) (se débattre comme un beau diable : comme un diable dans un bénitier).

Eĉ la diablo ne kunportos lin! (même le diable n'en voudra pas). La diablo vin prenu! (que le diable vous emporte!). Fordoni sian animon al la diablo (abandonner son âme au diable). La tero min glutu, se mi mensogas (que le diable m'emporte si je mens). Li altirus por helpo la sanktulojn el la ĉielo (il ferait appel au diable). Ne voku la diablon, ĉar li povas aperi. Kien diablo ne povas (iri), tien virinon li ŝovas (pousse).

**DIEU (DIO) \*** La solsola vera Dio. Dio volus, ke... (puisse Dieu vouloir que...). Dio helpu nin (que Dieu nous aide). Dio nin gardu. La dia volo plenumiĝu (que la volonté de Dieu soit faite). Kontraŭ volo de Dio helpas nenio (la volonté de Dieu est plus forte que tout). Dio lin mizerikordu/indulgu lian animon (que Dieu lui pardonne). Al homo pekinta senintence Dio facile pardonas. Dio kreis la homon laŭ sia bildo (Dieu a fait l'homme à son image). Dio distribuis ĉion egalmezure (à chacun sa part). Ni devas obei Dion prefere ol la homojn (obéir à Dieu plutôt qu'aux hommes). Homo proponas, Dio disponas (L'homme propose, Dieu dispose). Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro kaj al Dio la propraĵon de Dio (Rendez à César ce qui est à César, et à Dieu ce qui est à Dieu)

340. **DIFFÉRENCE (DIFERENCO) \*** Kia estas la diferenco inter...? Ili forte diferencas inter si per la saĝo. Oni devas fari diferencon (= distingi) inter ambaŭ okazoj (les deux cas). La diferenco konsistas en tio, ke... \* Li havas maĝsaman karakteron, ol la mia (un caractère différent du mien).

**DIFFICULTÉ (MALFACILAĴO) \*** Malfacilaĵon/baron/obstaklon oni povas : renkonti, ebenigi (= glatigi) (aplanir), venki. \* Triumfi super ĉiuj obstakloj (triumpher de tous les obstacles). Amasiĝas malfacilaĵoj/baroj/obstakloj nevenkeblaj. Pro dume intermetiĝintaj obstakloj...(à cause de difficultés apparues entre temps). Por forigi ĉiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo (pour se débarrasser de tous les ennuis, il n'y a qu'une façon).

**DIGNITÉ (DIGNO) \*** Havi la senton de sia digno (= konscii pri sia digno). Dignoplena konduto/sinteno (conduite, attitude digne). Gardi sian homan dignon.

Trovi ion ne konvena al sia reputacio. Nia vojo ĉiam devas esti digna kaj rekta (nous devons suivre une voie droite et digne).

**DINDON** (MELEAGRO) \* Ĝi grave sin plenvolas (fait la roue, se pavane).

**DIRE** (DĪRI) \* Havi ion por diri/ion dirotan. Mi devas diri, ke ... Se paroli rekte/klare/sincere (pour parler sincèrement/à dire vrai). Se diri inter ni (soit dit entre nous). Por tiel diri (pour ainsi dire). Se oni povas tiel diri (si on peut dire). Mi ne bezonu diri duafoje! (Et que je n'aie pas besoin de le dire deux fois).

\* Vorto dirita neniam revenas (ce qui est dit est dit). \* De parolo ĝis faro estas tre malproksime (c'est plus facile à dire qu'à faire). KD 49/1...5 (150 expressions).

**DIRECTION** (DIREKTO) \* Al ĉiuj direktoj de la ventorozo. Direkti la rigardon al iu. Direkti la paŝojn ien. Direkti sian parolon. Iru kaj rigardu en la direkto al la maro (en direction de la mer).

\* Ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas (chacun n'en fait qu'à sa tête).

**DISCIPLINE** (DISCIPLINO) \* Ne voli submetiĝi al necesa disciplino. \* Disciplini siajn impulsojn. \* Instrui iun, kiel paŝi rekte (apprendre à qq. à marcher droit).

**DISCORDE** (MALPACO) \* Dissemi malpacon.

**DISCRÉTION** \* Lasi al la arbitro de ... (laisser à la discrétion de ...)

**DISCUSSION** (DISKUTO) \* Diskuto : arda, febra, sterila, teoria, sensenca, senperspektiva. Proponi ion por diskuto. Esti objekto de diskuto. Pliakrigi la diskuton. Diskuti kun fajro. Diskuti la "por" kaj "kontraŭ". Tio estas tre diskutebla aserto. Havi la lastan vorton en diskuto. Finfine la tuta malkonsento reduktiĝas al diskuto pri senco de unu vorto. Teoria diskuto kondukos al nenio. Min atingis kelkaj eĥoj de la ĵusaj diskutoj (j'ai eu quelques échos des toutes récentes discussions). KD 29/10.

350. **DISPARAÎTRE** (MALAPERI) \* Malaperi senspure/ ne lasante spurojn (sans laisser de trace). Malaperi kiel vaporo/ forvaporigi/ malaperi fulmorapide (comme par enchantement).

**DISPOSITION (DISPONO)** \* Esti/stari je ies dispono. Meti ion sub ies dispono (à la disposition de qq.). Ĉio estas sub via dispono. \* Havi rajton disponi pri sia propra persono. Havi la liberan disponon pri io. \* Disponu pri mi, kiel pri via servanto. \* Li disponas pri vivo kaj morto (il dispose de la vie ou de la mort de qq.).

**DISPUTE (DISPUTO)** \* Naski disputon (kvereli, konflikti). Varmega, impeta disputo pri io/iu. Pliakrigi la disputon. Sin miksi en malpropran disputon (dans une discussion qui ne vous concerne pas). Disputo kaŭzita de simpla miskompreno. Enverŝi oleon en la fajron (mettre de l'huile sur le feu) (= inciti ardon de la disputantoj). Kvietigi kverelon/disputon.

**DISTANCE (DISTANCO)** \* Je kelkpaŝa distanco. Je distanco de unu salto. Je unuhora distanco. Je distanco de ĵeto. Ĝis vidlinio/ĝis la rigardo povas atingi.

**DISTINGUER (DISTINGI)** \* Regis tia mallumo, ke oni ne povis multe distingi (il faisait si sombre qu'on ne pouvait pas distinguer grand chose). Estis sufiĉe lume, por ke oni povis ĉion klare distingi (il y avait suffisamment de lumière pour qu'on puisse distinguer clairement).

\* Li ne scias, kiu mano estas la dekstra (il ne sait pas distinguer sa droite de sa gauche).

**DIVISER (DIVIDI)** \* Dividu kaj regu/imperiu (diviser pour régner).

**DIVORCE (DIVORCO)** \* Tio estas kazo de divorco/eksedziĝo.

**DOCTEUR (KURACISTO)** \* Havi la liberan elekton de sia kuracisto (libre choix) \* Mi sendos venigi la kuraciston (je vais envoyer chercher le docteur). \* Provizore bandaĝi ĝis oni povos venigi la kuraciston \* La kuracisto povas nur helpi la naturon. Liaj vortoj trankviligis la malsanulon. Li savis la malsanulon de morto. KD 31/10...15

**DOCUMENT (DOKUMENTO)** \* Ĉerpi dokumentojn el la fonto mem (puiser des documents à la source même).

**DOIGT (FINGRO)** \* Fingro : dika (polekso) (pouce), montra (index), longa, ringa, malgranda \* Klaki per fingroj (claquer des doigts) \* Ĉiu lin montras



per fingro. \* Ne movi eĉ unu fingron. Ne tuŝi ion eĉ fingropinte (ne pas toucher qqc. même du bout des doigts). Nervoze tamburi per fingroj sur tablo. \* Donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas. Alportu al mi ĉerpeton da vino (un doigt de vin). KD 39/10

360. **DONNER** (DONI) \* Doni : konsilon, ekzemplon, helpon, signon de vivo, sian opinion, promeson, tempon por io, okazon ion fari.

\* Pli feliĉa estas donanto ol prenanto (donner est meilleur que recevoir. RENAN). Kiom multe mi donus por tio, ke... (que ne donnerais-je pas pour...). Al ŝi mi donis pli ol dece (plus que cela mérite). \* Oferi sian tempon al Esperanto (donner son temps).

V. Coup de grâce. Parole d'honneur. Boeuf pour un oeuf. Rendez-vous. Entorse à la vérité. Arme contre soi. Corps et âme. A boire.

**DORMIR** (DORMI) (V. SOMMEIL) \* Dormi unuokule, lepore, kiel marmoto, profunde kiel gliro (loir). Dormi ŝtonan dormon (d'un sommeil de plomb).

\* Dormi ĉe malfermitaj fenestroj. Dormi kapo ĉe kapo \* Dormi kaŭre (en chien de fusil) \* Tranokti sub libera ĉielo (à la belle étoile). KD 16

**DOS** (DORSO) \* Fari ion malantaŭ la dorso de iu (dans le dos de qq.) \* Draŝi al iu la dorson (rouer de coups) \* Ataki inside/aldorse de poste (en traître par derrière) \* Abrupte turni al iu la dorson (tourner subitement le dos à qq.) \* Teni sin dorso ĉe dorso (dos à dos) \* Fali dorsen (tomber à la renverse) \* Eksenti froston en la dorso (un froid dans le dos) \* Meti ĉion sur onian dorson (mettre tout sur le dos de ..."on"/ de qq.)

**DOUBLE** (DUOBLO) \* Duoblo aŭ nenio (quitte ou double) \* Vivi duoblan vivon (mener double vie).

**DOUCHE** (DUŜO) \* Efiki kiel frida duŝo (faire l'effet d'une douche froide).

**DOULEUR** (DOLORO) \* Doloro : akra, obtuza (vive, sourde), profunda, neelportebla, neeltenebla, lancina, apenaŭ imagebla. \* En paroksismo de doloro \* Senti doloron en la kapo. \* Kriegi de doloro, kvazaŭ oni lin tranĉus (comme si on l'égorgeait). Subpremi sian doloron. Kvietigi doloron

(calmer). KD 31/1...

\* En doloro vi naskos infanojn (tu enfanteras dans la douleur)

**DOUTE (DUBO)** \* Kaptita, atakita de dubo (pris de doute). Eksenti dubon antaŭ aserto. Mi forte dubas, ĉu troviĝos iu, kiu konsilus solvi la aferon alie (je doute fort qu'il se trouve qq. pour conseiller de trouver une autre solution). Sen ia ombro da dubo. Min turmentas senĉesaj duboj (je suis assailli de doutes constants) \* Eĉ se ni povus atingi interkonsenton, kion mi tre dubas... (ce dont je doute fort) \* Lia kulpeco ne plu estas duba (sa culpabilité ne fait plus de doute).

**DRAP (LITTUKO)** \* Li implikiĝas en malagrablaĵojn (il se met dans de mauvais draps).

**DRESSER (SE)** \* Sin streĉi sur la piedfingroj.

**DROIT (RAJTO)** \* Rajto de aŭtoreco (d'auteur), de popolo pri memdecido/memdispono, de sindefendo (de légitime défense), de unuenaskiteco (d'aïnesse).

\* Akiri civitanecon (droit de cité). \* Rajta postulo (une exigence justifiée).

Rajte plendi. Nenion cedi el sia rajto. Ĵaluza pri siaj rajtoj \* Senigita je ĉiuj civitanaĵoj (privé de tous les droits civils) \* Kiu havas forton, havas rajton (la force prime le droit) \* Havi nenian moralan rajton miksi sin en tiun aferon. Neniu havas rajton dikti al iu siajn postulojn. \* Protesti kontraŭ uzurpado de rajtoj \* Kadukiĝinta rajto (périmé).

....

Instrui iun, kiel paŝi rekte (apprendre à qq. à marcher droit).

370.**DROITE (DEKSTRA)** \* Li ne scias, kiu mano estas la dekstra (il ne sait pas distinguer sa droite de sa gauche).

**DUR** La plej drasta venos lasta (le plus dur n'est pas passé).

**DURER (DAŬRI)** \* Kiel longe daŭros la kunveno?

E

**EAU (AKVO)** \* Abomeni trinki akvon (j'ai l'eau en horreur). \* Alportu al mi ĉerpeton da akvo (apportez moi un doigt d'eau). Ili elĉerpis ĝis la lasta guto de akvo. \* Ili akordas kiel akvo kaj fajro (ils sont comme l'eau et le feu). \* Ĝi estas

akvo al lia muelejo (de l'eau à son moulin).

\* Akvo trankvila estas akvo danĝera (méfiez-vous des eaux dormantes) \* Multa akvo fluos ĝis tiam en la maron/sub la pontoj (il passera/coulera de l'eau sous les ponts). KD 6/1...5

\* Ci tio fluas kiel akvo el fonto (ça coule comme de l'eau de source). \* Brogito eĉ sur (malvarman) akvon blovas (chat échaudé craint l'eau froide).  
**ÉCHEC** (MALŜUKCESO) \* Esti kondamnita al malsukceso. Finiĝi per malsukceso. Plorinda, kompatinda fiasko. Renkonti fiaskon.

**ÉCLAIR** (FULMO) \* Zigzagaj fulmoj. Frapita de fulmo \* Rapida kiel fulmo. Malaperi fulmorapide

**ÉCONOMIE** (ŜPARO) \* Vivi de/el ŝparita mono (vivre de ses économies).

**ÉCOUTER** (AŬSKULTI) (V. OREILLE).

**ÉCRIRE** (SKRIBI) \* Skribi : maldike, grase, per prestipoj, legeble. \* Skribi ĉekon, formularon \* Skribi sub ies diktado. \* Skribo de tia letereto kostos al vi ne pli ol dek minutojn (ne vous prendra pas plus de 10 min.). \* Sur mia nazo ne estas skribite, ĉu mi havas monon (ça ne se lit pas sur mon nez, si je possède de l'argent).

**EFFET** (EFEKTO. EFIKO) \* Kia granda efekto ĝi estus! (quel effet cela ferait). Aspiri sensacian efekton. \* Ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava (à petites causes, grands effets).

380. **EFFORT** \* Leĝo pri minimuma peno. Laŭnatura inklino al malpenado (la loi du moindre effort).

**ÉGAL** \* Li havas neniun egalan al si (il n'a pas son égal) \* Li restas ĉiam egala al si mem (reste toujours égal).

**ÉLANCER** (Ŝ) \* Li pafis sin for. Li pafiĝis for, kiel kuglo (il est parti d'un trait, comme une flèche).

**ÉLÉMENT** (ELEMENTO) \* Furiozado de elementoj. \* Esti en sia elemento.

**ÉLOGE** (LAŬDO) \* Esti inda je laŭdo (digne d'éloges). Avara je laŭdoj. Dronigi iun en laŭdoj (abreuver d'éloges). Incensi iun ĝis sufoko. Lin ebriigis la laŭdoj (ivre d'éloges).

**EMBARRAS** (EMBARASO) \* Esti en granda embaraso. Embarasa situacio. Prezentu al vi mian embarason (représentez-vous) \* Eltiri iun el embaraso. Eliri

sen frakaso el granda embaraso (s'en sortir au mieux) \* Embarasite respondi \* Barakti en financa embaraso (avoir des embarras d'argent, se débattre)  
**EMBRASSER** (V. BAISER) \* Kiu tro multe deziras, nenion akiras (qui trop embrasse, mal étreint).  
**EMPARER** (S') \* Timo, kolero, teruro, rido kaptis lin.

**EMPRUNTER** (PRUNTEPRENI) \* Ĉu vi ne povas doni al mi prunte 300 frankojn? \* Redoni la prunton  
**EN** \* La neĝo falas, same kiel se el ĝi pluvus (= da ĝi) (comme s'il en pleuvait). La maljunulino kolektis berojn kaj donis al ŝi iom el ili (= iom da ili).

390. **ENCENSER** (INCENSI) \* Dronigi iun en laŭdoj. Incensi iun ĝis sufoko.

**ENCLUME** (AMBOSO) \* Esti inter martelo kaj amboso.

**ENFANT** (INFANO) \* En infano vidiĝas, kia homo fariĝos (on voit déjà en l'enfant l'homme qu'il sera) \* Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron (petits enfants, petits soucis ; grands soucis, grands tourments).

**ENFANTER** (NASKI) \* En doloro vi naskos infanojn.

**ENFER** (INFERO) \* Vivi surtere en infero (l'enfer sur terre). Fari ies vivon infero (mener une vie d'enfer à qq.) \* La vojo al la infero estas pavimita per bonaj intencoj.

**ENFILER** \* Tredi fadenon en kudrilon (enfiler une aiguille = passer un fil dans une aiguille).

**ENGAGER** (S') \* Li timis sin devontigi al pagado de grandaj sumoj.

**ENNEMI** (MALAMIKO) \* Plibono estas malamiko de bono (le mieux est l'ennemi du bien) \* Gardu min Dio kontraŭ amikoj ; kontraŭ malamikoj mi gardos min mem. \* Fali en la manojn de malamiko. Akiri al si malamikon. Ne deziri ion eĉ al sia malamiko (même à son plus cruel ennemi).

**ENNUI** (ENUO) \* Droni en enuo. Morte enui. Tedo ĝis oscedo (l'ennui jusqu'au bâillement). Trovi la horojn longaj. Kiel estis enue en tiu salono (= morte enui) (on s'y ennuyait mortellement) \* Laboro estas plej bona kuracilo kontraŭ enuo (le travail est le meilleur remède contre l'ennui).

**ENSEIGNEMENT** (INSTRUO) \* En tempo pasinta

ni ĉerpu instruon por tempo venonta (puisons dans le passé des enseignements pour l'avenir).

400. **ENTENDRE** (AŬDI) \* Eĉ aŭdi mi ne volas pri tio (je ne veux même pas en entendre parler). Ŝajniĝi aŭdi nenion (faire la sourde oreille). Aŭdion unuorele/pretervole (écouter d'une oreille discrète).

**ENTHOUSIASME** (ENTUZIASMO) Eksplosa entuziasmo. Entuziasmigita amaso (une foule enthousiaste). Lia entuziasmo rapide velkas (meurt rapidement). Verŝi malvarman akvon sur ies entuziasmo (= frostigi ies entuziasmon) (refroidir l'enthousiasme de qq.).

**ENTRAILLE** \* Benita estu la frukto de via ventro (béni soit le fruit de vos entrailles).

**ENVIE** (ENVIO) \* Rongĝas lin envio. Paliĝi/flaviĝi de envio. Preskaŭ morti de envio \* Pli bone estas enviigi ol kompatigi (il vaut mieux faire envie que pitié).

**ENVISAGER** (KONSIDERI) \* Ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras la aferon (tout dépend de la manière dont on envisage la chose).

**ENVOYER** (SENDI) \* Mi sendos venigi kuraciston (envoyer chercher le docteur).

**ÉPAULER** (Ŝ) \* Agi ŝultro ĉe ŝultro \* Li havas larĝajn ŝultrojn (il a les épaules solides).

**ÉPÉE** (GLAVO) \* Kiu kaptas glavon pereos per glavo (quiconque se sert de l'épée, périra par l'épée) \* Mi venis por enkonduki ne pacon sed glavon. La glavo de la leĝo (le glaive de la justice).

**ÉPINARD** \* Tio alportos iom da graso por nia kuirejo (beurre dans les épinards).

**ÉPINE** (DORNO) \* Ne ekzistas rozo sen dornoj (pas de roses sans épines).

410. **ÉPONGE** (SPONGO) \* Forspongi la pasintaĵon (passer l'éponge).

**ÉPOQUE** (EPOKO) \* Premi sian stampon sur sian epokon (marquer son époque). Stranga estas la tempo en kiu ni vivas (quelle époque!). Tiu bela epoko nun agonias. Aŭroras nova epoko (une ère nouvelle commence).

**ÉPOUX. ÉPOUSE** (EDZ(IN)O) \* Submetiĝo, / senfina cedado al edzino (soumission devant l'épouse). Li estas sub la ŝuo de sia edzino (sous la botte

de sa femme) \* Ne deziru la edzinon de via proksimulo (de votre prochain). Ne ŝovu vin inter edzo kaj edzino (ne vous glissez pas...).

**ÉQUILIBRE** (EKVILIBRO) \* Anima/spirita ekvilibro (équilibre moral) \* Perdi sian ekvilibron. Teni sin en ekvilibro \* Ekvilibrigi buĝeton.

**ERRER** (VAGI) \* Vagi kiel turmentata animo (comme une âme en peine).

**ERREUR** (ERARO) \* Erari estas home (l'erreur est humaine). Eraro : kruda, krianta, dika, nepardon-ebla. Meti/fari eraron. Konfesi sian eraron. Provi malgravigi sian eraron (essayer d'en minimiser la gravité). Obstini en sia eraro (persister dans l'erreur). Honti eraron. Kiu ne pekis, kiu ne eraris? (qui n'a jamais, qui ne s'est jamais trompé?). \* Eraro enŝteliĝis en la adicio (Une erreur s'est glissée dans l'addition).

**ESPECE** \* Pagi per bonaj, sonantaj taleroj (espèces sonnantes et trébuchantes).

**ESPOIR** (ESPERO) \* Espero : vana, detruita, neplenumita, iluzia, efemera, kaduka. \* Dorloti esperon (caresser). Luliĝi en ia espero (se bercer d'espoir). Flegi belajn esperojn (entretenir). Ĉerpi esperon. Rezigni pri siaj esperoj. Diri adiaŭ al siaj esperoj. \* Nur la espero tenas lin vivanta. Radieto de espero (lueur). \* Meti siajn esperojn sur iu. Li rajtigas nin meti sur lin la plej belajn esperojn (les espoirs que nous mettons en lui sont justifiés). Estas pli ol ni kuraĝis esperi (plus que nous ne pouvions espérer).

**ESPRIT** (SPIRITO) \* Penetrema, akrevida, malvasta, kritika spirito. Ekzerci sian spiriton per rezonado (au raisonnement). Ĉio konfuziĝas en lia spirito. La nuna junularo havas tute alian spiriton. Eduki siajn infanojn en pacema kaj tuthomara spirito. Ideo profunde ankrita en lia spirito \* Kiel la grandaj spiritoj simpatias! (les grands esprits se rencontrent) \* Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito (Heureux les pauvres d'esprit).

**ESSAI** (PROVO) \* Oni ne povas ne fari tiun ĉi provon (on ne peut pas ne pas faire cet essai). Oni devas provi eĉ la neeblaĵon (on doit essayer même l'impossible). Se unu fojo ne prosperas, ni devas netimigiĝe provi duan fojon (Si une première

fois n'a pas donné de résultat, on doit sans crainte faire un second essai = "Si tu as échoué, recommence" EPICTÈTE)

420. **ESTIME** (ESTIMO) \* Alte estimi iun. Meriti estimon. Esti tenata en alta estimo. Havi profundan estimon por iu. La digno de lia vivo altiris al li ĉies estimon (sa vie toute de dignité lui a attiré l'estime de tous). Perdi la estimon por... Alte taksi la signifon de io (estimer hautement la signification de qq.)

**ÉTAGE** (ETAĜO) \* Sur kioma etaĝo vi loĝas?

**ÉTERNITÉ** \* Rapidu, vi ne havas eternecon por decidi. Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno.

**ÉTOILE** (STELO) \* Havi stelojn antaŭ la okuloj (pro bato, doloro). Vidi mil stelojn (en voir 36 chandelles). \* Lia stelo/famo paliĝas \* Naskita sub favora/malfavora stelo. Vi povas danki vian stelon. \* Tranokti sub libera ĉielo (passer la nuit à la belle étoile).

**ÉTOUFFER** \* Dronigi ion en silenton.

**ÊTRE** \* Ĉu esti aŭ ne esti (être ou ne pas être). Ĝi estas kia ĝi estas (c'est comme c'est/c'est comme ça).

**ÉVEILLER** (S') (VEKIĜI) \* Vekiĝi el dormo. Vekiĝi ĉe la aŭroro. En plena vekiteco (en plein état de veille). KD 16/1...

**ÉVÈNEMENT** (EVENTO) \* Taksi la dimension de evento (juger de l'importance d'un évènement).

**EXAGÉRER** (TROIGI) \* Sen troigo oni povas aserti, ke... (sans être taxé d'exagération, on peut affirmer que...) \* Fari el muso elefanton (faire d'une souris un éléphant = exagérer) \* \* Taksi iun pli alte ol kiom li meritas (exagérer les mérites de qq.).

**EXCEPTION** (ESCEPTO) \* Fari escepton/favoron por iu/al iu. \* Se ne kalkuli esceptojn sensignifajn (si on exclut qq. exceptions sans importance).

\* La regulo akceptas/allasas kelkajn esceptojn.

\* Ne ekzistas regulo sen escepto (l'exception confirme la règle "pour les cas non exceptés").

430. **EXCÈS** (EKSCESO) \* Fari ekscesojn en la manĝado \* Por ĉiu plezuro devas esti mezuro (l'excès en tout est un défaut).

**EXCITER** (EKSCITI) \* Esti en plena ekscitiĝo.

Li ekscitiĝas kiel bolanta lakto. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ĉe la plej malgranda bagatelo (très coléreux et s'enflamme pour un rien).

**EXCUSE** \* Postuli bedaŭresprimojn (exiger des excuses) \* Sin ekskuzi/senkulpigi pri io/antau iu.

\* Kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas (qui s'excuse, s'accuse).

**EXEMPLE** (EKZEMPLO) \* Trafa ekzemplo (un très bon exemple/frappant) \* Por ekzemplo/ekzemple \* Bonaj ekzemploj pli forte influas ol admonoj (les bons exemples ont plus d'effet que les reproches) \* Doni virtan ekzemplon por iu (prêcher d'exemple). Bela ekzemplo de sindonemo (de dévouement) \* Ĉkvon prediki kaj vinon trinki (faites ce que je dis, ne faites pas ce que je fais).

**EXISTENCE** (EKZISTADO) \* Treni sian malesperan ekzistadon (traîner une existence misérable).

**EXPÉRIENCE** (SPERTO) \* Gajni/akiri/posedi sperton. Li posedas kelke da sperto (pri io) (quelque expérience) \* Sperto estas plej bona instruisto. La sperto montras ion tute alian \* Preni en kalkulon la montrajn de la sperto (tenir compte des fruits de l'expérience) \* Profitigi sian sperton al iu (faire profiter les autres de son expérience). Nin instruas eraro, kiun faras najbaro (les erreurs des autres nous sont profitables).

**EXPLOITATION** \* Ekspluatado de homo fare de homo/ de homo al homo.

**EXPRESSION** (ESPRIMO) \* Spica, plata, ĝentila esprimo \* Selektu viajn esprimojn (choisissez). Elektu pli decajn esprimojn (choisissez des expressions plus convenables). Teksto farĉita per ŝablonaj esprimoj (bourré d'expressions stéréotypées). \* Esprimo de doloro sur la vizaĝo.

**EXPRIMER** (ESPRIMI) \* Esprimi sin per gestoj.

**EXTRÊME** (EKSTREMO) \* Fali el unu ekstremo en alian (passer d'un extrême à l'autre). La ekstremoj intertuŝiĝas.

## F

440.**FACE** (VIZAĜO) (V. VISAGE).

**FACILE** (FACILE) \* Facila : laboro, tasko, vojo,



traduko; lingvo \* Oni ne povas kredi, ĝis kia grado atingas ĝia facileco (de Esp.) (il est difficile de croire à quel point l'Esp. est facile).

**FACTURE** (FAKTURO) \* Tro piprita/salita fakturo. \* Li pufigas la fakturon (gonfle).

**FAIM** (MALSATO) \* Se malsato turmentas, lupo timon ne sentas (la faim fait sortir le loup du bois). Malsata kiel lupo (avoir une faim de loup).

**FAIRE** (FARI) \* Havi multon por fari (beaucoup à faire). Kio estas via okupo? (que faites-vous dans la vie?). Havi la potencon fari ion (la force de faire...). \* Ĉiu ajn ne kapablas fari ĉion ajn (tout individu n'est pas capable de faire n'importe quoi)

\* Mi jam sufiĉe penis, nun penu alia (j'en ai assez fait, au tour d'un autre) \* Tio nenion faras (ça ne fait rien)

\* Fari ĉion fareblan (faire tout ce qu'il est possible de faire) \* Fari ion sen mezuro kaj modero \* Prave punite laŭmerite (c'est bien fait!)

\* Farita ne refariĝos (ce qui est fait est fait) \* Ne en unu tago elkreskis Kartago (Paris ne s'est pas fait en un jour)

\* Agu kun aliaj, kiel vi deziras, ke oni agu kun vi (fais à autrui...) \* Li estas arkitekto de sia propra riĉeco (il s'est fait lui-même)

\* Kion fari, estu kiel estos (qu'y faire, c'est comme ça) \* Akvon prediki kaj vinon trinki (faites ce que je dis...)

**FAIRE:V.** le bon apôtre/ le café/ un bout de chemin un croc-en-jambe/ un signe de croix/ faire et dire/ fortune/ le généreux/ la haie/ à l'idée/ la lumière/ faire maigre/ la morale/ boulé de neige/ patte de velours/ des pièds et des mains/ f. semblant/ à sa tête/ ne faire qu'un/ de vieux os/ du tapage.

**FAIT** (FAKTO) \* Fakto : nenegebla, nekontestebla, senduba \* La faktoj parolas per si mem (= oni tion ne povas nei). Kaŝi la faktojn. Troviĝi vidalvide kun realo/ faktoj. Tio estas plej ordinara fakto (une chose tout à fait ordinaire)

\* Distordita prezento de la faktoj (présentation déformée des faits) \* Fermi strute la okulojn antaŭ la faktoj (faire la politique de l'autruche = ignorer sciemment les faits)

\* Kapti iun ĉe la freŝa faro (sur le fait, en flagrant délit).

**FALLOIR** \* Ne multe mankis, ke... (il s'en est fallu de peu que...).

**FAMILLE** (FAMILIO) (V. L<sup>A</sup>VER LINGE)

**FANTAISIE** (FANTAZIO) \* Lasi liberan flugon al sia fantazio (laisser libre cours à sa fantaisie).

**FARNIENTE** \* Dolĉa nenifarado.

450.**FAUTE** (KULPO. ERARO) \* Ĵeti, meti la kulpon sur iun. Tio ne estas mia kulpo. Konfesi sian kulpon. Kompreni la gravecon de sia kulpo. \* Elsarki la erarojn (relever les fautes). ~~Preterlasi vorton dum kopiado.~~

**FAVEUR** (FAVORO) \* Ĝui, ricevi ian favoron. Serĉi ies favoron. Enŝteli sin en ies favoron (se mettre bien avec qq = chercher les faveurs de qq.) \* Superŝuti iun per favoroj (comblér de faveurs) Perdi la favoron de iu \* Estu dirate por lia laŭdo... (qu'il soit dit en sa faveur...).

**FEMME** (VIRINO. EDZINO) (V. ÉPOUSE) \* Virino: alta, gracia, impulsigema, ĉasta, frigida, virta, pruda, rigidmora, apetita, facila \* Ataki la virton de virino \* Defendi la rajtojn de virino \* Havi tute virinajn reagojn.

**FENÊTRE** (FENESTRO) \* Fenestro rigardanta al la korto/ eliranta sur la strato (qui donne sur...) \* Montri sin ĉe la fenestro \* Ĵeti sian monon al kloako (par la fenêtré) \* Pelu mizeron tra l'pordo, ĝi revenos tra l'fenestro (chassez la misère...).

**FER** (FERO) \* Forĝu veron dum ĝi estas varmega (il faut battre le fer quand il est chaud) \* Fera mano en velura ganto. Tuj, dum la afero ardas (tant que le fer est chaud).

**FERMER** (FERMI) \* Fermu vian klapon! (la ferme! / ferme ton clapet!).

**FÊTE** (TROUBLE-) Li estas ĉiama misfaranto/ zorgokreanto.

**FEU** (FAJRO) \* Timi iun, kiel fajron \* La afero ne brulas (il n'y a pas le feu) \* Akordi kiel fajro kaj akvo (= vivi kun iu, kiel kato kaj hundo). \* Enverŝi oleon en la fajron (= akriĝi la situacion) (jeter de l'huile sur le feu) \* Fajreto bruletas sub cindro (couve) \* Doni al iu la verdan lumon (le feu vert).

**FICELLE** (ŜNURETO) \* Movi iun per fadenoj/

kiel marioneton (tirer les ficelles).

**FIER (FIDI)** \* Fidi providencon. Fidi nur pri si mem. Blinde fidi al iu (avoir une confiance aveugle). Neskuebla fido (confiance inébranlable) \* Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero (ne vous fiez pas aux apparences).

460. **FIERTÉ (FIERECO)** \* Ŝveli de fiero (être gonflé de fierté). Fiera kiel pavo (comme un paon). Tio ne estas deca kaŭzo por fieriĝo (il n'y a pas de quoi être fier). Malaltigi/rompi ies fierecon (humilier) Ekflami pro ofendita fiereco \* Havi la fierecon ne peti helpon.

**FIÈVRE (FEBRO)** \* Febro : forta, intensa, intermita, kontinua. Skuiĝi de febro. La febro lin tenas. Preni la temperaturon. La intenseco de febro malkreskas. La febro falis, ĉesis. KD 31/4...

**FICTION (FIKCIO)** \* La realo superas ofte la imagon (dépasse la fiction).

**FIL (FADENO)** \* Treti fadenon en kudrilon, tra bidoj (passer un fil = enfiler une aiguille, des perles d'enfant) \* Perdi la fadenon de la parolo (perdre le fil) \* Lia vivo pendas nur sur fadeno (ne tient qu'à un fil).

**FIN (FINO. CELO)** \* Ĉio havas finon. Kio komenciĝis, tio ankaŭ finiĝos (tout a une fin) \* Ĝisatendu la finon (attendez la fin). Ĝis la pleja fino (= ĝis la fino de la fino) (à la fin des fins).

\* Fino bona, ĉio bona (tout est bien, qui finit bien) \* La celo pravigas la rimedojn (la fin justifie les moyens).

**FLAGELLER (SE)** \* Pentofare skurĝi sin mem.

**FLAGRANT** \* Kapti ĉe la freŝa faro (prendre en flagrant délit).

**FLAIRER (FLARI)** \* Elflari spuron (flairer une piste : chien).

**FLAMME (FLAMO)** \* Ĵeti en la flamojn. Fariĝi predo de flamo (devenir la proie).

**FLATTER (FLATI)** \* Tiu portreto flatas ŝin \* \* Rolo tre flata sed tre ŝarĝa (très flatteur, mais très lourd). \* Se vi volas la filinon, flatu la patrinon.

470. **FLEUR (FLORO)** \* Paroli en la lingvo de floroj (le langage des fleurs).

**FOIS (FOJO)** \* (Tio) estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino. Unu fojon por ĉiam. Ankoraŭ unu

fojon. Ĉiufoje, kiam/ ĉiun fojon, kiam (chaque fois que). Solvi ĉion per unu fojo. Ne pli ofte ol unu fojon en kvin jaroj. Mil fojojn pli bona, ol...

Esperanto estas multajn fojojn pli facila, ol iu ajn natura lingvo \* Jen la lasta fojo (une dernière fois) \* Estis iam... (il était une fois) (= estis foje).

Nek la unuan, nek la lastan fojon \* Unu fojon komencinte, li ne haltos (une fois qu'il a commencé, il ne s'arrête plus) \* Duoble pli ol ĉio, kion li havis antaŭe (deux fois plus qu'avant). Trioble kvar faras dek du (3 X 4 = 12).

\* Post kiam li abdikis... (une fois qu'il a eu abdiqué/ après avoir abdiqué) \* Mi ne bezonu diri duafoje (que je n'aie pas besoin de le dire deux fois).

\* Kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun (il ne faut pas chasser deux lièvres à la fois).

**FORCE** (FORTO) \* Obei, cedi, klini sin, fleksi sin antaŭ la forto. \* Havi forton por fari ion (avoir la force de faire qqc.). En pleno de sia forto (en pleine force). Per la tuta forto (de toute sa force). Streĉi sian forton (tendre). Koncentri sian forton. Fari ion ĝis plena elĉerpiĝo de la forto (jusqu'à épuisement) \* Unueco estas forto (l'union fait la force) \* Kiu havas forton, havas rajton (la force prime le droit).

**FORGER** (FORĜI) \* Kiu ripetas abunde, lernas plej funde (c'est en forgeant qu'on devient forgeron).

**FORME** (FORMO) \* Nur pro formo (pour la forme).

**FORMULE** (FORMULO) \* Plenigi la blankojn de formulo. Plenskribi blankojn.

**FORT** (FORTA) (V. FORCE) \* Sana kaj forta kiel kverko \* La impulso estis pli forta ol lia volo (plus fort que lui).

**FORTUNE** (FORTUNO) (V. CHANCE) \* La fortuna lin favoras/dorlotas (la chance le favorise). Kaprico de fortuna (les caprices de la fortune). La fortuna sin turnis kontraŭ li, lin forlasis. La rado de Fortuno estas turniĝema \* Havi fortunon, ŝancon ĉe la virinoj \* Fari mienon fieran al ludo mizera (faire contre mauvaise fortune bon coeur).

**FOUDRE** (FULMO) \* Altan arbon batas la fulmo (la foudre s'attaque aux grands arbres). \* Unuavide enamiĝi al iu (avoir le coup de foudre).

**FOULE** (AMASO) \* Blinda, entuziasmigita amaso.

Perdiĝi en la popolamaso \* Teni la popolamason sub la pantoflo (tenir le peuple sous sa botte).  
480. "FOUTRE" (SE) \* Priridi iun alvizaĝe (se payer la tête de qq.).

**FRAGILE** \* Feliĉo estas delikata floro (le bonheur est fragile).

**FRAPPER** (FRAPI) \* Frapi amikon sur la ŝultron (taper sur l'épaule). Frapi al si la kapon (pro subita eltrovo) \* Al tiu, kiu vin frapas sur la vangon, prezentu ankaŭ la alian (tendre l'autre joue) \* Eĉ guto, konstante frapante...

**FROID** (MALVARMA) \* Pika, pinĉa frosto. Frostiga malvarmo. Severa malvarmo. Atakas, mordas la frosto. Dentoklaki de frosto. Tremi de frosto. \* Estas malvarme al mi (j'ai froid). Esti tute blua de malvarmo. Frostas al mi en la piedoj (j'ai froid aux pieds). Sensi malvarmon (sentir le froid). Sensiva al malvarmo. \* La vilaĝanoj batadis per la brakoj sian korpon por forigi la malvarmon \* Eksenti froston en la dorso (sentir un froid dans le dos) \* La afero lasas min indiferenta (me laisse froid).

**FRONT** (FRUNTO) \* Havi grandan, inteligentan frunton \* Lia frunto nubiga (s'assombrit). Sulkigi la frunton (plisser, froncer). \* Akiri vivpagon per la ŝvito de la frunto/vizaĝo (gagner son pain a la sueur de son front).

**FRUIT** (FRUKTO) \* La malpermesita frukto. Frukto malpermesita estas plej bongusta. \* Benita estos la frukto de via ventro (béni soit le fruit de vos entrailles) \* Li havas konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos (a conscience que ses efforts porteront un jour leur fruit) .

\* Mia opinio estas nur la frukto de multjara sperto (opinion basée sur le fruit d'une longue expérience) \* Fruktozona diskutado (discussion qui porte ses fruits).

**FUITE** (FORKURO) \* Forkuro de la minutoj (la fuite du temps).

**FUMÉE** (FUMO) \* Enspiri la fumon brusten (avalier la fumée de la c.) \* La fumo spiralis el la malalta kameno \* Ne ekzistas fumo sen fajro (il n'y a pas de fumée sans feu).

**FUMER** (FUMI) \* Estas malpermesate fumi (défense

de fumer) (= Ne "licas" fumi).

- FÜR (AU) ET À MESURE** \* Li formanĝis la fritpast-aĵojn vice, laŭ kiel li eltiris ilin el bolanta oleo. (Majstro M'Saud, p.45. RIBILLARD). \* La montoj iom post iom plilarĝiĝas samtempe, kiel la valo malplilarĝiĝas (El "Por la Praktikantoj", p.55.BABIN).
- 490.**FUTUR (ESTONTECO)** \* La malproksima estonteco. \* En la tempo pasinta ni ĉerpu instruon por tempo venonta (puisons dans le passé des enseignements pour le futur).

## G

**GAFFE (V. BÊTISE)**

**GAGNER (GAJNI)** \* Gajni la grandan gajnon (le gros lot) \* Kiu tro multe deziras, nenion akiras (on risque de tout perdre en voulant trop gagner).

**GALEUX** \* Unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas (il ne faut qu'une brebis galeuse (fava = teigneuse) pour infecter un troupeau) \* Elpeli iun, kiel favan hundon (chasser qq. comme un chien galeux) (gale = skabio).

**GARDER (GARDI)** \* Meti ion sub ies gardon. Esti sub gardo de polico \* Gardi ion kiel okulglobojn (comme la prunelle de ses yeux) \* Gardu vin kontraŭ peko.

**GELER (FROSTI)** \* Trafrostiĝi ĝisoste (se geler jusqu'aux os).

**GÊNER (ĜENI)** \* Ne ĝenu vin pro mi (ne vous gênez pas pour moi).

**GÉNÉREUX** \* Esti en donacema humoro (faire le généreux).

**GENOU (GENUO)** \* Genuante, surgenu rampi antaŭ iu \* Fali ĉe ies genuoj. Ĵetiĝi surgenuen. \* Akvo alta ĝis la genuoj \* Esti je la genuoj de virino.

**GIROUETTE (VENTOFLAGO)** \* Li iras, turniĝas kun la vento. Li estas ventoflago (= ventokoko).

500.**GLAIVE (V. ÉPÉE)**

**GLOIRE (GLORO)** \* Avida je gloro. Akiri al si gloron. Fari al si gloran nomon. Nenio mankas al lia gloro.

**GORGE (GORĜO)** \* Plengorĝe (à pleine gorge). Gorĝostreĉe (avec la gorge serrée). Kunpremiĝas lia gorĝo (se serre). Li sentas bulon en sia gorĝo. \* La manĝopeco hokis/haltis al li en la gorĝo

(une bouchée s'est arrêtée/accrochée dans sa gorge). Senraspigi sian gorĝon (= senraŭkiĝi)(se râcler la gorge) \* Kapti iun je la gorĝo.

**GOÛT (GUSTO)** \* Tiu manĝaĵo acide gustas (a un goût acide), brule gustas (a un goût de brûlé), bone gustas (a bon goût) \* Li havas amaran guston en la buŝo \* Englutu ne gustumante (avalez sans goûter) \* Trovi ion laŭ sia gusto (à son goût).

\* Diveni, trafi ies guston (deviner le goût de qq.,

tomber juste) \* Ĉiu havas sian propran guston (chacun ses goûts) \* Fajnigi ies guston (affiner le goût de qq.).

\* Havi prozajn ordinarajn gustojn.

\* Tio estas demando de gusto (C'est une question de goût). Pri gustoj oni ne devas disputi (des goûts et des couleurs on ne dispute point).

Kiom da homoj, tiom da gustoj (tous les goûts sont dans la nature) \* Kristino al li plaĉis kaj ŝi trovis lin

laŭ sia gusto (Christine lui a plu et elle l'a trouvé à son goût). Ĝi estas laŭ mia gusto kaj plaĉo (à mon goût et ça me plaît) \* Li ne havas eĉ la

plej malgrandan emon labori (il n'a pas le moindre goût de travailler).

**GOUTTE (GUTO)** \* Ili similas unu la alian, kiel du gutoj da akvo (= erarige simila) (comme deux gouttes d'eau, à s'y tromper) \* La lasta guto,

kiu plenigas pokalon (la goutte qui fait déborder le vase) \* Ĝi estas guto en la maro (= tio estas

apenaŭ pli ol nenio).

**GRÂCE** \* Doni al iu la finofaran baton (le coup de grâce).

**GRAISSER (ŜMIRI)** \* Ŝmiri ies manon. Olei ies bonvolon (graisser la patte à qq.).

**GRANDEUR (GRANDECO)** \* Bildo en natura grandeco (grandeur nature) \* Reprodukti miniaturon

je centobla grando (au centuple, à l'échelle cent).

**GRATIS (SENPAGA)** \* Hodiaŭ por mono, morgaŭ senpage (demain on rase gratis).

**GRÉ (VOLO)** \* Vole nevole (de bon ou de mauvais gré). Fari ion pli ĝeme ol eme (Faire qqc. plus à contrecœur que de bon gré).

510. **GRIFFE (UNGEGO)** \* Li nur trafu inter miajn ungojn! (qu'il tombe dans mes pattes/entre mes griffes, il verra!). Liberigi iun el la ungegoj de

iu (sortir qq. des pattes de...).

**GRIVE (TURDO)** \* Pli bona io ol nenio (= se mankas ĉevalo, konvenas azeno) (faute de grives, on mange des merles).

**GUÊPE (VESPO)** \* Vespotalio (une taille de guêpe).  
\* Meti la manon en vesponeston (se fourrer dans un guêpier).

**GUERRE (MILITO)** \* Milito : defenda, agresa, intercivitana, totala, fulma. Milito de la nervoj.  
\* Militon : deklari, fari, gajni, perdi. Militkazo.  
\* Du militas, tria profitas. KD 42/1...34

**GUEULE (FAŬKO)** \* Li bravas/heroas nur buŝe (fort en gueule) \* Esti en postebria stato (avoir la gueule de bois).

**GUISE** \* Faru laŭplaĉe. Laŭ sia arbitro (à sa guise).

## H

**HABILLER (VESTI)** \* Li vestas sin laŭ la lasta modo. Ŝi ne havas per kio sin vesti (elle n'a pas de quoi s'habiller)

**HABIT (VESTO)** \* Kapuĉo monaĥon ne faras (l'habit ne fait pas le moine) \* Krom la vestaĵo sur la korpo li havas/portas nenion (il n'a en tout et pour tout que les habits qu'il a sur lui).

**HABITER (LOĜI)** \* Loĝi en la fino de la mondo (au bout du monde).

**HABITUDE (KUTIMO)** \* La potenco de la kutimo (la force de l'habitude) \* Kutimo estas dua naturo (une seconde nature). La kutimo ludas gravan rolon en la vivo. La homo estas sklavo de la kutimo. Sin bazi sur la kutimo. Kalkuli kun la kutimo (compter avec). Konforme al la k. Malsame al la k. (différent de). Diverĝe de la moroj/kutimoj (pas dans le sens des mœurs et des coutumes). Kroĉiĝi al malnova k. Erara kutimo, kiun nenio pravigas (une coutume erronée, que rien ne justifie) Agi kontraŭ la kutimoj (à l'encontre de) \* Dekutimigi malsanulon de tabakuzado (déshabituer un malade de l'usage du tabac / lui faire faire une cure de désintoxication). Al ĉio oni povas alkutimiĝi (on s'habitue à tout).

520. **HACHE (HAKILO)** \* Enterigi tomahokon (enterrer la hache de guerre).



**HAIE** (HEĜO) \* Formi spaliron (faire la haie).  
**HANTER** (RILATI KUN...) \* Diru al mi kun kiu vi rilatas kaj mi diros al vi, kiu vi estas (= kun kiu vi festas, tia vi estas) (dis moi qui tu hantes, je te dirai qui tu es).

**HASARD** \* Hazarda renkontiĝo. Per stranga renkontiĝo de cirkonstancoj (par un drôle de hasard, un étrange concours de circonstances). Blinda hazardo.

\* Dependas de hazardo, de pure okazaj cirkonstancoj  
\* Kiu nenion hazardas, nenion gajnas \* Vundi iun hazarde (blesser sans le faire exprès).

**HÂTER** (SE) (RAPIDI) \* Rapidu malrapide!

**HAUT** (ALTA) \* Rigardi iun de alte.

**HÉBREU** \* Ĝi estas por mi volapukaĵo (c'est du volapuk/de l'hébreu).

**HÉRITAGE** \* Senigi iun disde heredaĵo (priver qq. d'un héritage) (= senheredigi/malheredigi iun). Postlasi ŝuldojn, kiel heredon (laisser des dettes en fait d'héritage) \* La peza heredaĵo de la "paseo" (le lourd héritage du passé).

**HEURE** (HORO) \* En la daŭro de unu horo (en l'espace d'une heure). En la lastlasta horo (à la toute dernière heure). La horoj treniĝas testude (comme les heures sont longues!) (testudo = tortue)  
\* Li havas ĉiam la ĝustan horon \* Antaŭ la ĝusta horo (avant l'heure...) \* Mia horo ankoraŭ ne venis. Batis la lasta horo de iu (sa dernière heure a sonné) \* Laboristoj de la dek-unua horo (ouvriers de la onzième heure).

**HEUREUX** (FELIĈA) (V. BONHEUR) \* Li povas sin nomi/rigardi feliĉa (il peut se dire heureux). Feliĉa, kiel fiŝo en akvo. Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito (heureux les pauvres d'esprit). Feliĉa ĉe la monludo, malfeliĉa ĉe amo (heureux au jeu, malheureux en amour). Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa (bien que riche, je crains que vous ne soyez pas heureux).

530. **HISTOIRE** (HISTORIO) \* La rado de historio. Historia momento. El la hodiaŭ morgaŭ fariĝos historio (l'aujourd'hui sera l'histoire de demain). Glorie enskribi sian nomon en la historio \* Estas konata historio (c'est une vieille histoire) \* Ne rakontu al mi fabelon (ne me racontez pas d'histoires). Fabelo por enlulado (pour endormir bébé).

**HIER** (HIERAŬ) \* Ne hieraŭ mi venis en la mondon (je ne suis pas né d'hier, de la dernière pluie).

**HIRONDELLE** (HIRUNDO) \* Unu hirundo printempon ne alportas (une hirondelle ne fait pas le printemps).

**HOMME** (HOMO) \* Li ne estas homo ia ajn (ce n'est pas n'importe qui) \* Homo proponas, Dio disponas (l'homme propose, Dieu dispose).

\* Ekspluatado de homo fare de homo : de homo al homo \* En infano vidiĝas, kia homo fariĝos (on voit déjà en l'enfant, l'homme que ce sera).

**HONNĚTE** (HONESTA) \* Ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero (trop poli pour être honnête).

\* Honesta de verto ĝis plandoj (des pieds à la tête = du vertex à la plante des pieds).

**HONNEUR** (HONORO) \* Al kiu mi havas la honoron paroli? \* Estu dirate je lia honoro (qu'il soit dit en son honneur) \* Makuli ies honoron (salir l'honneur de qq.) \* Doni sian honorvorton (sa parole d'honneur)

\* Lasi al iu la eblon sin retiri kun honoro (laisser à qq. la possibilité de se retirer avec honneur)

\* Restarigi ies honoron (réhabiliter) \* Al grandaj sinjoroj grandaj honoroj (à tout seigneur tout honneur).

**HONORER** (HONORI) \* Honori per ĉeesto (honorer de sa présence) \* Kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas (comme on connaît ses saints, on les honore).

**HONTE** (HONTO) (V. PUDEUR) \* Honto kaj mal-honoro! \* Kovriĝi per honto. Preskaŭ morti de/pro honto. Formeti hontemon, pudoron (dominer son sentiment de honte). Ruĝiĝi pro/de honto. Li volus de honto sin kaŝi sub tero. Ne transvivi la honton (ne pas survivre à sa honte) \* Honti eraron (avoir honte de son erreur).

**HORIZON** (HORIZONTO) \* La horizonto nebuliĝas (s'obscurcit) \* Aperi sur la horizonto. Malaperi de la horizonto \* Malfermi novajn horizontojn.

**HORREUR** (HORORO) \* Mi abomenas trinki akvon \* Havi hororon de la laboro.

540. **HŔTE** (GASTO) \* Agrabla estas gasto, se ne longe li restas (les plaisirs les plus courts sont les meilleurs).

**HUILE** (OLEO) \* Verŝi oleon sur fajron (akrigi la situacion)

**HUMAINEMENT** (HOME) \* Kiom eblas fari per homaj kapabloj. Kiel home eblas.

**HUMANITÉ** \* Malesperi pri la homaro.

**HUMILIER** \* Senti sin humiligita.

**HUMEUR** (HUMORO) \* Esti en ŝercema humoro (de bonne humeur), en kverelema humoro (de mauvaise humeur).

**HUMOUR** (HUMURO) \* Li ne havas senson por/de humoro.

**HURLER** (HURLI) \* Inter lupoj krii lupe (hurler avec les loups).

## I

**IDÉE** (IDEO) \* Io al li ekideis = Venis al li en la kapon ia ideo = Elpensi ion = Elcerbumi ion (une idée lui est venue à l'esprit). Jen brila ideo! Mortenaskita ideo (mort-née) \* Fari al si ĝustan/malĝustan ideon pri io (avoir une idée juste/fausse de...) \* Li ne povas amikiĝi kun la ideo, ke... (ne peut se faire à l'idée) \* Turni kaj returni ideon en ĉiu direkto (tourner et retourner une idée dans tous les sens) \* Havi ideojn malklarajn, konfuzajn. Konfuzaj ideoj kaleidoskopas en lia kapo (tournent) \* Fiksa ideo (une idée fixe).

\* Havi konsekvencon en la ideoj (de la suite dans les idées) \* Batali, entuziasmiĝi, morti por ideo. Ideo profunde ankrita en la spirito \*

\* Li havas pri tio nek scion, nek supozon (= li ne havas eĉ palan konjekton pri tio (il n'en a pas la moindre idée)).

**IDENTITÉ** (IDENTECO) \* Pruvi sian identecon. Starigi la identecon de akuzito (établir) \* Aktoro devas identigi sin kun la persono, kiun li ludas (un acteur doit s'identifier avec son personnage).

550. **IDIOT** (IDIOTO) \* Ludi, ŝajniĝi idioton/kretenon/naivulon (faire l'idiot).

**IGNORANCE** (NESCIADO) \* Abisma nesciado (ignorance crasse).

**ILLUSION** (ILUZIO) \* Luli sin en revoj (= dorloti iluziojn = fari al si iluziojn)(se bercer d'illusions).

Ne iluziu vin per tro granda espero. Ne kredu al iluzioj. Sperti novan seniluziigon (faire l'expérience d'une nouvelle désillusion).

**ILLUSTRER** (ILUSTRI) \* Ilustri regulon per multaj

ekzemploj. Ilustri sian penson per metaforoj kaj figuroj \* Mi ĵus ricevis leteron, kiu prezentas bonan ilustraĵon al tio, kion mi supre diris.

**IMAGE (BILDO)** \* Al li naskiĝis filo laŭ lia bildo (un fils à son image). Li estas la vivanta bildo de sia patro.

**IMAGINER (IMAGI)** \* Ŝi estis tute alia, ol kiel li ŝin imagis al si (elle était toute différente de ce qu'il se l'imaginait). Tio estis pli terura ol ĉio, kion oni povis imagi (plus terrible que tout ce qu'on pouvait imaginer).

**IMMÉDIATEMENT** \* Tuj, dum la afero ardas! (tant que le fer est chaud).

**IMPASSE** \* Trafi en sakstraton, senelirejon (être dans l'impasse) (cul-de-sac, sans issue).

**IMPATIENCE** \* Bruli, boli pro/de senpacienco.

**IMPLORER** \* Peti per ĉiuj sanktuloj (implorer tous les saints).

560**IMPORTANCE (GRAVECO)** \* Ne gravas (ce n'est pas grave, ça ne fait rien). Gravigi bagatelon (= fari el muso elefanton) (exagérer l'importance). Ni ne devas doni ian gravecon al ĝi (ne pas donner la moindre importance) \* Alte taksi la signifon de io (= atribui grandan signifon al io) (attribuer beaucoup d'importance à...).

**IMPOSSIBLE (NEEBLA)** \* Preskaŭ neebla. Provi eĉ la maleblon/neeblaĵon (essayer l'impossible). Fizike neeble (matériellement impossible). Trans la limo de eblo (au-delà du possible). Postuli neeblaĵojn (exiger l'impossible) \* Neebleco estas plej forta senkulpigo (à l'impossible nul n'est tenu).

**IMPÔT (IMPOSTO)** \* Meti, kolekti, pagi imposton. Ŝargita per imposto.

**IMPRESSION (IMPRESO)** \* Fari profundan impreson. Ricevi fortan impreson \* Havi la impreson, ke... Dividi kun iu la impreson, ke... (partager). Favore, melankolie impresi (donner une impression favorable; de tristesse). Agrabla sento de varmo (une agréable impression de chaleur) \* Mi estas tre impresiĝema (impressionnable). Tio ne impresis min \* La akcidento profunde impresis lin. Ŝi sentis sin mirinde impresita de la rakonto (très agréablement impressionnée par le récit).

**INACTIF** \* Ankaŭ li ne restis nenifara (lui non plus n'est pas resté inactif).

**INATTENTION** (DISTRIGŬO) \* En momento de sen singardo (dans un moment d'inattention).

**INCOMPRÉHENSIBLE** (NEKOMPRENEBLA) \* Li elgargaris kelkajn nekomprenablajn vortojn (il a "gargouillé" quelques mots incompréhensibles) (gargari = rincer).

**INDIFFÉRENT** (INDIFERENTA) \* Ŝi ne estas indiferenta kontraŭ mi (je ne lui suis pas indifférent)

**INDIGNATION** (INDIGNO) \* Veki, naski indignon/konsternon \* Forĵeti indigne malhonestan proponon \* Mi ne povas ne esprimi mian indignon (je ne peux pas ne pas exprimer mon indignation).

**INFAILLIBLE** (NEERAREMA) \* La katolikoj kredas sian papon neerarema. La neerariveco de papo.

570. **INFLUENCE** (INFLUO) \* Sub influo de la deziroj, de agitantoj (agitateur). Agi sub influo de... Esti influata de... Mi neniel volas vin influu (aucunement) Ĝui grandan influon. Havi decidigan influon (décisive). Uzi sian tutan influon por... (user de toute son influence).

**INGRATITUDE** \* Tiu sendankeco tranĉas al mi la koron (cette ingratitude me fend le coeur).

**INITIATIVE** (INICIATIVO) \* Mi aprobas vian iniciativon.

**INJURE** (INSULTO) \* Superŝuti iun per insultoj/per koto. Verŝi sur ies kapon plenpoton da insultoj (accabler d'injures).

**INJUSTE** \* Esti maljusta kontraŭ iu (envers qq.). Krianta maljustaĵo (injustice criante). Krii pri maljusteco (réclamer justice) \* Maljusteco de la sorto (injustice du sort).

**INNOCENCE** (SENKULPECO) \* Kredi je ies senkulpeco. Pruvi sian senkulpecon. Cirkonstancoj ekskludantaj kulpecon (circonstances atténuantes). \* Li konsciis sian senkulpecon sed ne povis elmontri sian pravecon (il avait bien conscience de son innocence, mais ne pouvait se justifier).

**INSPIRATION** (INSPIRO) \* Ĉerpi sian inspiron el io (puiser son inspiration dans...).

**INSTINCT** (INSTINKTO) \* Bridi siajn instinktojn (freiner) \* Fari instinktan movon (geste instinctif).

**INSULTE** (V. INJURE)

**INSTITUT** (INSTITUCIO) \* Nacia institucio pri statistiko (I.N.S.E.E.).

580. **INTENTION** (INTENCO) \* Forlasi, formeti sian intencon (abandonner). \* Malkovri siajn intencojn. Ŝi venis kun la intenco ...i (avec l'intention de...) Malproksime estas de mi la intenco, ke... (loin de moi l'intention de...). Kun antaŭe pripensita intenco (avec l'intention préméditée) \* Mi kredis, ke vi havis la plej honestan intencon.

**INTÉRÊT** (INTERESO) \* Fari ion por propra intereso (par intérêt propre). Zorgi nur pri propra intereso/ utilo/profito (s'occuper strictement de son propre intérêt) \* Konflikto, kolizio de interesoj \* Afekti interesigon (faire semblant de s'intéresser à qqc.) \* La interesatoj en la konkurso sin turnu al... (les personnes intéressées par le concours doivent s'adresser à...).

**INVENTER** \* Li ne elpensis la pulvon (il n'a pas inventé la poudre).

## J

**JAMAIS** (NENIAM) \* Pli bone malfrue ol neniam (mieux vaut tard...)

**JAMBE** (KRURO) \* Sidi krucinte sub si la kruojn (s'asseoir en tailleur) \* Havi gambojn kiel alumetoj \* Manke de kapo oni devas havi kruojn (quand on n'a pas de tête, il faut avoir de bonnes jambes) \* Preni la piedojn en la manojn (= kuri senbride, = kuri kiel rabia) (prendre ses jambes à son cou/ courir comme un enragé).

**JETER** (ĴETI) \* Sin ĵeti antaŭ ies piedojn. Kvinope sin ĵeti sur iun (à cinq d'un coup). Sin ĵeti al li sur la kolon \* Ĵeti polvon en la okulojn (jeter de la poudre aux yeux).

**JEU** (LUDO) \* Lin kaptis pasio de ludo \* Ludi danĝeran ludon. Tio ne estas ludo infana \* La ludo la kandelon ne valoras.

**JEUNESSE** (JUNECO) \* En floro de sia juneco. En sia frua juneco (sa prime jeunesse). \* Eraroj de juneco. Uragana juneco \* Konservi sian junecon. \* Vi ŝajnas almenaŭ tiel juna, kiel mi (vous paraissez au moins aussi jeune que moi) \* Esti je unu jaro pli juna ol mi \* Jam de longe forflugis mia juneco (ma jeunesse s'est envolée depuis bien longtemps).

\* Por sia aĝo, ŝi ankoraŭ estas sufiĉe juna (encore jeune pour son âge) \* Se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta! (si jeunesse pouvait...).

**JOIE** (ĜOJO) \* Senlima, senbrida, senmezura, eksploda, paradiza ĝojo. Ebria de ĝojo (ivre de joie). Imagu mian ĝojon \* Trovi ĝojon en io. \* Plenigas lin senbrida ĝojo (une immense joie emplit son coeur) \* Fari ĝojon al iu (créer de la joie à qq.). Ĝojo sanigas (fait du bien). Elpuŝi ĝojkrion.

**JOINDRE** \* Kunigi/ligi utilon kun agrablo \* Ekvilibrigi la buĝeton (joindre les deux bouts).

590. **JOUE** (VANGO) \* Vangoj palaj de anemio \* Survangi iun (gifler) \* Al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian.

**JOUER** (LUDI) (V. JEU) \* Ludi kiel kato per muso \* Fari ion kvazaŭ ludante (en se jouant).

**JOUG** (JUGO) \* Kurbiĝi sub la jugo de despotismo. Forskui, deĵeti la jugon.

**JOUR** (TAGO. DIURNO) \* Kiun tagon ni havas hodiaŭ? Antaŭ tri tagoj (il y a 3 jours). Tutajn tri tagojn (trois jours pleins) \* Post ok tagoj de hodiaŭ (dans huit jours à partir d'aujourd'hui).

Ĉiun duan tagon (tous les deux jours) \* Unu belan tagon (un beau jour). Tago post tago (jour après jour). Unu tagon ŝi perdis (un jour elle perdit...)

\* Vivi de tago al tago (au jour le jour). Tio estas klara kiel tago/suno \* Tago tagon sekvas, sed ne similas (les jours se suivent et ne se ressemblent pas) \* Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ (Ne remettez pas à demain ce que vous pouvez faire aujourd'hui) \* Ne en unu tago elkreskis Kartago (Paris ne s'est pas fait en un jour).

**JUGE** (JUGISTO) \* Vi ne povas esti samtempe juĝanto kaj juĝato (= pri propra afero neniu juĝas libere) (on ne peut être à la fois juge et partie).

**JURER** (ĴURI) \* Pri tio mi ne kuraĝus ĵuri (je n'en jurerais pas). Ĵuri fidelecon al iu \* Pri nenio oni povas ĵuri (il ne faut jurer de rien). Ĵuru do al mi per Dio, ke vi ne agos malfidele \* Ĵuri per la ĉielo kaj tero/je ĉiuj sanktuloj de la kalendaro/per la memoro de l' patrino/per la barbo de la profeto.

**JUSTICE** \* Imanenta justo (justice immanente).  
KD 24/1...

**JUSTIFIER (SE)** \* Pravigi sin antaŭ iu. Kion vi povas diri por via pravigo (pour votre défense/justification).

## L

**LAISSER (LASI)** \* Lasu min sola, trankvila \* Lasu la lokon neokupita, libera por... \* Lasi sin kapti per lertaj vortoj (se laisser prendre à de belles paroles) \* Ne enlasu la lupon en la ŝafejon (ne laissez pas le loup entrer dans la bergerie) \* Li preteratentis multajn erarojn en sia korektado (il a laissé beaucoup de fautes) \* La afero lasas min indiferenta (me laisse froid).

**LANGUE (LANGO. LINGVO)** \* Montru, elŝovu la langon (montrez, sortez). Ŝlima lango (langue chargée) \* Montri moke al iu la langon (tirer la langue à qq.) \* Klaki per lango (claquer la langue) \* Gardi, bridi, ligi sian langon. Teni sian langon en la buŝo (se retenir de parler) \* Lia lango stumbladas (fourche) \* Li minacas, bravas, heroas nur buŝe (il en fait beaucoup avec la langue) \* Li havas pikeman, malican langon (langue de vipère). Lia galo ŝprucas de sur lia lango (mauvaise langue = la bile jaillit) \* Antaŭ la lango laboru la cerbo (il faut tourner sept fois sa langue dans sa bouche avant de parler) \* Perfidi sekreton (avoir la langue trop longue). Havi bonan bekon (la langue bien pendue).

\* Lingvon : posedi, primajstri, povoscii, regi.

\* Ĉiu civitano, en ĉiu regno, havu plenan rajton paroli tiun lingvon, kiun li volas.

600. **LARME (LARMO)** (V. PLEURER) \* Larmoj vualas liajn okulojn. El liaj okuloj perlas larmoj. Reteni siajn larmojn. Eksplodi per larmoj. Larmoj fontas, ŝprucas el la okuloj, banas liajn vangojn \* Plori per pezaj larmoj. Faligi varmegajn larmojn. Lasi libere flui siajn larmojn. Verŝi larmojn kvazaŭ per riveroj. Falsaj larmoj (larmoj de krokodilo) \* Kortuŝi iun per larmoj \* Ridegi ĝis larmoj. Larmoj de ĝojo. Li ne scias, ĉu plori ĉu ridi (il ne sait s'il doit rire ou pleurer).

**LARRON (ŜTELISTO)** \* Okazo kreas/faras/naskas



ŝteliston (l'occasion fait le larron).

**LAURIER** (LAŬRO) \* Ripozi sur siaj laŭroj.

**LAVER** (LAVI) \* Fari al iu bonan lavon (laver, savonner la tête à qq.) \* Tolaĵon malpuran lavu en la domo (lavez votre linge sale en famille.) \* Mi lavas al mi la manojn (= tio min ne koncernas) (je m'en lave les mains.)

**LEÇON** (LECIONO. INSTRUO) \* Papage ripeti gurditan lecionon (répéter sa leçon comme un perroquet) \* Tio servu al li kiel instruo (que ça lui serve de leçon.) Mi donos al li amaran lecionon (je lui donnerai une leçon dont il se souviendra) \* El tempo pasinta ni ĉerpas instruon por tempo venonta (= el la paseo ni lernas por la futuro) (tirons du passé un enseignement pour l'avenir.)

**LECTURE** (LEGADO) \* Droni, enprofundiĝi, absorbiĝi en legado (se plonger dans la lecture.) La tutan libron mi legis per unu spiro (d'un trait.) \* Legi inter la linioj.

**LÉGER** (MALPEZA) \* Malpeza kiel floko, libelo, plumo, lanugo (duvet.)

**LENDEMAIN** (MORGAŬ) \* Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ (ne remettez pas au lendemain...).

**LEQUEL** (KIU) \* La sola infano de mia amiko, kiun infanon vi vidis ĉe mi, mortis hieraŭ.

(Remarque: répétition de "infano" pour éviter une équivoque. V. PLENA ANALIZA GRAMATIKO, n° 81).

**LETTRE** (LETERO.LITERO) \* Letero : anonima, kondolenco, registrita (recommandée), nefermita (ouverte) \* Leteron : respondi, dati, poŝti, registri, deĉifri \* Ĉenletero \* Bombardi iun per leteroj. \* "Mi legis vian leteron kun aparta intereso". KD 34/1... \* Estus al mi agrable, se vi volus ĉe okazo komuniki mian leteron al... \* Obstine sin teni je la litero de la kontrakto (s'en tenir à la lettre). Mi simple kaj litere, ne havis eĉ kion manĝi (je n'avais littéralement rien à manger).

610.**LEVER** (SE) (LEVIĜI.ELLITIĜI) \* Leviĝi antaŭ la tago, kun la suno \* Eltiri iun el la lito.

**LÈVRE** (LIPO) \* Mordeti al si la lipojn \* Pendi je la lipoj de iu (être suspendu aux lèvres de qq.)

\* Li ankoraŭ havas lakton sur la lipoj (blanc-bec).  
\* De parolo ĝis faro estas malproksime (il y a loin de la coupe aux lèvres).

**LIBERTÉ (LIBERECO)** \* Havi plenan liberecon de agado (avoir toute liberté d'action). Kian kompreneon vi havas pri libereco? (quelle idée vous faites-vous de la liberté?) \* Pli bona pano sen butero, ol kuko sen libero \* Leviĝi por defendo de libereco. Batali por la plej elementa homa libereco \* Persona, individua, politika libereco. Retrovi ĝuadon de libereco \* Dangere estas lasi lin plu en tia libereco (il est dangereux de le laisser davantage en liberté).

**LIBRE (LIBERA)** \* Libera kiel birdo aera (libre comme l'air) \* Ĝui tempeton de neokupiteco (jouir d'un moment de liberté).

**LIE (FEĈO)** \* Feĉo de la societo (la lie de la société) \* Trinki la amaran sukron de io (boire le calice, la coupe, jusqu'à la lie).

**LIER (LIGI)** \* Sin ligi kun iu edziĝe, amike (se lier avec qq. par le mariage, l'amitié) \* Ligi amikajn rilatojn kun iu.

**LIEU (AU) (ANSTATAŬ)** \* Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiu ellernadu unu saman lingvon (Que chacun apprenne une langue commune au lieu d'apprendre diverses langues).

**LIÈVRE (LEPORO)** \* Forlepori (s'enfuir comme un lièvre, ne pas demander son reste) \* Kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun (il ne faut pas courir deux lièvres à la fois).

**LIMITE (LIMO)** \* Ĉio devas havi limon. Fiksi la limojn de io. Transiri ĉiujn limojn (dépasser les limites) \* Ĝi estas favoro, kiu superas ĉiujn limojn.

**LINGE (TUKO) (V. LAVER)**

620. **LIRE (LEGI) (V. LECTURE)** \* Legi en ies koro/animio. KD 35/10.

**LIT (LITO)** \* Pretigi liton (faire son lit). Elsalti el la lito \* Esti ligita/katenita al la lito (retenu au lit, ex. par la maladie) \* Turniĝadi, ruliĝadi en la lito \* Sterni sin sur la lito (s'étendre) \* \* Kiel oni sternas, tiel oni dormas (Comme on fait son lit, on se couche) (sous-entendu : comme on étend les couvertures)

**LIVRE (LIBRO) (V. LIRE.LECTURE)** \* Leginda

libro. Papilie tralegi libron (= transsalti tutajn liniojn) (parcourir) \* Kurbiĝi super libroj (se pencher)  
KD 35/1...

**LOGIQUE** (LOGIKO) \* Ankaŭ la logiko diktas, ke... (la logique aussi veut que...).

**LOI** (LEĜO) \* Neskribita leĝo. Eterne validaj/porĉiamaj leĝoj (perpétuellement valables) \* Nesciado de leĝo neniun pravigas (nul n'est sensé ignorer la loi). Kun la plena severo de leĝo (la loi dans toute sa rigueur). Kolizii kun la leĝo. Tordi la leĝon (tourner la loi) \* Escepti iun el komuna leĝo (exclure qq. de l'application de la loi).

**LOIN** (MALPROKSIME) \* Malaperi en la malproksimeco (disparaître dans le lointain) \* Ĝis la plej ekstrema ekstremo (au point le plus extrême). \* Pli malproksime, ol oni povas atingi per la rigardo (au-delà de l'horizon).

\* For de la okuloj, for de la koro (loin des yeux, loin du coeur).

**LONG** (LONGA) (V. LONGUEUR) \* Trovi la horojn longaj (trouver le temps long) \* Fali laŭ sia longeco (tomber de tout son long) \* Trairi la landon laŭ longo kaj larĝo (= laŭlonge kaj larĝe) (traverser la région de long en large).

**LONGTEMPS** (LONGATEMPE) \* Tio estis tiel longatempe antaŭe, ke... (il y a si longtemps que) \* Tiel longe, dum la situacio tion postulos, mi... (aussi longtemps que la situation l'exigera, je..)

**LONGUEUR** (LONGECO.LONGO) \* Mezuri la longon de... \* La strato estas 1000 metrojn longa (= longa je 1000 metroj) \* Ĉiuj de egala longo (tous de même longueur) \* Ĉambro duoble pli longa ol larĝa.

**LOT** \* Gajni la grandan gajnon (gagner le gros lot).

630.**LOUANGE** (LAŬDO) (V. ÉLOGE) \* Diri ion por ies laŭdo. Ne ŝpari laŭdojn (ne pas être avare de louanges). Avida je/al laŭdoj. Ŝveli de laŭdo (se gonfler).

**LOUP** (LUPO) \* Lupfantomo (loup-garou).

\* Oni konas lin, kiel blankan lupon (connu comme le loup blanc) \* Lupo lupon ne manĝas (les loups ne se mangent pas entre eux) \* Enlasi la lupon

en la ŝafejon (laisser le loup entrer dans la bergerie)  
\* Pri la lupo rakonto, kaj kun ~~la~~ lupo renkonto  
(Quand on parle du loup...) \* Inter lupoj krii  
lupe (hurler avec les loups) \* Se malsato turmentas,  
lupo timon ne sentas (la faim fait sortir le loup  
du bois) \* Venos la tempo, kiam la homoj ĉesos  
esti lupoj unuj kontraŭ la aliaj (un jour viendra  
où les hommes cesseront d'être des loups les  
uns pour les autres).

**LUMIÈRE** (LUMO) \* Ĵeti plenan lumon sur la  
aferon (faire la lumière sur...). Ĉe la lumo de  
tiuj faktoj, ni povas deklari... (à la lueur des  
événements).

**LUTTE** (BATALO) \* Batalo por la vivo/por la  
ekzistado.

## M

**MAGNANIME** (GRANDANIMA) \* Montri sin grand-  
anima.

**MAIGRE** (MALGRASA/"MAGRA") \* Maldika/"magra"  
kiel balailtenilo (manche à balai). Tiel malgrasa,  
ke liaj ripoj estas kalkuleblaj (si maigre qu'on  
peut lui compter les côtes). Malgrasa kiel skeleto.  
\* Abstinu ĉiun vendredon (faire maigre le vendredi)

**MAIN** (MANO) \* Interplekti la manojn (croiser).  
Kontentige interfroti la manojn (se frotter les  
mains de plaisir). Mano en mano \* Preni sian  
kapon per ambaŭ manoj. Kun la manoj sur la  
koksoj (mains aux hanches) \* Havi vortaron prete  
sub la mano/ĉemane \* Kiel per turno de mano  
(en un tour de main) \* Li havas bateman manon/  
manon rapidan por bati (la main leste) \* Levi  
murdan manon kontraŭ iu (une main meurtrière)  
\* Levu la manojn! (haut les mains!). For la manojn  
(bas les pattes!) \* Preni sian sorton en la proprajn  
manojn (prendre son sort entre ses mains).

\* La afero sidas en bonaj manoj (est dans de  
bonnes mains) \* Doni helpan manon al iu (une  
main secourable) \* Liaj manoj estas puraj de  
tiu afero. Mi lavas al mi la manojn (je m'en  
lave les mains) \* Li venu/trafu en miajn manojn!  
(qu'il tombe dans mes mains, il verra!) \* Peti  
pri la mano de iu (= svatiĝi) (demandeur la main  
de qq.). Doni al iu sian filinon, kiel edzinon

(accorder la main de sa fille) \* Klopodi per manoj kaj piedoj (= strebi mane kaj piede) (faire des pieds et des mains) \* Kapti iun je la kolo/kolumo (mettre la main au collet) \* El lia mano ĉiu monero elglitas (il a les mains trouées) \* Teni iun per fera mano (d'une main de fer). Fera mano en velura ganto. Politiko de forta mano (politique de la main de fer) \* Mano dekstra ne sciuj, kion faras la maldekstra \* Ĉe la freŝa faro (pris la main dans le sac) \* Neniam mi premis al iu la manon kun pli sincera estimo kaj koreco (je n'ai jamais serré la main de qq. avec autant d'estime et de cordialité).

**MAISON** (DOMO) \* Sur ambaŭ bordoj etendiĝis seninterrompe vico da dometoj.

**MAÎTRE** (MASTRO) \* Esti mastro en sia domo (être maître chez soi) \* Interkonsento inter mastro kaj laboristoj (accord entre patron et ouvriers).

**MAÎTRISER** (SE) \* Ne plu povi sin regi.

640. **MAJORITÉ** (PLIMULTO) \* Submeti sin al plimulto (se soumettre à la majorité). Disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto (la minorité s'incline devant la majorité).

**MAL** (MALBONO.DOLORO) \* El du malbonoj pli malgrandan elektu (de deux maux, il faut choisir le moindre). Grandaj malbonoj - grandaj rimedoj (aux grands maux, les grands remèdes). Trafi de Scilo al Ĥaribdo (de mal en pis) \* Intenci malbonon (vouloir le mal) \* Atakis/kaptis lin hejmosopiro (fut pris du mal du pays) \* Min doloras tie, panjo (ça me fait mal là, maman). Mia reŭmatismo min doloras \* Ili batis min, sed ĝi (= tio) min ne doloris \* Min doloras la nepovado helpi vin (ça me fait mal de ne pouvoir vous aider) \* Pagi al iu malbonon per bono (rendre le bien pour le mal).

**MALADE** (MALSANA) \* Fali en malsanon (tomber malade). Mi sentas min malsana \* Ĉiu malsanulo estas kazo \* "Malsanulo pro Imago" (Le Malade Imaginaire).

**MALADIE** (MALSANO) \* Malsano lin sternas sur la lito (le tient au lit).

**MALCHANCE** (MISFORTUNO) \* Alporti al iu la misfortunon.

**MALÉDICTION** (MALBENO) \* Ĵeti malbenon sur ion. Sur vin falos la malbono.

**MALENTENDU** (MISKOMPRENO) \* La disputo estas kaŭzita simple de miskompreno. Por eviti ĉian miskomprenon.

**MALHEUR** (MALFELIĈO) \* Malfeliĉo falis sur lin, lin vizitis. Puŝi, faligi iun en malfeliĉon (jeter qq. dans le malheur). Instruita de malfeliĉo (instruit par le malheur). Li emociiĝis antaŭ tia mizero (ému par tant de misère/malheur). Dividi la mizeron kun iu (partager le malheur de qq.). Amiko fariĝas frato en mizero (dans le malheur un ami devient un frère).

\* Ne moku mizeron de alia, ĉar baldaŭ venos via (ne vous moquez pas du malheur des autres, votre tour viendra). Li estas mem la aŭtoro de sia malfeliĉo (= li danku al si mem la malfeliĉon) (il est l'artisan de son propre malheur = il l'a cherché) \* Si estas virino pli malfeliĉa, ol mi opiniis (plus malheureuse que ce que je soupçonnais)

\* Suferoj ne venas izolitaj (= malfeliĉo malofte venas sole) (un malheur ne vient jamais seul)

\* Neniam nin trafu pli granda plago (qu'il ne nous arrive jamais plus grand malheur!) \* Eĉ malfeliĉo

havas (foje) utilon (à quelque chose malheur est bon) \* Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis

la tagon, en kiu li estis naskita \* Ve al la venkitoj! (malheur aux vaincus!). Malbeno al ili! (malheur à eux). KD 20/1...

**MALHEUREUX** (MALFELIĈULO) (V. MALHEUR)

\* Oni trovas ĉiam pli malfeliĉan, ol sin mem.

**MALIN** \* Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas (à malin malin et demi).

650. **MANCHE** \* Refaldi la manikojn ĝis la kubuto/kuspe faldi (relever).

**MANGER** (MANĜI) \* Manĝi sen apetito, nur per dentopintoj, tiom kiel birdeto, ĝis krevo, ĝissate (à satiété) \* Ne por manĝi ni vivas, sed por vivi ni manĝas \* Li manĝus, digestus eĉ fernajlojn

\* Manĝu, kiom vi bezonas (à volonté) \* Li havas per kio ŝmiri sian panon (= li havas kion bonan meti inter la dentojn) (il a de quoi manger) \*

Manĝi la sekan panon de migrulo (manger de la vache enragée). KD 40/1

**MANQUER** \* Ne multe mankis, ke li falu (il a failli tomber : il s'en est fallu de peu) \* Nun mankas ankoraŭ, ke ni fariĝu virinoj! (qu'on devienne des femmes, il ne manquerait plus que ça!)

**MARCHE** (MARŜO) \* Rampi sur manoj kaj piedoj / mane-piede (à quatre pattes) \* Fermi la marŝon (fermer la marche) \* Dolorige surtreti la piedojn de iu (marcher sur les pieds de qq.).

**MARCHÉ** (BAZARO.MERKATO) \* La bazaro estas tenata ĉiun merkredon (le marché a lieu tous les mercredis). La legombazaro montris la tutan gamon de la verdo (le marché aux légumes présentait la gamme complète des verts). Placo de la bazaro (place du marché). Fari siajn aĉetojn ĉe la bazaro \* Serĉi novajn merkatojn. La merkato de kotonu, ktp. "Eŭropa Merkato" (Communauté Economique Européenne).

**MARIAGE** (EDZ-IN-IĜO) \* Edziĝo pro/el amo (mariage d'amour). Edziĝo pro intereso (d'intérêt). Blanka edziĝo (mariage blanc) \* Edzigi sian filon al riĉa familio. Li edzinigis ŝin al si kontraŭ la volo de ŝia patro (il l'a épousée = l'a "mariée à lui" contre la volonté de son père : du père de la jeune fille). Ili geedziĝis sekrete. KD 17/1... (V. ACCORDER. MAIN)

**MARRON** (MARONO) \* Eltiri por aliaj la maronojn/kaŝtanojn el la fajro (tirer les marrons du feu).

**MARTEAU** (MARTELO) \* Esti inter martelo kaj amboso.

**MAUDIT** (MALBENITA) \* Malbenita estu tiu, kiu... (maudit soit celui qui..). For de mi, vi malbenitaj, en la eternan fajron (loin de moi, en enfer).

**MÉDAILLE** (MEDALO) \* Ĉiu medalo havas du flankojn (a son revers).

660. **MÉDECIN** (V.DOCTEUR).

**MEILLEUR** \* Rezervi la plej bonan por la fino (réserver le meilleur pour la fin). Fremda manĝo havas bonan guston (c'est toujours meilleur chez les autres) \* Dividi kun iu bonon kaj malbonon (pour le meilleur et pour le pire).

**MÊLER** (SE) (ENMIKSIĜI) \* Zorgu pri vi, kaj nenion pli (occupez-vous de vous et rien de plus/mêlez-vous de vos affaires). Havi nenian moralan

rajton miksi sin en tiun aferon. Vi ne havas la rajton enmiksi vin en nian aferon. Precipe se en la aferon enmiksiĝas virino.

**MÊME** (SAMA, EĈ, MEM) \* Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne/ne plu povus (même si nous le voulions, nous ne pourrions plus nous arrêter).

\* Mi amas lin kiel min mem. Mi devas mem ĉion plenumi (je dois tout faire par moi-même)

\* La sama ideo (samideano). Li senkonscie revas pri tio sama, pri kio ni revas \* Mi eĉ mem uzas tiujn vortojn (même moi-même) = eĉ mi mem.

**MÉMOIRE** (MEMORO) (V. SOUVENIR) \* Stampi ion en sia memoro (ancrer). Forviŝi ion el la memoro (effacer). Lia memoro rifuzas lin servi, forlasis lin. Memori fakton, ofendon. Sian memoron kultivi, ekzerci, streĉi \* Mi revidas ĉiam en mia memoro la bildon de tiu terura nokto \* Honori ies memoron. Mi uzas la okazon, por revoki en vian memoron la nomon de S... (je profite de l'occasion pour vous remettre en mémoire le nom de S...).

KD 41/1...

**MENACE** (MINACO) \* Ne helpas petoj, nek minacoj (ni les prières, ni les menaces n'y feront rien).

\* Minaci iun per pugno (menacer du poing).

**MÉNAGER** \* Ne domaĝi sian penon (ne pas ménager sa peine).

**MENTIONNER** (MENCII) \* Mencii ion preterkure (en passant).

**MENSONGE** (MENSOGO) \* Implikiĝi/embarasiĝi en mensogon (s'empêtrer dans le mensonge). Ĉiu lia vorto fontas el mensogo (il ment à chaque mot). Kapti iun ĉe mensogo (prendre en flagrant mensoge). Aplombe, senhonte aserti malveraĵon.

KD 63/7.8

**MER** (MARO) \* Maro aspektas el oleo \* Mil metroj super la nivelo de la maro \* Esti premata en direkto al la maro (être acculé à la mer) \* Ĝi estas guto en la maro (une goutte d'eau dans la mer).

670. **MERCI** (DANKO) \* Adresi al iu sian dankon. Esprimi koran dankon. Montri konkrete sian dankon. Ĵuri al iu eternan dankon \* Tio ne meritas dankon. Ne dankinde! (il n'y a pas de quoi!) \* Koran dankon al vi pro via komplezo (pour votre amabilité).



Bonvolu akcepti la plej grandan dankon por ĉio, kion vi faris por mi.

**MÈRE** (PATRINO) \* Patrinaj zorgoj, karesoj, indulgoj \* Esti por iu kiel patrino \* Patrino kiu sin mem forgesas por siaj infanoj (qui se sacrifie pour ses enfants). Por patrino ne ekzistas infano malbela \* Kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon. KD 19/6

**MÉRITER** (MERITI) \* Oni devas taksi ĉiun homon laŭ liaj meritoj (juger une personne suivant ses mérites). Taksi iun pli alte, ol kiom li meritas (exagérer les mérites de qq.). Li ne havas ĉiujn meritojn, kiujn al li oni atribuas \* Prave punite laŭmerite (il n'a que ce qu'il mérite/bien fait pour lui).

**MERLE** (V. GRIVE)

**MESURE** (MEZURO) \* Farigi al si ŝuojn laŭmezure (se faire faire des chaussures sur mesure) \* Laŭ mezuro de ebleco (dans la mesure du possible). En la mezuro kiel la publika instruado progresis... (V. Fur et à mesure).

**MÉTIER** (METIO) \* Scii/majstri sian metion (posséder) \* Ĉiu klopodu en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio (à chacun son métier, les vaches seront bien gardées).

**METTRE** (METI) (V. dans de mauvais draps/ habiller/ service/ plein la vue).

**MIEL** (MIELO) \* Mieni al iu mielon (être tout miel) \* Ne gutas mielo el ĉielo (V. ALOUETTE) \* Miel-monato (lune de miel).

**MIEUX** (PLI BONE) \* Manke de pli bona (à défaut de mieux) \* Kредu al mi, tiele estas pli bone (croyez-moi, c'est mieux ainsi) \* La plej bona, kion oni povas fari, estas... (le mieux que l'on puisse faire...) \* Plibono estas malamiko de bono (le mieux est ennemi du bien) \* Ju pli rapide, des pli bone (le plus vite sera le mieux).

**"MIJOTER"** \* Koncipiĝas io en lia kapo (il mijote, concocte qqc.).

680. **MILIEU** (MEZO) \* Trafi ĝuste en la mezon (taper juste au milieu).

\* Mi venis al vi por pasigi en via mezo unu semajnon (je suis venu ici pour passer une semaine au milieu de vous).

**MILLE** (MILO) \* Trafi meze la celon (mettre dans le mille).

**MINE** (MIENO) \* Afekti gravan, gajan, funebnan mienon (prendre un air grave, enjoué, d'enterrement)

\* Mieno : afabla, indiferenta, kontenta, tre ĝenita.

\* Ili faris mienon kvazaŭ ili laborus (il faisaient semblant de travailler) \* Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero (ne jugez pas sur la mine) KD 30/8

**MINORITÉ** (MALPLIMULTO) \* La malplimulto devas sin klini antaŭ la decido.

**MINUTE** (MINUTO) \* Li ne havas eĉ minuton perdeblan/por perdi (à perdre).

**MISÈRE** (MIZERO) \* Profunda, nigra mizero.

\* Fali, sinki en abismon de mizero (s'enfoncer doucement) \* Redukti iun al mizero. Jeti iun en mizeron \* Emociiĝi antaŭ tia mizero (s'émouvoir).

(V. MALHEUR) KD 20/5

**MODE** (MODO) \* Adopti novan modon. Vestita laŭ la plej nova modo (à la dernière mode).

Modo jam datiĝanta de ok jaroj \* Pri tiuj ideoj estas modo paroli kun ironia rideto (il est de bon ton d'en parler d'un petit rire ironique) KD 64/1

**MODÈLE** (MODELO) \* Si ne estas virtmodelo (un modèle de vertu) \* Estus la plej bone, se niaj amikoj ĉiam modeligadus sian stilon laŭ la stilo de "La Esperantisto" (ce que l'on pourrait souhaiter de mieux, c'est que nos amis modèlent leur style sur celui de "L'Espérantiste") \* Faru laŭ ilia modelo (suivez leur modèle).

**MODESTE** (MODĚSTA) \* Mia modesta persono

\* Modesta kiel violo \* Afekti modestecon (feindre la modestie).

**MOELLE** (MEDOLO) \* Tiri la medolon de verko (la substantifique moelle).

690. **MOEURS** (MORO) \* Rigidmora, severmora homo

\* Aliaj tempoj, aliaj moroj (autre temps autres mœurs).

**MOI** (MI) \* Kiu ne estas kun mi, estas kontraŭ mi (celui qui n'est pas avec moi est contre moi).

**MOINE** \* Kapuĉo monaĥon ne faras (l'habit ne fait pas le moine).

**MOINEAU** (PAĜERO) \* Por kapti birdon, salumu ĝian voston (mettre un grain de sel sur la queue d'un moineau).

**MOMENT** (MOMENTO) \* Momenton! Atendu nur momenteton. Kapti la oportunan momenton (saisir le bon moment). Ĝui tempeton de neokupiteco (avoir un petit moment de libre). Mi parolos al vi en tempo pli oportuna (je vous parlerai à un meilleur moment) \* En momento sen singlaro (d'inattention).

**MONDE** (MONDO) \* Vojaĝi tra la vasta mondo. Iri ĝis la ekstremo/fino/limo de la mondo. Loĝi en la fino de la mondo. La kvar anguloj de la mondo (aux quatre coins du monde) \* Ekde la kreo de la mondo. De kiam la mondo ekzistas (depuis que le monde est monde) \* Lasi la mondon iri kiel ĝi iras (laisser le monde aller comme il va) \* Pensi, ke li estas la centro de la mondo/de la universo \* Sed tio estus la renversita mondo (le monde renversé) \* Retiriĝi de la mondo.

\* Kontentigi la katon kaj kune la raton (on ne peut contenter tout le monde et son père).

**MONT** (MONT) \* Promesi orajn montojn (promettre monts et merveilles) \* Trans valoj kaj montoj (par monts et par vaux).

**MONTAGNE** (MONTARO) \* Monto gravediĝis, muso naskiĝis (c'est la montagne qui accouche d'une souris) \* Ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas (il n'y a que les montagnes qui ne se rencontrent pas).

**MONTRER** (SE) \* Montri siajn verajn kolorojn (se montrer sous son vrai jour).

**MOQUER** (MOKI) \* Mokadi kaj montradi iun per la fingro (se moquer et montrer qq. du doigt). Kovri iun per moko (tourner en ridicule) \* Mi vin instruos, kio estas moki min (je vous apprendrai à vous moquer de moi/vous verrez ce qu'il vous en coûtera) \* Kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas (s'en moquer complètement, comme de l'an quarante = pour ce qui ne me touche pas, que ça aille comme ça va).

700. **MORALE** (MORALO) \* Morala : premo, ŝuldo, apogo. Morala neceseco. Homo de alta moraleco (de haute moralité). Leĝoj de la moralo (la loi morale) \* Tiri la moralaĵon el io (tirer la morale) \* Doni al iu moralacionon. Fari al iu predikon pri moroj/solidan moralinstruon (faire la morale à qq.)

**MORT (MORTO)** \* Morto : subita, tragedia, tro frua, akcidenta. Morti per natura morto, de perforta morto (mort violente), haladzo (émanations), asfiksio \* Perei per glavo, en batalo \* Batis la horo de lia morto (son heure est venue). Kuraĝe alfronti la morton. Barakti kontraŭ la morto (se débattre) \* Meti iun en danĝeron/riskon de morto \* Aspekti pli morta ol vivanta (être plus mort que vif). KD 43/1...

**MORVEUX (NAZMUKA)** \* Kiu sentas sin nazmuka, viŝu la nazon (qui se sent morveux se mouche).

**MOT (VORTO)** \* Vortoj : gurditaj, kliŝitaj/stereotipaj, mielaj, galaj (ressassés, stéréotypés, doucereux, fielleux) \* Grandaj frazoj sed malplenaj vortoj (mots creux). Bombastaj vortoj (ampoulés) \* Avari/ŝpari vortojn (être avare de mots). Pesu ĉiun sian vorton (peser ses mots). Forpreni la vorton/parolon de sur ies lango (couper la parole à qq.). Havi la vorton sur la pinto de la lango (sur le bout dela la langue). Per unu vorto, kiel per cent \* Ne serĉi vorton en la poŝo (ne cherche pas ses mots). Dronigi ĉiujn en vortinundo (noyer tout le monde dans un déluge de mots). Tiu vorto elglitis el lia buŝo (lui a échappé). Lavango da vortoj (une avalanche de mots) \* Diri la finan vorton (avoir le dernier mot). Ankoraŭ la lasta vorto ne estas dirita (le dernier mot n'est pas dit). KD 49/4.5 \* Silento estas konsento (qui ne dit mot consent).

**MOTIF (MOTIVO.KAŬZO)** \* Estas nenia motivo/kaŭzo por malesperi. Havi bonan motivon plori.

**MOUCHE (MUŜO)** \* Kalkuli la muŝojn (pri lernanto) \* Aŭdeblas eĉ zum' de muŝo (on entend une mouche voler) \* Kia stranga muŝo vin pikis? (quelle mouche te pique?) \* Eĉ al muŝo ne fari malbonon (ne pas faire de mal à une mouche).

**MOUCHER (V. MORVEUX)**

**MOULIN (MUELEJO)** \* Ĝi estas akvo al lia muelejo (de l'eau à son moulin) \* Torentas el li la parolo/vortoj (c'est un moulin à paroles) \* Batali kontraŭ ventmuelejoj (se battre contre les moulins à vent).

**MOURIR (MORTI) (V. MORT)** \* Kuraĝe alfronti la morton. Barakti kontraŭ la morto (se débattre). Ŝvebi inter vivo kaj morto (suspendu entre la

vie et la mort) \* Prefere morti glore ol vivi malhonore (mourir debout plutôt que vivre couché)  
KD 43/1...

**MOUSSE** (V. PIERRE)

**MOUTON** (ŜAFO) (V. BREBIS) \* Kiel la ŝafoj de Panurgo. Ŝafe sekvi la antaŭirantojn (sivre les autres comme un mouton) \* Konduki iun kiel ŝafidojn al la buĉo (comme des agneaux à la boucherie) \* La publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj (qui suit les meneurs comme un troupeau de moutons).

710. **MOUVEMENT** (MOVO) \* Fari instinktan movon. Akceli movon (accélérer).

**MOYEN** (RIMEDO) \* Li trovas ĉiam eblon por elturniĝi (le moyen de s'en tirer) \* Lingvo devas esti por la homoj ne celo, sed rimedo (une langue doit être non un but mais un moyen). Jen rimedo relevi la ŝtaton (le moyen de redresser la situation de l'État) \* La celo pravigas la rimedojn (la fin justifie les moyens).

**MULE** (MULO) \* Ne konvinkebla ŝtipkapulo (tête de mule/de bois).

**MUR** (MURO) \* Esti enfermita inter kvar muroj. \* Alpremi iun al muro (mettre au pied du mur) \* La muro havas orelojn.

**MURER** (SE) \* Sin ĉirkaŭbari per silento.

**MURMURER** \* Oni flustras post lia dorso.

**MUSIQUE** \* Ĝui belan muzikon. Infano kun orelo sensiva por muziko (qui a l'oreille musicale). Havi grandajn dispoziciojn por la muziko \* Kun preskaŭ nenia muzika klereco (sans culture musicale ou presque). Esti surda al muziko (ne rien entendre à la musique). KD 44/1...28

**MYSTÈRE** (MISTERO) \* Fari el ĉio superfluan problemon (faire un mystère pour rien).

## N

**NAÎTRE** (NASKIĜI) \* Formulo de naskiĝakto. Duplikato de naskiĝatesto. Mi naskiĝis la 14an de Julio 1960. Mi estis naskita la... \* La lando, kiu vidis lin naskiĝi (le pays qui l'a vu naître). \* Pli bone estus al li, se li neniam estus naskita. \* Naskita sub favora astro (né sous une bonne étoile) \* Ne hieraŭ mi venis en la mondon (je

ne suis pas né d'hier, de la dernière pluie).

**NATURE** (NATURO) \* Ami la naturon. Vivi en la naturo \* La kuracistoj povas nur helpi la naturon. Lasi la naturon agi mem (laisser faire la nature). \* Tio nepre kuŝis en la naturo de la aferoj (c'était dans la nature des choses) \* Kutimo estas dua naturo \* Sekvi siajn naturajn inklinojn (ses tendances naturelles).

720. **NAUSÉE** \* Efikas naŭze (ça donne la nausée). Naŭzas al mi (j'ai la nausée) \* Senti naŭzon ĉe legado de firomano (avoir la nausée à la lecture d'un roman infect).

**NE...PAS** \* Tio ne koncernas min (ne me concerne pas). Ne min tio koncernas (cela concerne qq. mais pas moi) \* Ŝi ne povis ne vidi, ke... (elle ne pouvait pas ne pas voir que...). Oni ne povis ne fari tiun ĉi provon (on ne pouvait pas ne pas faire cet essai). Se li ne volas kanti, li povas ne kanti (s'il ne veut pas chanter, il peut ne pas chanter). Mi ne povas ne esprimi mian indignon. Mi ne povis ne iri tien (je ne pouvais pas ne pas y aller). Mi ne neas, ke li estas freneza (je ne nie pas qu'il soit fou).

Remarque : A une question comprenant une négation "Ĉu vi ne vidis lin?" vous répondrez par ex.: "Non, je ne l'ai pas vu", alors que certains peuples (Japonais, etc) diront : "Oui, je ne l'ai pas vu". Donc : "NE" ou "JES" !

**NÉCESSAIRE** (NECESA) \* Mi ne opinias tion necesa (je ne pense pas que ce soit nécessaire). Ĉu estas efektive necese, ke... (est-ce vraiment nécessaire que...). Senti la neceson silenti (comprendre la nécessité de se taire). En okazo de efektiva neceseco (en cas de nécessité absolue) \* El neceseco oni devas fari virton (faire de nécessité vertu).

**NEIGE** (NEĜO) \* Neĝo falas/neĝas en grandaj flokoj. Neĝo falas dense \* Neĝo kovras teron/tero estas kovrita de neĝo. Dika tavolo da neĝo (épaisse couche de neige) \* Trabati al si vojon en la neĝo (se faire un chemin dans la neige en piétinant) \* Buboĵ batalantaj per neĝobuloj. \* Suno, kiu disfandas la neĝan homon (le soleil qui fond le bonhomme de neige) \* Neĝo glimas sub la suno (brille: comme du mica). Neĝo vatas

la tutan pejzaĝon (ouate le paysage). La neĝo klinas al la tero la branĉojn de l' abio \* Kie jam la neĝo antaŭjara? (où sont les neiges d'antan?)  
KD 65/14.15

**NERF** (NERVO) \* Li havas ŝtalajn nervojn. Liaj nervoj ne eltenas plu (ses nerfs ne tiennent plus) \* Nervoze tamburi per fingroj sur la tablo. Mi fariĝis nervoza ĉe penso havi sub mia respondeco centojn da personoj.

**NEUF** \* Kio nova, ĉu bono aŭ malbono? \* Kiam vi ekparolis, mi atendis aŭdi ion novan (quand vous avez pris la parole, je m'attendais à quelque chose de neuf).

**NEZ** (NAZO) \* Nazo : rekta, hoka (crochu), plata, kuspita (retroussé). Mukplena nazo (morveux). "Mungi" sian nazon (moucher) \* Teni la nazon supren (le nez en l'air). Iri laŭ sia nazo. Sekvi sian nazon (= agi laŭ instinkto). Tuj antaŭ ies nazo (au nez et à la barbe de...) \* Konduki iun je la nazo (par le bout du nez) \* Ne montri eĉ la pinton de sia nazo (ne pas montrer le bout de son nez) \* Vidi nur ĝis la pinto de sia nazo (pas plus loin que le bout de son nez) \* Platigi sian nazon sur fenestra vitro (coller son nez à la fenêtre) \* Ricevi nazofrapon (pan sur le bec!). Ĉien ŝovi sian nazon (mettre son nez partout) \* Frapfermi la pordon antaŭ ies nazo (claquer la porte au nez de qq.) \* Sur mia nazo ne estas skribite, ĉu mi havas monon (ce n'est pas écrit sur mon nez, si j'ai ou non de l'argent) \* Havi ulnolongan nazon (long d'une aune).

**NIVEAU** (NIVELLO) \* Mil metrojn super la nivelo de la maro.

**NOEUD** (NODO) \* Malligi, malplekti nodon (défaire un noeud) \* Jen estas la nodo de la demando (voilà bien le noeud du problème).

**NOIR** (NIGRA) \* Nigro sur blanko (noir sur blanc).

730. **NOM** (NOMO) \* Koni iun laŭ la nomo (par son nom). Literumi sian nomon (épeler) \* Prezenti sin sub falsa nomo (se présenter sous un faux nom) \* Salutu lin en mia nomo \* Sanktigita estu via nomo (que votre nom soit sanctifié).

**NON** (NE) \* Se ne, do ne! (si c'est non, c'est non!) \* Diri neon/negon al ĉio (dire non à tout).

**NOUVEAU** \* Ĉion novan oni ŝatas, malnovan oni forlasas. Kio novas, tio belas (tout nouveau, tout beau (proposé par Ribot).

**NOYER (SE)** \* Dronanto eĉ herbeton kaptas (un homme qui se noie s'accroche à tout).

**NUE** \* Glori iun ĝisĉiele (porter aux nues/au pinacle).

**NUIT (NOKTO)** \* La nokto falas. Noktiĝas (la nuit tombe). Sub mantelo de la nokto \* Tranokti sub libera ĉielo (passer la nuit à la belle étoile). Pasigi nokton maldorme (passer une nuit blanche). Resti sendorme tutajn noktajn horojn \* Dormo donas konsilon (la nuit porte conseil) \* Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas (la nuit, tous les chats sont gris).

**NUMÉRO (NUMERO)** \* Eltiri senŝancan numeron (tirer un mauvais numéro).

## O

**OBÉIR (OBEI)** \* Obei la patron. Blinde obei. Blinda obeemo. Ŝuldi obeadon al iu (devoir obéissance à qq.).

**OBJET (OBJEKTO)** \* Objekto de publika klaĉo/parolo (objet de commérages).

**OBLIGATION** \* Liberigi iun el sub devigiteco (libérer qq. d'une obligation) \* Li ne volas devontigi sin al estonta pagado (il ne veut pas s'obliger à.../ s'engager à des dépenses futures).

740. **OBSCURITÉ (MALLUMO)** \* Fulgonigra mallumo (fulgo = suie). Palpebla mallumo (obscurité complète)

**OBSTACLE (OBSTAKLO) (V. DIFFICULTÉ)**

**OCCASION (OKAZO)** \* Okazo neniam revenonta (une occasion qui ne se présentera plus) \* Uzi, kapti la okazon. Profiti de la okazo \* Fordormi la okazon (laisser échapper l'occasion "en dormant") \* Kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne (= ne plu) retrovos (celui qui laisse fuir l'occasion ne la retrouvera pas) \* Kaptu la okazon ĉe la kapo, ĉar la vosto estas glita (vosto = queue ; glita = glissant) \* Mi uzas la okazon, por revoki en vian memoron, ke... (je saisis l'occasion pour vous rappeler que...) \* Okazo faras/kreas ŝteliston (l'occasion fait le larron).



**OCCUPER (ZORGI)** \* Zorgi pri vi, kaj nenion pli (occupez-vous de vous, et rien de plus). Li okupiĝas nur pri sia propra persono.

**ODORAT** \* Havi delikatan flaradon (bon odorat).

**OEIL (OKULO)** \* Okuloj : inteligentaj, lacaj, arogantaj, penetremaj... Okulojn : levi, fermi, streĉi. Okuloj : radias, ĵetas fulmojn, ronde malfermiĝas, ne povas satiĝi je la vizado de..., preskaŭ elŝoviĝas el kavoj \* Kuraĝe rigardi iun en la okuloj. En palpebruma daŭro (en un clin d'oeil). Ne kredi al siaj okuloj (ne pas en croire ses yeux)

\* Havi fremdan korpon en la okulo (avoir qq. dans l'oeil) \* Okulon pro okulo, denton pro dento

\* Gardi ion kiel la pupilon de siaj okuloj \* Apenaŭ

teni la okulojn malfermitaj (tenir tout juste les yeux ouverts) \* Fermi strute la okulojn antaŭ

la faktoj (ne pas vouloir ouvrir les yeux devant les faits) \* Havi la okulojn pli grandajn ol la

ventro \* Ŝiaj okuloj kovriĝis per vitreca vualo, kiu tamen ne fandiĝis en formo de larmoj.

(V. Paille et poutre). KD 46/1... (140 expressions)

"OKULO. RIGARDI"

**OEUF (OVO)** \* La kokino metas/demetas/ellasas ovojn (pond). Ovo ĵus metita (frais pondu) \* Sorbi,

suĉi krudan ovon (gober un oeuf cru) \* Bati ovon.

Kirli ovoblonkon al ŝaŭmo (battre un blanc d'oeuf en neige) \* Enŝele boligitaj ovoj (des oeufs à la coque).

Ovoblonko. Flavo de ovo \* Ovingo (coquetier) \* Mi volas havi la ovon kuirita (= ke la

ovo estu kuirita) \* Pli valoras tuj ovo ol poste bovo (un "tiens" vaut mieux que deux "tu l'auras")

\* Ĉu ovo aŭ kokino ekzistis pli frue? (qu'y a-t-il eu d'abord?) \* Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas

sen falo (on ne fait pas d'omelette sans casser des oeufs) \* Fari dancon inter ovoj (marcher sur des oeufs). KD 40/22 + 12/22.

**OEUVRE (VERKO)** \* Koniĝas majstro laŭ sia verko.

**OFFENSE (OFENDO)** \* Ĵeti ofendon al iu en la vizaĝon (faire un affront à qq.). Ne enpoŝigi ofendon (ne pas laisser passer une offense, ne pas encaisser un camouflet).

Venĝi ofendon. Glate gluti ofendon (avalier sans rien dire). Preni ion kiel

ofendon (prendre qqc. pour un affront).

**OIE** (ANSERO) \* Stulta kiel ansero.

750. **OISIVETÉ** (PIGRECO) \* Pigreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj (la paresse est mère de tous les vices).

**OMBRE** (OMBRO) \* Sekvi iun kiel ties/lia ombro.

\* Esti nur la ombro de si mem \* Timi eĉ sian propran ombron (avoir peur de son ombre) \* Lasi ion en ombro \* Jeti ombron \* Sen ia nombro da dubo (sans l'ombre d'un doute) \* Estas tubero en la afero (il y a une ombre au tableau).

**OMELETTE** (OMLETO) (V. OEUF).

**OPÉRATION** (OPERACIO) \* Operacio de la unua urĝeco (de toute première urgence). Fari operacion. Tiu operacio tre doloras. Tre traumatiza operacio. Operacia ŝoko. KD 47/1...

**OPINION** (OPINIO) \* Bazita, fundamentita opinio (une opinion qui a des fondements sérieux) \*

Bazi sian opinion. Esprimi sian opinion. Diri libere sian opinion. Sin apogi sur ies opinio. Kolekti opinion de siaj amikoj (prendre l'avis de ses amis).

Lia opinio ne multe pezas en la pesilo (ne pèse pas beaucoup).

Estas abismo inter ambaŭ/tiuj du opinioj. Diversaj fluoj de opinioj (divers courants)

Ne zorgu pri tio, kion la najbaroj opinias (ne vous occupez pas de l'opinion de vos voisins).

Fari al si juĝon pri iu/io (se faire une opinion sur...). Li multe suferis pro siaj opinioj. Post la diskuto, la opinioj ankoraŭ tre diverĝis. Apelacii al la publika opinio. Altrudi perforte sian opinion (imposer par la violence).

Ekstermi opinion. Arte fabrikita opinio, kiun oni perforte enbatas en la cerbon de ĉiuj. Diskonigi sian opinion per la kanalo de revuo.

**OPTIMISME** (OPTIMISMO) \* Vidi la mondon rozkolora (voir les choses en rose).

**OR** (ORO) \* Ne ĉio brilanta estas diamanto. Ne ĉio kio brilas estas oro \* Tiu edzo estas vera perlo (un mari en or) \* Paroli estas arĝento, silenti estas oro (la parole est d'argent, le silence est d'or).

**ORDRE** (ORDO.ORDONO) \* Inversigi la naturan ordon de la aferoj (modifier l'ordre naturel des choses) \* Ĉio estas en ordo! (tout va bien/tout

est parfait/rien à dire). Rakonti ĉion laŭ ordo (raconter tout dans l'ordre) \* Ordonon : respekti, observi, forĵeti, plenumi, disdoni.

**OREILLE (ORELO)** \* Orelo : delikata, fajna (fine: musicien). Trejnita orelo distingas facile la sonojn (oreille entraînée). Havi malbonan orelon. Esti surda je la dekstra orelo (de l'oreille droite). Meti la manon tube/konke al la orelo (en cornet). Klini la orelon al ies parolo (pencher l'oreille vers celui qui parle). Streĉi la orelon (tendre). Ekzerci sian orelon \* La muro havas orelojn (les murs ont des oreilles). Orelojn ili havas sed ne aŭdas (Ils ont des oreilles et ne veulent pas entendre = il n'y a pire sourd...). Resti surda al ies peto (faire la sourde oreille) \* Tra unu orelo eniras, tra la dua eliras (cela lui entre par une oreille, et lui sort par l'autre) \* Ventro malsata orelon ne havas (ventre affamé...) \* Ne kredu al orelo, kredu al okulo (faites confiance à ce que vous voyez, pas ce que vous entendez) \* Senĉese gurdion en ies orelojn (rebattre les oreilles à qq.) \* La diablo furiozus, se io simila alvenus al liaj oreloj. KD 48/1...(45 expressions).

**OS (OSTO)** \* Konsisti nur el haŭto kaj ostoj (n'avoir que la peau et les os) \* Li ne faros maljunajn ostojn \* Malsekiĝi ĝis la haŭto/ostoj (trempe jusqu'aux os) \* Estas tubero en la afero (il y a un os) \* \* Ĉu tiuj ĉi ostoj meritis nenion alian, ol ke oni ludu per ili keglojn? (est-ce que ces os pouvaient mériter autre chose, que de servir de jeu de quilles?)

KD 30/13

760. **OUBLIER (FORGESI)** \* Oni ne forgasas facile sian unuan amon \* Kulturo estas tio, kio restas, kiam oni ĉion forgesis \* Kulpa je forgeso. Ripari forgeson.

**OURS (URSO)** \* Grumblema kiel urso (c'est un ours!) \* Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon (ne vendez pas la peau de l'ours avant de l'avoir tué).

## P

**PAILLE (PAJLO)** \* Fajro de pajlo \* En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas (la paille et la poutre) \* Loti pri kiu ludos la

unua (tirer à la courte-paille).

**PAIN** (PANO) \* Vivi nure per pano kaj akvo (au pain sec et à l'eau). Manĝi la sekan panon de migrulo (manger de la vache enragée). Akiri vivpanon per la ŝvito de la frunto (gagner son pain à la sueur de son front) \* "Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ" (donnez-nous aujourd'hui notre pain quotidien) \* Elpeli iun el la mondo de la vivantoj (faire perdre le goût du pain à qq.).

**PAIRE** (PARO) \* Du botoj faras paron (= el du unuj unu paro) (les deux font la paire).

**PAIX** (PACO) \* Se vi volas pacon, preparu pacon. \* Mi venis por enkonduki ne pacon, sed glavon. Paco al lia cindro! (paix à ses cendres!) \* Iru en paco!

**PAPE** (PAPO) \* Ne agnoski la neerarivecon de papo pri dogmoj (ne pas reconnaître l'infaillibilité du pape) \* La katolikoj kredas sian papon neerarema \* Esti en Romo kaj ne vidi la papon! (ne pas voir l'essentiel).

**PAQUET** (PAKAĴO) \* Deponi pakajo en pakotenejo (déposer un paquet à la consigne).

**PARCOURIR** (TRAIRI) \* Trairi landon laŭ longo kaj larĝo (parcourir une région de long en large).

**PARDONNER** (PARDONI) \* Li ne esperu pardonon! Noble pardoni la ofendojn. Mi pardonas, kondiĉe ke vi neniam plu kulpu tiun kulpon (à condition que vous ne récidiviez pas). Preta forspongi la pasintaĵon (prêt à effacer le passé).

770. **PAREILLE** \* Kiel li agis kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ li (rendre la pareille).

**PARENT** (PARENCO) \* Parenco per vira branĉo (parent par mon père).

**PAREŜSE** (PIGRO) \* "Pigro" estas patrino de ĉiuj malvirtoj.

**PARFOIS** \* Foje jes, foje ne (parfois oui, parfois non).

**PARIER** (VETI) \* Mi vetas cent kontraŭ unu, ke morgaŭ pluvos.

**PARIS** \* Ne en unu tago elkreskis Kartago (Paris ne s'est pas fait en un jour).

**PARLER** (PAROLI) \* Paroli el la profundeco de sia koro (parler du fond de son cœur); per vortoj kovritaj (à mots couverts), kun flameco (flamme),

dolĉe en la orelon (doucement à l'oreille). Paroli al si mem (parler à soi-même). KD 49/1...

Paroli tekse-mikse/aĉe-klaĉe (à tort et à travers)

\* Ne paroli alie, ol kun ironia rideto (ne pas pouvoir parler sans avoir un rire ironique).

**PARMI** (V. au milieu de vous)

**PAROLE** (PAROLO) (V. PARLER) \* Parolon: doni, rifuzi, interrompi. Sorbi ies parolojn (boire les paroles de qq.). Neniu prenas serioze lian parolon (personne ne prend ses paroles au sérieux)

\* Ne parolu, sed agu (pas de paroles, mais des actes) \* Li parolas kiom la vortoj povas torenti el la buŝo (c'est un moulin à paroles). Torentas el li la parolo/vortoj (un flot, un déluge de paroles).

Lasi ion elgliti el la buŝo/de sur la lango (laisser échapper une parole malheureuse) \* Diron oni neas, skribo ne pereas (les paroles s'envolent, les écrits restent) \* Paroli estas arĝento, silenti estas oro (la parole est d'argent...) KD 49/1 (plus de 100 expressions).

**PART** (PARTO) \* Preni sian parton el io \* Li ricevis pli ol kiom lia porcio (plus que sa part).

780. **PARTAGER** (DIVIDI) \* Dividi kun iu ties sorton (partager le sort de qq.) \* Kiel malegale estas dividitaj la sortoj en ĉi tiu mondo!

**PARTIR** \* For subite kiel eble! (fiche-moi le camp en vitesse!)

**PAS** (PAŜO) \* Kun firmaj, plumbaj, hezitaj, malcertaj paŝoj (d'un pas ferme, lourd, hésitant, incertain)

Egalmezura paŝado (d'un pas égal). Marŝi samtakte (d'un même pas). Malrapidigi siajn paŝojn (ralentir)

Iri etpaŝe (à petits pas). Rekoni ies paŝadon (la démarche) \* Unu paŝo antaŭen, du paŝoj posten (un pas en avant, deux en arrière) \* Ni paŝo post paŝo atingos la celon en gloro (pas à pas nous atteindrons glorieusement notre but).

**PASSE** \* Esti en prema situacio (être dans une mauvaise passe).

**PASSÉ** \* Tio jam apartenas al la paseo/estinteco (c'est déjà du passé). En la ĵus pasintaj tempoj/ĵustempe (dans un passé récent) \* Revokadi la forpasintan tempon (rappeler le passé) \* Farita ne refariĝos (le passé est révolu) \* Ne bedaŭru hieraŭon (ne regrettez pas le passé) \* En tempo

pasinta ni ĉerpu instruon por tempo venonta (puisons dans le passé des enseignements pour l'avenir). Forspongi la pasintaĵon (effacer la passé/passer l'éponge).

**PASSER** (PASI) \* Pasu do tra la fenestro, se la pordo estas fermita \* Pasigu al mi la korbon (Passez moi la corbeille) \* Tio antaŭlonge pasis, eble eĉ ne okazis (c'est passé depuis longtemps, cela n'a peut-être même pas existé).

**PASSION** (PASIO) \* Fatala, senbrida pasio. Boli de pasio. Blindigita de pasio (aveuglé par la passion) Eksciti la pasion (attiser). Komandi siajn pasiojn. Regi super siaj pasioj (dominer) \* Konsolon tempo donas al la koro (le temps assagit les passions).

**PATIENCE** (PACIENCO) \* Montri, havi anĝelan paciencon/febran senpaciencon. Perdi sian paciencon. Esti ĉe la limo de sia pacienco. Perdigi al iu la paciencon. Rekomendi al iu la paciencon. Trouzi ies paciencon (abuser de). Mordeti al si la ungojn de senpacienco.

**PATTE** (PIEDO) \* Rampi sur manoj kaj piedoj/ mane-piede (marcher à 4 pattes) \* Fari veluran piedeton (faire patte de velours) \* Ŝmiri ies manon/Olei ies bonvolon (graisser la patte de qq.). For la manojn! (bas les pattes!).

**PAUVRE** (MALRIĈA) \* Malriĉeco ne estas krimo/malvirto (pauvreté n'est pas vice) \* Malriĉa kiel preĝeja muso (pauvre comme Job) \* Krom la vestaĵo sur la korpo li havas/posedas nenion (= li havas kion li surhavas)(il n'a que ce qu'il porte sur lui).

790. **PAYER** (PAGI) \* Tiaj oficoj estas tre bone pagataj (ces emplois sont très bien payés) \* Pagi per sonantaj taleroj (en espèces sonnantes et rébuchantes) \* Pagi per naturaĵoj (en nature) \* Iru nun, vi estas pagita (vous pouvez partir maintenant, vous êtes payé) \* De nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ \* Riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu (qui paie ses dettes s'enrichit). \* Li kare pagos tion (= tio kostos al li multe) (il le paiera cher!) \* Priridi iun alvizaĝe (se payer la tête de qq.).

**PAYS** (LANDO) \* La lando, kiu vidis lin naskiĝi (le pays qui l'a vu naître). Atakis/kaptis lin hejmo-

sopiro (mal du pays) \* Neniu estas profeto en sia urbeto (nul n'est prophète en son pays).

**PEAU** \* Mi ne deziras esti en lia haŭto. Li timas pri sia kara haŭto. Riski sian haŭton. Savi sian haŭton \* Konsisti nur el haŭto kaj ostoj (n'avoir que la peau et les os) \* Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon (ne vendez pas la peau de l'ours avant de l'avoir tué).

**PÉCHÉ** (PEKO) \* La origina peko. La sep mortmeritaj pekoj (mortels). Veniala peko (véniel). Fali en pekon. Refali en sian malnoyan pekon. Konfesi sian pekon. Gardu vin kontraŭ peko. Ŝi pentis tutkore pri sia peko \* Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu al ŝi ŝtonon (que celui d'entre vous qui est sans péché, lui jette la première pierre). \* Al homo pekinta senintence, Dio facile pardonas (à tout péché miséricorde).

**PÊCHER** (FIŜI) \* En akvo malklara oni fiŝon kaptas facile (pêcher en eau trouble).

**PEDIBUS...** \* Veturi sur sia paro da kruroj (pedibus cum jambis).

**PEINE** (PĒNO) \* Ne domaĝi la penon (ne pas ménager sa peine). Ŝpari nek penon, nek admonon por...

**PEINE (Ā)** (APENAŬ) \* Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon...

**PÉLERIN** (PILGRIMANTO) \* Preni bastonon de migrulo (prendre son bâton de pèlerin).

**PENCHANT** \* Sekvi siajn naturajn inklinojn.

800.**PENCHER** (SE) \* Sin klini malantaŭen (se pencher en arrière).

**PENDRE** (V. CORDE)

**PENSÉE** \* Inspiri, suflori, sugesti penson/ideon. Droni, profundigi en siaj pensoj. Kolekti siajn senordajn pensojn (mettre de l'ordre dans ses idées). Io absorbas, okupas lian tutan penson. La penson sekvis ago (l'acte a suivi l'idée). Deturni ies pensojn pri io (détourner qq. de ses pensées). Estas malfacile sekvi viajn pensojn (il est difficile de vous suivre dans le déroulement de vos idées).

**PENSER** (PENSI) \* Mi pensas, do mi ekzistas (donc je suis). Mi opinias, ke... (je pense que...) \* Laŭ mia opinio, vi malpravas (selon moi, vous avez tort) \* Antaŭ ĉio pensu pri vi mem \* Apriore

oni povas pensi, ke...

**PENTE (DEKLIVO)** \* Veni sur fatalan deklivon (se trouver sur une pente dangereuse). Milde leviĝanta deklivo (une montée en pente douce).

**PERDRE (PERDI)** \* Ke mi nur ne perdiĝu! (surtout, que je ne me perde pas!) \* Droni en detaloj (se perdre dans les détails) \* Kiu tro multe deziras nenion akiras (on risque de tout perdre en voulant trop gagner) \* Prokrastita ne estas perdita (ce n'est que partie remise).

**PÈRE (PATRO)** \* Kia patro, tia filo (tel père, tel fils) \* Kontentigi la katon kaj kune la raton (contenter tout le monde et son père) \* Patro nia, kiu estas en la ĉielo (notre père qui êtes aux cieux). Li volis ekpreĝi Patronian (dire son Notre-Père). Mi patris al vi (j'étais comme un père pour toi) (D'où, à titre de curiosité, d'après Piron, la formule confucéenne : "Patro patru, filu fil' " (que le père se conduise en père et le fils en fils).

**PÉRIL (RISKO)** \* Fari ion je propra risko (à ses risques et périls).

**PÉRIR (PEREI)** \* Perei/droni kun homoj kaj varoj (= kun homoj kaj musoj) (périr corps et biens) \* Kiu kaptas glavon pereos per glavo (quiconque se sert de l'épée, périra par l'épée).

**PERLE** \* Tredi fadenon tra perloj/bidoj (enfiler des perles) \* Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn.

810**PERMETTRE (PERMESI)** \* Peti, doni, atingi, profiti, uzi la permeson fari ion. Malobei, transpaŝi la permeson (outrépasser) \* Peti la permeson, ke ...u. \* Kiom la cirkonstancoj tion permesis, li penis esti eleganta (pour autant que les circonstances le lui permettaient, il s'efforçait d'être élégant).

**PERSONNE (PERSONO)** \* Li okupiĝas nur pri sia propra persono \* Veni en sia propra persono (venir en personne). Fari siajn aferojn mem, per sia propra persono (par soi-même) \* Trovi amikon en la persono de sia mastro (en la personne de...) Ĉion rigardi tra sia persona vitro (voir les choses à travers son optique personnelle).

**PERSPECTIVE (PERSPEKTIVO)** \* Malfermi novajn perspektivojn/horizontojn.

**PERTE (PERDO.PEREO)** \* Vendi varon malprofite



(à perte) \* Konduki iun en plenan pereon/ruinigon  
(à sa perte).

**PESER** \* Pesi ĉiun sian vorton (peser tous ses mots) \* Ne multe pezi ĉe la peso (ne pas peser lourd) \* Pesado de la motivoj por kaj kontraŭ (peser le pour et le contre).

**PESSIMISME** (PESIMISMO) \* Vidi ĉion nigra.

**PÉTRIN** (V. SITUATION) \* Sidi en vera kaĉo (être dans le pétrin).

**PEU** (MALMULTE) \* Kontentiĝi per malmulto/nemulto (se contenter de peu) \* Ne malmulte mankis, ke... (il s'en est fallu de peu que...).

**PEUR** (TIMO) \* Ne ekzistas kaŭzo por timi (il n'y a pas de raison d'avoir peur) \* Glaciigita de timo. Glaciigita de teruro (être transi de peur). Tremi de timo (trembler de peur). Venki sian timon. La timo havigis al li flugilojn (la peur lui a donné des ailes). Timi eĉ sian propran ombron (avoir peur de son ombre) \* Esti al iu kiel ruĝa drapo al taŭro.

**PICK-POCKET** \* Gardu vin kontraŭ poŝo-ŝtelistoj! (méfiez-vous des pick-pockets).

820.**PIE** (PIGO) \* Ŝteli kiel pigo (voleur comme une pie).

**PIED** (PIEDO) \* Havi platajn piedojn (les pieds plats). Suferi je la piedoj. Dolorige surtreti la piedojn de iu (marcher sur les pieds de qq., et lui faire mal). Treti ion per la piedoj (fouler aux pieds) \* Perdi la grundon/teron el sub la piedoj (perdre pied). Havi piedtenon (avoir pied dans l'eau) \* Li staras firme sur la plandoj (= kun ambaŭ piedoj sur tero) (avoir les pieds sur terre) \* Ne scii sur kiun piedon stariĝi (ne pas savoir sur quel pied danser) \* De l'kapo ĝis la piedoj (= de verto ĝis la plandoj = de la verto ĝis la piedfingroj) (de la tête aux pieds, de pied en cap) \* Protesti kontraŭ io per manoj kaj piedoj (faire des pieds et des mains) \* Improvize organizi (au pied levé). (V. CHAUSSURE) KD 51/1...5

**PIÉDESTAL** \* Sidigi iun sur altan selon (mettre qq. sur un piédestal) \* "Descendigi" iun de lia alta ĉevalo/piedestalo.

**PIÈGE** (KAPTILO) \* Prepari/meti kaptilon por/kontraŭ iu (tendre un piège) \* Implikiĝi en kaptilon (s'empê-

trer dans un piège) \* Fali en memfaritan kaptilon (se faire prendre à son propre piège).

**PIERRE** (ŜTONO) \* Trafi du celojn per unu ŝtono (faire d'une pierre deux coups) \* Alporti sian briketon/ŝtonon al la konstruo (apporter sa pierre à l'édifice) \* Eĉ ŝtono verdigās, se ĝi longe ne moviĝas (≠ pierre qui roule...) (= tro da metioj - profitoj neniaj) \* Havi ŝtonon por koro (un coeur de pierre) \* Ŝtono de falpuŝiĝo (pierre d'achoppement). (V. PÊCHER).

**PILULE** (PILOLO) \* Dolĉigi amaran pilolon (rendre la pilule moins amère) \* Engluti multon amaran/gluti la maldolĉan pilolon (avalier la pilule) (= devi toleri senvorte).

**PINACLE** (PINAKLO) \* Glori iun ĝisciele (porter au pinacle/aux nues).

**PIRE** \* Dividi kun iu bonon kaj malbonon (pour le meilleur et pour le pire).

**PIS** \* Trafi de Scilo al Ĥaribdo (de mal en pis).

**PITIÉ** (KOMPATO) \* Veki kompaton (inspirer la pitié). Eksenti kompaton por iu (être pris de pitié pour...) \* Ĉiu estu bona kaj kompatema al sia frato (que chacun soit bon et compatissant pour son prochain) \* Pli bone estas enviigi ol kompati (il vaut mieux faire envie que pitié).

830. **PLACE** (LOKO) \* Ili pridisputis la unuan lokon (se disputaient la première place) \* Cedi sian lokon (céder sa place) \* Kiu bone sidas, lokon ne ŝanĝu (qui quitte sa place, la perd) \* Se mi estus en/sur via loko (à votre place). Mi sur via loko forrifuzus (à votre place je renoncerais) \* Imagu vin en mia loko/situacio (mettez-vous à ma place).

**PLAFOND** (PLAFONO) \* Havi muŝojn en la cerbo (= muŝo zumas en lia kapo) (avoir une araignée au plafond).

**PLAIDER** (PLEDI) \* Gravaj argumentoj pledas por ĝenerala akcepto de Esperanto \* Levi la voĉon favore al iu (plaider en faveur de qq.). Fariĝi ies advokato.

**PLAINDRE** (KOMPATI.DOMAĜI) \* Kompati kun iu. Senti kompaton al iu (avoir de la pitié pour). \* Ne domaĝu la monon, la elspezojn (ne plaignez pas l'argent) \* Ne domaĝi sian penon (ne pas

plaindre/ne pas ménager sa peine) \* Avari al iu la nutraĵon (plaindre la nourriture à qq.)

\* Doni al iu kaŭzon plendi. Plendi ĉe tribunalo. Deponi/meti plendon kontraŭ iu \* Plendi kontraŭ la sorto. Senfina litanio de plendoj. Ne havi eĉ vorteton de plendo (sans formuler la moindre plainte). (V. PLAISIR)

**PLAIRE (PLAĈI)** \* Kiel plaĉas al vi! (Comme il vous plaira) \* Tre plaĉas al mi ĉi tie (je me plais ici). Faru laŭ via plaĉo (faites comme vous voudrez). Ne plaĉos al li, se vi tion faros (si vous vous engagez dans cette voie, cela ne lui plaira sûrement pas).

**PLAISANTERIE (ŜERCO)** \* Ŝerco : triviala, maldelikata, malkonvena, ofenda, sensprita.

\* Ne havi emon ŝerci. Esti en ŝercema humoro (avoir le coeur à plaisanter) \* Tio ne estas ŝerco. La ŝerco maltrafis (a porté à faux), retrotrafis. (s'est retournée contre son auteur) \* Sufiĉe da ŝerco. Li ne komprenas ŝercon. Troigi la ŝercon (exagérer). Fari ŝercojn. Ŝerce dirite. Preni ion kiel ŝercon (prendre qqc. pour une plaisanterie) \* Fari bonan mienon post ofenda/malbona ŝerco (ne pas le prendre mal).

**PLAISIR (PLEZURO)** (V. PLAIRE) \* Fari ion por sia propra plezuro (faire qqc. par plaisir). Vojaĝi por plezuro. Anticipi plezuron (jouir d'un plaisir par avance) \* Vi faros al mi grandan komplezon, se... (vous me ferez le plus grand plaisir, si...)

\* Agrabla estas gasto, se ne longe li restas (les plaisirs les plus courts sont les meilleurs) \* Aĝi arbitre (selon son bon plaisir).

**PLAN (PLANO)** \* Planon : teksti, plekti, ŝpini. \* Ni devas meti niajn personajn gustojn sur la lastan planon (nous devons rejeter nos préférences au dernier plan).

**PLANCHE (TABULO)** \* Li translokiĝis inter ses tabuloj (cloué entre quatre planches).

**PLEIN (PLENA)** \* Ŝi kolektis de ĝi kolocintojn, plenan sian robon (elle ramassa des coloquintes, plein sa robe).

840. **PLEURER (PLORI)** (V. LARME) \* Rido matene, ploro vespere (tel qui rit vendredi, dimanche pleurera) \* Ne povi sin deteni de plorado (se retenir

de pleurer) \* Li demandis ŝin, pro kio ŝi ploras (pourquoi pleure-t-elle) \* Larmi senŝeligante cepojn (pleurer en épluchant des oignons). KD 54/6  
**PLEUVOIR** (PLUVI) (V. PLUIE) \* Pluvas kvazaŭ verŝate per siteloj/trogoj (il pleut à seaux). Pluvo torentas (il pleut à torrents). Pluvas per grandaj/dikaj gutoj (à grosses gouttes).

**PLIER** (FALDI) \* Pli bone fleksiĝi ol rompiĝi (mieux vaut plier que se rompre) \* Fleksi, rompi ies obstinon (faire plier qq.) \* Kvaroble faldi paperfolion. Duige faldi tapiŝon.

**PLUIE** (PLUVO) (V. PLEUVOIR) \* Abunda, kvieta, martelbata pluvo \* Falis gutoj post gutoj kaj baldaŭ fariĝis vera pluvego (Quelques gouttes tombèrent d'abord qui se transformèrent en véritable averse). Ĉesis la pluvo \* Post vetero malbela lumas suno plej bela (après la pluie, le beau temps) \* Ne hieraŭ mi venis en la mondon (je ne suis pas né de la dernière pluie = d'hier).

**PLUME** (PLUMO) \* Trempi sian plumon en galon/en venenon (tremper sa plume dans le fiel, le poison). \* Pavi per fremdaj plumoj (= alprunti pavajn plumojn = sin ornamu per fremdaj plumoj) (se parer des plumes du paon).

**PLUS** (PLI) \* Tio ĉi estas pli, ol mi kuraĝis esperi (c'est plus que ce que je pouvais espérer) \* Mi povas fari nenion pli, ol silenti (je ne peux rien faire de plus que de me taire) \* Senlace li iris pli kaj pli profunden en la arbaro (s'enfonçait de plus en plus).

**POIDS** (PEZO) \* Klinita/kurbiĝi sub la pezo de la jaroj \* Kia estas la pezo de tiu valizo?

**POING** (PUGNO) \* Kunpremi la manojn en pugnojn (serrer les poings). Minaci iun per pugno. Li havas fortan pugnon (il a un sacré poing). Bati la tablon per pugno (frapper du poing sur la table). Minaci iun per pugno en la poŝo (se retenir).

**POINT** (PUNKTO) \* Tio estas lia tikla/vunda punkto (son point sensible, le défaut de la cuirasse). Piki al iu la vundan lokon (toucher son point sensible). Meti finan punkton al la polemiko (point final) \* Meti punkton sur sian "i" (mettre les points sur les "i") \* Donu punkton fiksan kaj mi puŝos la terglobon el ĝia akso (donnez-moi

un point d'appui et je soulèverai le monde).

**POISSE** \* Alporti al iu misfortunon (porter la poisse).

850. **POISSON** \* Mi sentas min kiel fiŝo en akvo (être comme un poisson dans l'eau) \* Ĝi estas nek viando nek fiŝo (ni chair ni poisson) \* Barakti kiel fiŝo ekster la akvo (se débattre comme un poisson hors de l'eau).

**POLÉMIQUE** \* Ni devas eviti ĉiun personan polemikon. Mi ne polemikos kontraŭ ili. Eviti akran polemikon. Polemiki kun vervo. Meti finon al la polemiko.

**POLITESSE** (ĜENTILECO) \* Ĝentile saluti iun (saluer poliment) \* Ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero (trop poli pour être honnête).

**POLITIQUE** (POLITIKO) \* Sin okupi pri politiko. Sin dediĉi al politiko (se consacrer). Diskuti kun iu pri politiko. Politiko ĉion invadas (la politique envahit tout) \* Struta politiko (la politique de l'autruche) \* Politiko de forta mano (la politique de la main de fer) KD 59/15

**POMME DE TERRE** \* Terpomoj : bakitaj, frititaj, fritŝveligitaj (p.de t. soufflées), stufitaj (cuites à l'étouffée) en sia haŭto (= ŝelkuiritaj) (en robe des champs). Terpoma kaĉo (purée).

**PONT** (PONTO) \* Multa akvo fluos ĝis tiam sub la pontoj (il passera beaucoup d'eau sous les ponts).

**PORT** (HAVENO) \* Feliĉe alveni en la havenon (= alveni en sia loko de destino) (arriver à bon port) \* Lia domo estis haveno por la persekutatoj (un havre pour les persécutés). Serĉi ripozan havenon en monaĥejo (chercher un havre de repos dans un monastère).

**PORTE** (PORDO) \* Eniri kaj ŝlosi la pordon post si (derrière soi) \* Malfermi la pordon en plena larĝo (la pordo estas larĝe malfermita) (grande ouverte). La pordo statis fermita (restait fermée). Trovi ŝlositajn/fermitajn pordojn (trouver les portes fermées) \* Frapfermi la pordon antaŭ ies nazo (claquer la porte au nez de qq.) \* Forpeli iun tra la pordo (= eksterigi iun el sia domo) (mettre qq. à la porte) \* Pelu mizeron tra l' pordo, ĝi revenos tra l' fenestro (chassez la misère

par la porte, elle reviendra par la fenêtre) \* Lasi la pordon malfermita por nova traktato (laisser la porte ouverte à de nouvelles négociations).

\* Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo (à chacun son métier et les vaches seront bien gardées).

**PORTRAIT (PORTRETO)** \* Li estas la vivanta portreto/bildo de sia patro. Al tiu portreto mankas nur parolo. Kiu ŝin vidis povis pensi, ke li vidas la patrinon.

**POSER (METI)** \* Meti tiklan/jukan demandon (poser une question délicate) \* Meti demandon pri konfido (poser la question de confiance).

860. **POSSÉDER (POSEDI)** \* Ju pli oni posedas, des pli oni avidas (plus on en a, plus on en veut)

**POSSIBLE (EBLA) (V. IMPOSSIBLE)** \* Laŭ mezuro de ebleco/Kiom estas eble/Tiagrade kiel eblas (autant que possible). Kiel home eblas/ Kiom eblas fari per homaj kapabloj (ce qui est humainement possible de faire). Bedaŭrinde, tio al mi estas ne ebla (cela ne m'est malheureusement pas possible) \* Tio povas esti, ke...(il est possible que/il se peut).

**POSSIBILITÉ** \* Elekti el pluraj ebloj (choisir parmi plusieurs possibilités). En ĝi troviĝas multaj ebloj. Elĉerpi ĉiujn eblojn (épuiser toutes les possibilités) \* Uzi ĉiajn eblojn por atingi la celon (utiliser toutes les possibilités pour atteindre le but).

\* La ebleco, ke iu povus lin savi, estas nekonsiderinda (les possibilités de le sauver sont minimes)

**POSTE (POSTENO)** \* Ricevi sian nomumigon al funkcio/posteno (recevoir sa nomination) \* Debuti en tre malalta posteno. Intrigi por ricevi postenon. Okupi gravan postenon.

**POSTE (POŝTO)** \* Respondi per revenanta poŝto (par retour du courrier) \* Mi nepre volas poŝti mian leteron, antaŭ ol io intervenos (je veux absolument poster ma lettre avant que qqc. n'intervienne/ ne m'en empêche).

**POSTURE (V. SITUATION/PÉTRIN/ pour : mauvaise posture).**

**POT** \* Ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero (le pot de fer contre le pot de terre)

\* Danci kiel kato ĉirkaŭ poto.

**POTENCE** (PENDINGO) \* Inda frukto de pendingo (gibier de potence). Elmeriti por si pendingon (mériter la potence).

**POUDRE** (POLVO.PULVO) \* Eksplo dema kiel pulvo (vif comme la poudre/avoir la tête près du bonnet). Li ne elpensis pulvon (n'a pas inventé la poudre) \* Ŝuti/ĵeti polvon en la okulojn (jeter de la poudre aux yeux).

**POULE** (KOKINO) \* Enlitiĝi, kiam la kokinoj (se coucher avec/comme les poules. Sous-entendu: quand les poules se couchent) \* Manĝi kokinon, kiu metus orajn ovojn (tuer la poule aux œufs d'or) \* En la tago de Sankta Neniama (quand les poules auront des dents/à la Saint-Glinglin).

870. **POULS** (PULSO) \* Palpi al iu la pulson (prendre le pouls). Lia pulso forte frapas. Rapidritma pulso.

**POUR** (POR) \* La por kaj la kontraŭ. Diskuti pri la por kaj la kontraŭ.

**POURCEAUX** (PORKIDOJ) \* Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn (jeter des perles aux pourceaux).

**POUSSER** (KRESKI) \* Kreski kiel fungo post pluvo.

**POUSSIÈRE** (POLVO) \* Vi estis polvo kaj refariĝos polvo (tu es poussière, tu retourneras poussière).

**POUTRE** (TRABO) \* En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia trabon ne vidas (on voit la paille...)

**POUVOIR** (POVI) \* Kiu volas, tiu povas \* Povas esti, ke...(il se peut que...) \* Posedi la povon fari (avoir de pouvoir de...) \* Havi povon super iu (dominer qq. de son pouvoir).

**PRATIQUE** (PRAKTIKO) (V. THÉORIE).

**PRÊCHER** (PREDIKI) \* Prediki al surduloj (= en dezerto) (prêcher dans le désert) \* Doni virtan ekzemplon por iu (prêcher d'exemple). Akvon prediki kaj vinon trinki (ne pas prêcher d'exemple!).

**PRÉCIPICE** (ABISMO) (V. ABÎME) \* Venigi/puŝi iun al la rando de pereu/ruiniĝo/bankroto (pousser qq. au bord du précipice).

880. **PRÉJUGÉ** (ANTAŬJUĜO) \* Esti libera de ĉiu antaŭjuĝo (passer par dessus les préjugés). Havi antaŭjuĝon kontraŭ io (avoir des préjugés contre qqc.).

**PREMIER** (UNUA) \* La unuaj fariĝos la lastaj

(les premiers seront les derniers).

**PRENDRE** (PRENI) \* Preni bieron, duŝon, freŝan aeron, banon ĉe la marbordo.. \* Preni infanon sur la dorson \* Mi prenas ĉion sur min (je prends tout sur moi) \* Mi prenas la liberecon diri al vi, ke... (la liberté de vous dire que...) \* Laŭ tio, kiel oni ĝin prenas (suivant comme on le prend). \* Anĝelika, kiun li prenis por Klaŭdino.

(V. flagrant délit / jambes à son cou).

**PRÉSENCE** (ĈEESTO) \* Honori per ĉeesto (honorer de sa présence).

**PRÉSENTER** (PREZENTI) \* Permesu, ke mi prezentu al vi mian amikon N... Mi havas la honoron min prezenti : "S-ro X..." \* La afero prezentas sin sub favora aŭspicio (se présente bien).

**PRESSER** (URĜI) \* La afero ne urĝas (rien ne presse) \* Urĝiĝu, la trajno vin ne atendos (pressez-vous...).

**PRÊT** (PRETA) \* Li estas preta je ĉio malbona (prêt à tout).

**PRÉTEXTE** (PRETEKSTO) \* Sub nenia preteksto (sous aucun prétexte) \* Serĉi pretekstojn por nenion fari.

**PREUVE** (PRUVO) \* Palpebla pruvo. Alporti la pruvon de io (apporter la preuve de qqc.). Havi materialan pruvon en la mano. Akumuli pruvojn.

**PRIÈRE** (PREĜO) \* Preĝi por ies animo (prier pour l'âme de qq.) \* Ŝi preĝis sian vesperan preĝon (elle faisait sa prière du soir).

890. **PRINCIPE** (PRINCIPO) \* Fari ion el principo (faire une chose pour le principe). Konsenti principo kun iu (être d'accord en principe avec qq.). Persisti/stari fidele ĉe siaj principoj (s'en tenir à ses principes). Ne cedi el siaj principoj (ne pas céder sur les principes).

**PRIX** (PREZO) \* Prezo : fiksa, modera, salita, pipra. \* La prezoj falis malalten (les prix ont bien baissé, chuté) \* Mi aĉetos ĝin, kiom ajn ĝi kostos (= kostu, kiom ĝi kostos = kia-ajn-koste) (à n'importe quel prix) \* Anonci premion/prezon por la kapo de iu (mettre sa tête à prix).

**PROBLÈME** (PROBLEMO) \* Ne fari el io problemon de konscienco (ne pas en faire un problème de conscience). Transiri al la problemo (attaquer



le problème à résoudre). Nesolvebla problemo (insoluble).

**PROCÈS** (PROCESO) \* Havi proceson kun iu (être en procès contre qq.) \* Pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento (un mauvais arrangement vaut mieux qu'un bon/ que le meilleur des procès).

**PROCHAIN** (PROKSIMULO) \* Amu vian proksimulon, kiel vin mem.

**PRODIGUE** (MALAVARA) \* Patroj avaras, infanoj malŝparas (à père avare, fils prodigue).

**PROFITER** (PROFITI) \* Tiri profiton el ies konsiloj (tirer profit des conseils de qq.) \* Profiti de la tajdo por ekveli (profiter de la marée pour mettre la voile) \* Profitigi iun de sia sperto/profitigi sian sperton al iu (faire profiter qq. de son expérience) \* Du militas, tria profitas (deux se querellent, arrive un troisième larron).

**PROIE** (PREDO) \* Fariĝi predo de flamoj (être la proie des flammes).

**PROJET** (PROJEKTO) \* Plekti/ŝpini/forĝi/kovi/teksi planon/projekton (rouler un projet dans sa tête). Efektivigi/realigi planon. Plibonigi projekton (améliorer). Forjeti projekton (abandonner).

\* Projektoj kirliĝadas/dancas en lia kapo (tournoient)

\* Projektoj, kiuj de realigo staras ankoraŭ malproksime (des projets qui sont encore loin de se voir concrétisés).

**PROLÉTAIRE** (PROLETO) \* Proletoj de l'mondo, unuigu vin/ proletoj el ĉiuj landoj, unuigu!

900. **PROMENADE** (PROMENO) \* La bela vetero invitas/logas al promenado (invite/attire).

**PROMESSE** (PROMESO) \* Malavara je promesoj (prodigue de promesses). Iluzia, senvalora promeso. Eltiri/eltrudi perforte de iu promeson (arracher des promesses à qq.). Fari belajn promesojn. Promesi orajn montojn (monts et merveilles).

\* Teni sin al siaj promesoj. Lin ligas promeso (il est tenu par des promesses). Rigardi promeson de iu, kiel certaĵon (considérer la promesse de qq. comme certitude) \* Per promesoj estas pavimita la infero (l'enfer est pavé de bonnes intentions).

\* Kiu ne plenumas sian promeson, estas malnoblulo (celui qui ne tient pas ses promesses est un salaud).

**PROPHÈTE** (PROFETO) \* Neniu estas profeto

en sia urbeto (nul n'est prophète en son pays)  
\* Lia profetaĵo ne veriĝis (sa prophétie s'est révélée fausse) \* Se vi nur pruvigu bona profeto/aŭguristo (si seulement vous pouviez dire vrai).

**PROPORTION** (PROPORCIO) \* Devas esti severa proporcio inter la kulpoj kaj la punoj (la peine doit être rigoureusement proportionnelle à la faute) \* Lia sukceso estas sen proporcio kun lia talento \* Esti en rekta proporcio (directement proportionnel).

**PROPOSER** (PROPONI) \* Prezenti proponon en taŭga formulo (présenter une proposition bien formulée). Oni devas disigi tiujn du proponojn (disjoindre). Tiu propono estas laŭ mi tre prudenta (très raisonnable). Ĝi akiris ĉies aprobon (elle a reçu une approbation unanime/de tous). En tiu ĉi propono kuŝas la solvo de la problemo (là réside la solution du problème) \* Forĵeti indigne malhonestan proponon (rejeter avec indignation une proposition malhonnête) \* Homo proponas, Dio disponas (l'homme propose, Dieu dispose).

**PROTECTION** (PROTEKTO) \* Preni iun sub sian protekton (prendre qq. sous sa protection).

**PROTESTER** (PROTESTI) \* Aŭdigi protestan vorton (élever des protestations). Levi la voĉon en ies intereso (élever la voix dans l'intérêt de qq.). Protesti nur pro formo (pour la forme). Impetege protesti (avec violence). Protesti per ĉiuj fibroj el sia koro (de toutes ses fibres).  
Uragano/ŝtormo/tempesto da protestoj.

**PROUVER** (PRUVI) \* Pruvi sian senkulpecon (prouver son innocence). Palpebla pruvo \* Kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas (qui veut trop prouver, ne prouve rien/ qui s'excuse s'accuse).

**PROVOCATION** (PROVOKO) \* Ne povi lasi tiun provokon sen reago (ne pas laisser passer cette provocation sans réagir) \* Severe ignori la provokojn de ĵurnalisto (faire fi des provocations).

**PRUDENCE** (SINGARDO) \* Absoluta manko de singardo (manque complet de prudence). Post la falo oni fariĝas singarda (après une chute on devient prudent). Kun tiaj homoj oni devas ĉiam singarde agi (avec de telles personnes on doit agir prudemment).

910. **PUDEUR** (PUDORO) \* Esti sen pudoro. Ne havi senton de pudoro. Formeti pudoron (sans la moindre pudeur).

**PUNIR** (PUNI) \* Puni infanon per senigo de deserto (punir un enfant par privation de dessert). Pluvas punoj. Prave punite laŭmerite (il n'a que ce qu'il mérite/bien fait pour lui) \* Tio estos por li deca puno (li ricevis decan bastonadon) (une juste punition PURÉE (V. PETRIN)

## Q

**QUALITÉ** (KVALITO) (V. QUANTITÉ)

**QUANTITÉ** (KVANTO) \* Ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito (ce n'est pas la quantité, mais la qualité qui compte) \* Du kvantoj, se egalaj al tria, estas ankaŭ egalaj inter si (deux quantités, égales à une troisième, sont égales entre elles). \* Pli ol sablo ĉe maro (une énorme quantité) \* Duoble pli ol ĉio, kion li havis antaŭe (deux fois plus qu'auparavant) \* Mia laboro valoras kelkoble pli, ol kiom vi donas al mi por ĝi (mon travail vaut plusieurs fois plus que ce que vous m'en donnez).

**QUARANTE** (AN) (V. MOQUER)

**QUE**

La libro, **kiun** vi legas, estas interesa.

Mi volas, **ke** tio, **kion** mi diris, estu obeata.

Nun, **kiam** la lingvo estas preta, mi... (maintenant que). Ĉiufoje, **kiam**... Tiel longe, **dum** la situacion postulos... (aussi longtemps que...).

Mi ne estas certa, **ĉu** li venos (je ne suis pas certain qu'il vienne).

Tio estis la unua fojo, **ke**... (la première fois que)

**Kiom** multe mi donus por tio, **ke**... (que ne donnerais-je pas pour...). **Kial** vi ne diris tion? (que ne l'avez-vous dit?). **Kiel** bela vi estas! (que vous êtes beau!).

**Kio** okazas? (que se passe-t-il?).

**QUÉMANDER** \* Sin turni al ies poŝo (s'adresser à la poche de qq.). Pumpi el iu monon (pomper l'argent de qq.). Li priplukis sian onklon.

**QUERELLE** (KVERELO) \* Veki kverelon (susciter une querelle) \* Esti en kverelema humoro (d'humeur querelleuse).

**QUESTION** (DEMANDO) (V. PROBLÈME. AFFAIRE)

\* Jen demando : tikla/, juka/, delikata/, glitiga; abrupta, serioza, tute persona, vere maloportuna (voici une question délicate...) \* Demandon : fari/meti/direkti/formuli/elŝovi; solvi.

Demanda : tono, rigardo, gesto (un ton,...interrogatif)

\* Kaskado da demandoj. Demando kiu perpleksigas (une question qui rend perplexe) \* Kia demando, tia respondo (la réponse vaut la question) \* Kiu ne demandas, tiu ne eraras (celui qui ne pose pas de question ne risque pas de se tromper)

\* Monologi (faire la demande et la réponse).

\* Estas nur demando pri tempo (simple question de temps) \* Ataki la esencon de la demando (aborder l'essentiel du problème/de la question).

Lasi flanke la demandon pri... (laisser de côté la question de...). Je tia staro de la demando (au point où en est la question). La demando estas sufiĉe maturiĝinta (est suffisamment mûre).

Ni transiru al aliaj demandoj (abordons d'autres questions). Malvasta ligilo ekzistas inter ambau demandoj (un lien étroit existe entre les deux questions). Tio ĉi estas ekster la demando (en dehors de la question) \* Meti la demandon pri konfido (poser la question de confiance).

920. **QUEUE (VOSTO)** \* Frazo, kiu havas nek kapon nek voston (ni queue ni tête) \* Hundo foriras subtirante voston (un chien s'en va la queue basse).

\* Faligi pinĉon da salo sur la voston de birdo por ĝin kapti (mettre une pincée de sel) \* Vice atendi la aŭtobuson (faire la queue à l'arrêt de l'autobus). Vico da atendantoj (une queue).

\* Anservice (à la queue leu leu)(= comme les oies) \* Okazon kaptu ĉe la kapo, ĉar la vosto estas glita (saisissez l'occasion au vol).

**QUITTE (KVITA)** \* Post tiu ĉi pago mi estos kvita al vi (après ce paiement je serai quitte envers vous) \* Duoblo aŭ nenio (quitte ou double).

**R**

**RACONTER (RAKONTI)** \* Ne rakontu al mi fabelon (ne me racontez pas d'histoire).

**RAGE (RABIO)** \* Pala de rabio (pâle de rage).

\* Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia (quand on veut noyer son chien...)

\* Kuri senbride, kiel

rabia (comme un enragé).

**RAISON** (KAŬZO. PRAVO) \* Pro la menciitaj kaŭzoj (pour les raisons mentionnées). Ne scii el kia kaŭzo (ne pas savoir pour quelle raison). Havi ĝustan kaŭzon por maltrankviliĝi (avoir de bonnes raisons de s'en faire). Nenia kaŭzo timi/, havi zorgojn (aucune raison d'avoir peur, de se faire du souci). Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas (il n'y a pas de fumée sans feu) \* La kaŭzo estas, ĉar la infinitivo... (la raison est que l'infinitif...) \* Komparo ne estas pruvo (comparaison n'est pas raison) \* Aŭskulti/obei la voĉon de la prudento (écouter la voix de la raison) \* Elmontri sian pravecon (montrer qu'on a raison) \* Amiko skribis al mi ne senprave, ke... (non sans raison, que...) \* Mi cedas, ke vi pravas (j'admets/ je reconnais que vous avez raison).

**RAISONNABLE** (PRUDENTA. SAĜA) \* Vi povas fari nenion pli saĝan \* Tiu propono estas laŭ mi tre prudenta.

**RAISONNEMENT** (REZONO) \* Sin apogi sur la rezono ne sur siaj sentoj (s'appuyer sur le raisonnement et non sur ses sentiments).

**RASER** (RAZI) \* Barbostopla vizaĝo (ayant une barbe de plusieurs jours, mal rasée) (stoplo = éteule) \* Hodiaŭ por mono, morgaŭ senpage (demain, on rase gratis).

**RÉALITÉ** (REALO) \* Troviĝi vidalvide kun realo (se trouver face à la réalité) \* La realo superas ofte la imagon (la réalité dépasse souvent la fiction) \* Hodiaŭ fiktivo, morgaŭ efektivo (utopie d'aujourd'hui, réalité de demain).

**RÉCOLTER** (RIKOLTI) \* Kia la semo, tia la rikolto (on récolte ce qu'on a semé).

930. **RECONNAISSANCE** (DANKEMO) \* Kiel signo de dankemo. Senlima dankemo (reconnaissance infinie).

**RECONNAÎTRE** \* Konfesi sian eraron, kulpon, krimon, ŝuldon \* Oni devas konfesi, ke...

**RECORD** (REKORDO) \* Rekordon : starigi/superi/rompi (battre). Agnoski rekordon pri io (homologuer, reconnaître).

**RÉFLÉCHIR** \* Antaŭ la lango, laboru la cerbo (il faut réfléchir avant de parler).

**REFUS (RIFUZO)** \* Rikolti/ricevi rifuzon (essuyer un refus / se heurter à un refus)

**REGARD (RIGARDO)** (V. OEIL) \* Rigardo : fluga, penetrema, akra, riproĉa, oblikva, elokventa, hipokrita... Rigardi : penetreme (dans le blanc des yeux), gvatokule/ŝteleme (du coin de l'oeil).

\* Ĵeti ŝtele rigardon sur iun (à la dérobée, du coin de l'oeil). Rigardi iun de alte (de haut). Alforĝi, fiksi sian rigardon sur/al iu. Ĵeti avidajn okulojn al iu. Kvazaŭ manĝi iun per la okuloj (dévorer qq. des yeux) \* Havi panoraman vidon de la regiono, ĝis kie la rigardo povas atingi (avoir une vue panoramique de la région aussi loin que le regard puisse porter). KD 46/1... (120 expressions).

**RÈGLE (REGULO)** \* Ne ekzistas regulo sen escepto (l'exception confirme la règle). Oni devas etendi la regulon al ĉiuj similaj kazoj. Apliko de la reguloj.

**RÉGNER (REGI)** \* Dividu kaj regu/imperiu (diviser pour régner).

**REGRETTER (BEDAŬRI)** \* Bedaŭri ion el la tuta koro. Esprimi bedaŭron ne povi helpi iun. Ne bedaŭru hieraŭan (ne regrettez pas le passé).

**RELATION (RILATO)** \* Ili estas en bonaj rilatoj unu kun la alia. Esti en streĉa interrilato kun iu (relations tendues). Ŝiri ĉiujn rilatojn kun iu (interrompre ses relations avec...)

940. **RELIGION (RELIGIO)** \* Esplori la komparan valoron de ĉiuj religioj \* Perdi la religian kredon (perdre la foi). Ataki religion. Malkonfesi sian religion (renier) \* Tuŝu la religiajn konvinkojn de neniu (ne touchez aux convictions religieuses de personne)

**REMÈDE (RIMEDO)** \* Grandaj malbonoj - grandaj rimedoj (aux grands maux les grands remèdes).

**REMERCIER (DANKI)** (V. MERCI)

**REMETTRE (PROKRASTI)** \* Prokrastita ne estas perdita (ce n'est que partie remise) \* Fareblan hodiaŭ ĝis morgaŭ ne prokrastu (ne remettez pas à demain...).

**REMUER (MOVI)** \* Movi ĉielon kaj teron (remuer ciel et terre).

**RENCONTRE (RENKONTO)** \* Renkonto : providenca hazardo ŝanca \* Ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas (il n'y a que les montagnes qui ne se rencontrent pas) \* Per stranga renkontiĝo

de la cirkonstancoj (par un curieux concours de circonstances).

**RENDEZ-VOUS** (RENDEVUO) \* Difini/aranĝi rendevuon al/kun iu en iu loko.

**RENDRE** (REDONI) \* Redoni al Cezaro la proprajon de Cezaro kaj al Dio la proprajon de Dio (rendez à César ce qui est à César et à Dieu ce qui est à Dieu).

**RENOMMÉE** (FAMO) \* Li havas malbonan famon. \* Pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro (bonne renommée).

**RENVERSE** (Ā LA) \* Fali surdorsen.

950.**REPAS** (MANĜO) \* Kio estas horoj de la manĝoj? Malfruiĝi al la tagmanĝo (être en retard). La tagmanĝo vin atendas. Preni tagmanĝon en restoracio. KD 40/1 (150 expressions).

**REPENTIR** (PENTI) \* Pente bedaŭri (faire amende honorable) \* Tion ĉi vi pentos (vous vous en repentirez). Penti tutkore pri... \* Ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro (n'ayez pas honte de vos actes, ayez honte de persister dans l'erreur).

**RÉPÉTER** (RIPETI) \* Ripeti ion papage (= papagumi ion) (comme un perroquet) \* Ripeti ĉion vorto post vorto (répéter qqc. mot à mot).

**RÉPONSE** (RESPONDO) \* Respondo : prudenta (raisonnable), evitema (évasive), deflankiĝa (à côté), trafa (qui a visé juste), kontentiga (satisfaisante) \* Heziti pri la respondo. Respondi tra super ŝultro (par-dessus l'épaule). Respondi je tik per tak (du tac au tac). Doni kategorian, jesan (affirmative), nean (negative), rifuzan respondon. Tiu respondo konfirmas mian supozon. Embarasite respondi (avoir été embarrassé pour répondre) \* Kia demando, tia respondo (la réponse vaut la question) \* Respondi leteron. Respondi la pordon. Respondi la telefonon. Respondi ŝipon (per salvo, resaluto). Pardonu, ke mi ĝis nun ne respondis vian leteron.

**REPOS** (RIPOZO) \* Bone meritita ripozo (repos bien mérité). Avidi ripozon (avoir grand besoin de repos). Ripozu sur siaj laŭroj (se reposer sur ses lauriers).

**RÉPROCHÉ** (RIPROĈO) \* Silenta, akra riproĉo. Riproĉa rigardo. Meriti riproĉojn. Akcepti la riproĉojn sen palpebrovibro/palpebrumo (sans broncher).

**REPOUSSER** \* Forskui iun disde si (repousser violemment qq.).

**RÉPUTATION** (REPUTACIO) \* Subfosi, submini (miner la réputation de qq.). Damaĝi ies reputacion (porter atteinte). Perdi sian reputacion.

**RÉSISTER** (REZISTI) \* Rezisti al la laciĝo (fatigue). Cedi, rezisti al tento (à la tentation).

**RESPECT** (RESPEKTO) \* Ĝui publikan honoron (avoir le respect de tous/ l'estime) \* Mi tro multe vin respektas kaj tro multe estas preta vin servi, por ke mi ...u.

960. **RESPIRATION** (SPIRO) \* Malfacila spirado. Retenita spirado. Perdi la spiradon. Reakiri spiron (reprendre son souffle). Kuri ĝis perdo de spiro (courir à en perdre le souffle) \* Lasu min spiri, mi petas (= paŭzi) (faire une pause).

**RESPONSABILITÉ** (RESPONDECO) \* Preni sur sin respondecon. Ŝultri la respondecon (prendre la responsabilité de). Surpreni gravan respondecon. Havi sur si tre gravan moralan respondecon. Grava respondeco ŝarĝas liajn ŝultrojn. Fari ion je sia propra respondeco (sous sa responsabilité personnelle). Rifuzi, demeti respondecon (refuser, abandonner toute responsabilité). Transmeti sur iun la respondecon (transmettre). Ĵeti respondecon sur iun (rejeter la responsabilité sur qq.).

**RESSEMBLER** (SIMILI) \* Ili similas unu la alian kiel du gutoj da akvo \* Ne eĉ duonfingro de simileco (pas le moindre brin de similitude)

\* Ĝemela simileco (gémellaire). Li havas grandan similecon kun... \* Kun kiu vi festas, tie vi estas (qui se ressemble, s'assemble). (V. HANTER).

**RESTER** (RESTI) \* Mi tamen restos ĉe mia opinio (je m'en tiens à) \* Kiom restas fari! (Combien il reste à faire!) \* Restas al mi nur morti \* Si (filino) estas ĉio, kio restis al mi sur la tero (il ne me reste plus qu'elle sur la terre). Ĉi tio restu inter ni (ceci, entre nous). Forlepori/ sin pafi for (ne pas demander son reste).

**RÉSULTER** (REZULTI) \* Havi videblan rezulton (un résultat visible) \* El tio rezultas, ke... (il résulte de cela que...) \* Lia iniciativo havis plej bonajn rezultojn (les meilleurs résultats).

La rezulto estis tute alia, ol ni supozis/imagis.



**RÉUSSIR** (SUKCESI) \* Li havas ĉiujn atutojn por sukcesi (tous les atouts). Supoze, ke ĉio prosperos, vi sukcesos (en admettant que tout aille bien, vous réussirez) \* Tiu unua sukceso estas bona aŭguro por la fina venko. Fari ĉion necesan por sukcesi. Faktoro de sukceso \* Sukcese trapasi ekzamenon.

**REVANCHE** \* Kvitiĝas servo per reservo (un service en vaut un autre) (à charge de revanche) \* Oni ne povis eliri, kompanse estis varme en la loĝejoj (on ne pouvait sortir, en revanche il faisait chaud dans les maisons) (V. VENGEANCE).

**RÊVE** (REVO) \* Plekti, teksti revojn \* Neplenumbla, utopia revo (irréalisable) \* La regno de la revoj (au royaume des rêves) \* Granda bruo elŝiris ŝin el ŝiaj revoj (un grand bruit l'arracha à ses rêves) \* Li senkonscie revas pri tio sama, pri kio mi revas (il rêve inconsciemment des mêmes choses que moi) \* Konstrui aerajn kastelojn (châteaux en Espagne).

**RICHE** (RIĈA) \* Serĉi rimedojn de riĉigo (chercher les moyens de s'enrichir). Ŝparado estas komenco de riĉeco (l'épargne est le commencement de la richesse). Riĉa estas tiu, kiu ŝuldas al neniu (Riche est celui qui ne doit à personne). Strabe rigardi la riĉaĵojn de la najbaro (loucher vers les richesses du voisin). Ŝajngi sin riĉa, nenion havante (simuler la richesse) \* Pagi kiel grandsinjoro (faire le riche). Malmoliĝo de la koro de riĉuloj (la dureté des riches). Ju pli da havo, des pli da pravo (plus on est riche, plus on a raison). Naĝi en riĉo kaj abundo. Li estas la arkitekto de sia propra riĉeco (l'artisan de sa propre richesse). Kiu havas nenion, estas nenio (celui qui n'a rien, n'est rien).

**RIDICULE** (RIDINDA) \* Kovriĝi per ridindeco (se couvrir de ridicule). Priridi iun al ties okuloj (ridiculiser qq. à ses propres yeux). Ne vidi kiom da ridinda estas en tio (ne pas se rendre compte de ce qu'il y a de ridicule en cela).

970. **RIEN** (NENIO) \* Aŭ ĉion aŭ nenion (tout ou rien). Apenaŭ pli ol nenio. Malpli ol nenio. Fari ion el nenio (faire qqc. à partir de rien). Tio nenion faras (ça ne fait rien). Oni donas nenion por nenio

(on n'a rien pour rien). Li estas bona por nenio. Kiu havas nenion estas nenio (celui qui n'a rien n'est rien). Multe da bruo por nenio. Pri nenio oni povas ĵuri (il ne faut jurer de rien). Li scias nenion pri io ajn (il ne sait rien de rien) \* Havi nenion alian por diri, ol ke... (n'avoir rien à dire d'autre que...). Tamen tio ĉi nenion helpas (pourtant ceci ne sert à rien). Ili estas kalkuleblaj por nenio (ne comptent pour rien). Rigardi iun kiel nenion (prendre qq. pour une nullité). Tio aŭguras nenion bonan (n'augure rien de bon). En okcidento nenio nova (à l'ouest rien de nouveau). Mi diras nenion alian, krom plej pura vero/ ol plej puran veron (je ne dis rien d'autre que la pure vérité). Mi konas nenion super tio (rien au-dessus). Kiu ne riskas, tiu ne gajnas (qui ne risque rien n'a rien). La afero ne urĝas (rien ne presse).

**RIRE** (RIDI) \* Tondra, brua, skua rido/ridego. \* Ridegi ĝis larmoj/el la tuta gorĝo/plengorĝe. \* Sufokiĝi, skuiĝi de ridego \* Reteni sian ridon. Eksplosi per rido (éclater de rire). Rido infektas (le rire gagne/est contagieux). Ne povi ne ridi (ne pas pouvoir se retenir). Ridadi tiel, ke al li preskaŭ krevas la ventro (rire à en crever). Teni al si la ventron pro ridego (se tenir le ventre de rire) \* Ridi kiel kreteno (rire comme un imbécile) \* Amare ridi (rire jaune) \* Ridi sub mantelo/subridi (en cachette) \* Priridi iun al vizaĝo (rire au nez de qq.) \* Transiri de rido al larmoj (passer du rire aux larmes). Rido matene, ploro vespere (tel qui rit vendredi, dimanche pleurera). Plej bone ridas, kiu laste ridas (rira bien qui rira le dernier).

**RISQUE** (RISKO) \* Je propra risko (à ses risques et périls) \* Kiu ne riskas, tiu ne gajnas (qui ne risque rien, n'a rien) \* Riski sian vivon/propran haŭton/kapon \* La afero estas senriska. Timi nenian riskon (il n'y a pas de risque à craindre).

**RIVIÈRE** (RIVERO) (V. RUISSEAU) \* Transiri rivereton kun sekaj piedoj (traverser à pied sec) \* Rivero havanta 200 kilometrojn da longo.

**ROI** (REĜO) \* Pli rojalisto ol la reĝo.

**ROLO** (RÔLE) \* Ludi gravan rolon. Plenumi rolon/taskon \* Rolo tre flata, sed tre ŝarĝa.

**ROMPRE** (ROMPI) (V. CASSER) \* Rompi kun sia amatino \* Pli bone fleksiĝi ol rompiĝi (mieux vaut plier que rompre).

**RONFLER** (RONKI) \* Ronki per longaj tiroj.

**ROSE** (ROZO) \* Ne ekzistas rozo sen dornoj (pas de roses sans épines) \* Ŝiru rozojn en somero, ĉar vintre ili ne estos (cueillons dès aujourd'hui les roses de la vie) \* Li ne kuŝas sur lito el rozoj (tout n'est pas rose pour lui).

**ROUE** (RADO) \* Turniĝas la rado (la roue tourne). Kvina rado ĉe veturado (la cinquième roue de la charrette). Ĵeti bastonon en la radon (mettre des bâtons dans les roues);

980. **ROUGIR** (RUĜIĜI) \* Ruĝiĝi ĝis la oreloj/ĝis la pintoj de siaj ungoj \* Pudore ruĝiĝadi (rougir pudiquement).

**ROULER** \* Rulfali sub la tablon (rouler sous la table). Vivi larĝe kaj lukse (rouler carrosse).

**ROULETTE** \* Ĉio iras glate/ la afero glitas glate (marche, va comme sur des roulettes).

**RUISSEAU** (RIVERETO) \* Se gut' al guto aliĝas, maro fariĝas = el malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj (les petits ruisseaux font les grandes rivières)

**RUMEUR** (FAMO) \* Objekto de publika parolo/klaĉo (être l'objet de la rumeur publique).

**RUMINER** \* Maĉi kaj remaĉi ion (ruminer qqc.).

**RUSE** (RUZO) \* Vulpe ruza (rusé comme un renard) \* Cerbumi pri ruzaĵo (se creuser la cervelle pour trouver une ruse) \* Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas (Tel est pris qui croyait prendre).

## S

**SA / SON** (LIA, ŜIA...SIA)

(Tio) Estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino (c'est la première fois qu'elle l'appela sa fille). Sia edzo ne estas sur ŝia nivelo (son mari n'est pas à sa hauteur).

**SABLE** (SABLO) \* Konstrui sur sablo/, sur roko (construire sur le sable/, sur le roc):

**SACRIFIER** (OFERI) \* Mi devis oferi la agrablan pro la utila (sacrifier l'utile à l'agréable). Mi esperas, ke ili oferos siajn personajn gustojn kaj opiniojn pro la bono de nia afero (faire abstraction de goûts personnels...) \* Mi oferis (por tio) miajn

plej bonajn jarojn (j'y ai sacrifié mes meilleures années).

990. **SAGESSE** (SAGŬO) \* La komuna saĝo (la sagesse populaire). La homa saĝo diras al mi, ke...

\* Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo (être âgé, mais pas plus raisonnable pour ça).

**SAIN** (SANA) \* Sana menso en sana korpo (une âme saine...). Sana kaj savita.

**SAIN ET SAUF** (V. S'EN TIRER).

**SAINT** (SANKTULO) \* Peti per ĉiuj sanktuloj (implorer tous les saints) \* Kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas (comme on connaît les saints on les honore) \* Preĝu al Eternulo, ne al Lia sanktulo (il vaut mieux s'adresser à Dieu qu'à ses saints) \* En la tago de sankta Neniamo (à la saint Glin-glin).

**SALAIRE** (SALAJRO) \* Justa salajro \* Prezvaria skalo de la salajroj (échelle mobile).

**SALUT** (SALUTO) \* Salutu lin je/en mia nomo. \* Saluti per manpremo (poignée de main), demeto de la ĉapelo (en enlevant son chapeau), klino de la kapo (en inclinant la tête). KD 55/1...

**SANG** (SANGO) \* Voĉo de la sango \* La sango ne mensogas (bon sang ne peut mentir) \* Dronigita en sango (noyé dans le sang). Sango makulas liajn manojn \* Aspergita de sango (aspergé de sang). Glaciigis la sango en liaj vejnoj (son sang se glace). Ekbolis lia sango (son sang n'a fait qu'un tour) \* Oferi sian sangon (sacrifier). Kion utilos mia sango (à quoi servira-t-il) \* En liaj vejnoj fluas akvo/selakto, ne sango (avoir du sang de navet). KD 30/5

**SANG-FROID** (MEMREGADO) \* Fari ion kun malvarma/frida sango (de sang-froid) \* Perdi la estrecon de si mem (perdre son sang-froid, le contrôle de soi).

**SANS** (SEN) \* Li foriris ne manĝinte (sans avoir mangé) (= sen tio, ke = sen, ke li manĝis antaŭe). Sen manĝi \* Ne estas regulo sen escepto.

**SANTÉ** (SANO) \* Trinki por/pro ies sano (= levi glason je ies sano) (lever son verre à la santé de qq.). Je via sano, samideano! (à votre santé, ami espérantiste) \* Malzorgi sian sanon (négliger).

Retrovi la sanon. Nenio anstataŭas la sanon (rien ne remplace la santé). KD 31/32 (150 expressions)  
La sano ne estas ĉio, sed sen sano ĉio estas nenio (la santé n'est pas tout mais sans la santé tout n'est rien). Taksi la sanon ni lernas en malsano (c'est quand on est malade qu'on apprécie la santé).

\* Lia sano ŝanceliĝis/estas forte skuita.

**SARDINE (SARDELO)** \* Premataj kiel sardeloj en barelo.

1000.**SAUF (KROM)** \* Mi venos, escepte se pluvos.

**SAUTER (SALTI)** \* Salti gracie, kiel urso ebria.

**SAUVER (SAVI)** \* La ebleco, ke oni povus lin savi, estas nekonsiderinda (Les chances de le sauver sont minimes).

**SAUVER (SE)** \* Eskapi. Forlepori. Sin pafi for (se sauver à toutes jambes).

**SAVOIR (SCII)** \* Bruli de scideziro (brûler du désir de savoir). Soifa je scio (assoiffé de connaissances). Neniu scias ĉion (personne ne peut tout savoir). Scii ion parkere (par coeur) \* Mi ne volas scii pri tio (je ne veux pas le savoir). Diri ion plenascie (en pleine connaissance de cause) \*

\* Virino scias, tuta mondo scias (ce que femme sait, tout le monde le sait) \* Kiom mi scias... (autant que je sache) \* Li ne sciis, kion fari per sia ĉapelo. Li ne sciis, kiel li komencu la aferon (il ne savait comment il devait commencer) \* Inter scii kaj fari estas diferenco.

**SAVONNER (SAPUMI)** \* Sapumi al iu la okulojn (passer un savon).

**SCIENCE (SCIENCO)** \* Sin dediĉi al iu scienco (se consacrer à telle ou telle science) \* Por tio ne necesas multe da scienco (pas besoin d'être très savant).

**SECRET (SEKRETO)** \* Profesia sekreto. Sekreto sub sigelo/subsigela (sous le sceau du secret).

Dividi sekreton (partager). Teni ion en sekreto. Konservi sekreton. Sekreto lin konsumas (le ronge, mine) \* Elpumpi el iu la sekreton (arracher un secret à qq.). Lasi sekreton eskapi el la buŝo. Nevole elglitis la sekreto el lia buŝo. Li ne povis teni ĉe si sekreton \* Penetri, demaski, perfidi sekreton (trahir) \* Trovi la ŝlosilon de la sekreto

(clé) \* Publika/senkafa sekreto (secret de Polichinelle) \* Vi sekrete vorton diras, ĝi tra la tuta mondo iros \* Vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenados sen fino ("...et c'est ainsi que tout le pays l'a su", comme dit la chanson!).

**SEIGNEUR** \* La regno de la ĉielo (le royaume des cieux) \* Al grandaj sinjoroj grandaj honoroj (à tout seigneur tout honneur).

**SEL** (SALO) \* Por kapti birdon, salumu ĝian voston (déposez du sel sur sa queue).

1010. **SEMAINE** (SEMAJNO) \* Kiun tagon de la semajno ni havas hodiaŭ? (quel jour est-ce?). Ĉu vi restos tutan semajnon? Venontan semajnon. Semajnfino (week-end).

**SEMER** (SEMI) \* Dissemi malpacon (semmer la discorde) \* Kion vi semas, tion vi rikoltas (on récolte ce qu'on a semé).

**SEMBLANT** \* Li faris mienon, kvazaŭ li laborus (comme s'il travaillait).

**SENS** \* Uzi vorton en la propra, figura/metafora, strikta senco. Falsi, deturni la sencon de ies vortoj (détourner de sens les paroles de qq/ leur faire dire autre chose) \* Li ne havas sencon por humuro (pas le sens de l'humour).

**SENSATION** (SENSACIO) \* Fari grandan sensacion. \* Agrabla sento de varmo (une sensation de chaleur)

**SENSIBLE** (SENSIVA) \* Esti sensiva al malvarmo.

**SENTIMENT** \* Apelacii al ies bonaj sentoj (faire appel au raisonnement et non aux sentiments).

**SENTIR** (SENTI) \* Kiel vi vin sentas? Mi sentas min malsana \* Senti doloron en la kapo, piketadon en la gorgo (picotements) \* Senti apetiton. Senti bezonon de nutraĵo \* Senti sin aludita de io (se sentir concerné par qqc.)

**SÉRÉNITÉ** (SERENECO) \* Fari ion trankvilanime (en toute sérénité).

**SÉRIEUX** (SERIOZA) \* Neniu prenas lin serioze \* Peni konservi sian seriozecon (faire effort pour conserver son sérieux).

1020. **SERMENT** (ĴURO) (V. JURER) \* Ligi per ĵuro (lier par serment). Rompi sian ĵuron.

**SERRER** (PREMI) \* Ili kunpremiĝis simile al sardeloj/premataj kiel sardeloj (serrés comme

des sardines).

**SERVICE** (SERVO) \* Fari bonan servon (rendre un bon service). Netaksebla servo (inappréciable). Per kio mi povas vin servi? (que puis-je faire pour vous servir?) \* Servo postulas reservon (un service en appelle un autre) \* Al du sinjoroj samtempe oni ne povas servi (on ne peut servir deux maîtres à la fois) \* Meti ion en uzon (mettre qqc. en service).

**SEUL** (SOLA) \* Sola kontraŭ ĉiuj \* Mi demandis ŝin, kion ŝi faras tute sola.

**SÉVÈRE** (SEVERA) \* Ne estu tre severa al li (pour lui).

**SIGNE** \* Ŝi faris al li signon, ke li ŝin sekvu (elle lui fit signe de la suivre) \* Signi per la mano al taksio (hélér) \* Per signo de amikeco \* La afero prezentas sin sub favora aŭguro (sous un bon signe).

**SIGNIFICATION** (SIGNIFO) \* Tio ne havas grandan/gravan signifon. Atribui al io grandan signifon. Perdi iom el sia granda signifo. Rigardi ion grava (donner une grande signification/importance à qqc.).

**SILENCE** (SILENTO) \* Eniri per senbruaĵ paŝoj (entrer en silence). Rompi la silenton/ Disrompi la konspiron de silento (briser la conspiration du silence) \* Sin ĉirkaŭbari per silento (se murer dans son silence). Paroli estas arĝento, silenti estas oro.

**SINCÉRITÉ** (SINCERECO) \* En momento de escepta sincereco (dans un moment de grande sincérité). \* Por esti tute sincera/ se paroli sincere, mi... \* Esti sincere konvinkita \* Sincerajn bondezirojn/kondolencojn \* Ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero (trop poli pour être honnête).

**SITUATION** (SITUACIO) \* Meti, konduki iun en malagrablan situacion \* Esti en streĉa situacio (tendue). Pli kaj pli neelportebla situacio (de plus en plus insupportable). Sen eliro (sans issue).

\* Jen la fidela bildo de mia situacio . KD 20/5... \* Scii bone ekspluati la situacion \* Tio estas plena renverso de la situacio (un renversement complet) \* Eliri kun honoro el tiu komplikita situacio (sortir honorablement de cette situation compliquée) \* Okupi altan situacion.

1030. **SOBRIQUET** (ŜERCNOMO) \* Glui al iu moknomon (donner un sobriquet/surnom à qq.)

**SOCIÉTÉ** (SOCIO) \* Kremo/elito de la socio. Feĉo de la socio (la lie de la société).

**SOIF** (SOIFO) \* Suferi soifon (souffrir de la soif). Kvietigi sian soifon (calmer, éteindre sa soif).

**SOLEIL** (SUNO) \* Levigâs la suno. Levigi kun la suno \* La suno staras ĉe la zenito (est au zénith) \* La suno komencis subiri (à descendre).

Ĝi ĵetis oblikve siajn radiojn (jetait obliquement ses rayons). La suno jam falas \* Havi la sunon rekte en la okuloj. La suno ne palpebrumigas min (ne me fait pas cligner des yeux) \* Sin bani en la suno. Sunumi al si la krurojn (exposer ses jambes au soleil). Brunigi al si la haŭton ĉe la suno (se faire brunir) \* Pejzaĝo baniĝanta en la brilo de la suno \* Ekzistas nenio nova sub la suno (il n'y a rien de neuf sous le soleil).

**SOLUTION** (SOLVO) \* Elĉerpi ĉiujn eblojn de solvo (épuiser toutes les possibilités de trouver une solution).

**SOMMEIL** (DORMO) (V. DORMIR) \* Dormo profunda, peza, eterna. Dormi ŝtonan dormon (d'un sommeil de plomb). Dormi la dormon de justuloj (dormir du sommeil du juste) \* Esti en duondormo (demi-sommeil). Lukti kontraŭ dormo. Cedi al dormo (se laisser aller au sommeil). Droni en dormo (s'enfoncer dans le sommeil). Havi trankvilan dormon (sommeil tranquille). Ŝiri iun el la dormo (arracher au sommeil). Rabi la dormon al iu (lui voler son sommeil). KD 16/1...

**SON** (SONO) \* Kiu aŭdis la unuan, ankaŭ aŭdu la duan (qui n'entend qu'une cloche n'entend qu'un son).

**SONNER** (SONI) \* La horloĝo ĵus sonis/ĵus batis la 4-an (vient de sonner 4 heures). Jam la dek-dua horo batis/ ĵus sonis (midi vient de sonner). La horloĝo soni tri kvaronojn, la noktomezon (a sonné les 3/4 d'h., minuit).

**SORCIÈRE** (SORCISTINO) \* Hoknaza sorĉistino (au nez crochu). Pintmentona inaĉo (une sale bonne femme au menton pointu).

**SORT** (SORTO) \* Maljusteco de la sorto. Pezaj batoj de la sorto (les coups du sort). Defii, spiti



la batojn de la sorto. Rezisti al la batoj de la sorto \* Batali, ribeli kontraŭ la sorto. Submeti sin al sia sorto (se soumettre). Meriti sian sorton. Tiel destinis la sorto (ainsi en a décidé le sort). Dividi, ligi sian sorton kun iu (partager, lier son sort) \* Inda je pli bona sorto (digne d'un sort meilleur). Ĉiu forĝas sian sorton. Pli bonigi la sorton de kamparanoj (améliorer le sort des paysans) \* Aspiri al pli bona sorto. Ŝanĝiĝo de la sorto. Esti antaŭ sortoturno (être à un tournant, changement) Lia sorto decidigis subite (se décida subitement). La sorto ridas al li. Esti kontenta pri sia sorto. Teni en siaj manoj la sorton de iu (disposer du sort d'autrui) \* Antaŭdiri ies sorton (prédire le sort de qq.). Sorto ridos al li (le sort lui sourira). Bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas (a bien de la chance celui à qui sourit le sort) \* La loto falis sur lin/trafis lin (le sort est tombé sur lui). \* Translasi la decidon al la sorto (laisser au sort le soin de décider).

1040. **SORTIE (ELIRO)** \* Trovi vojon de eskapo (trouver une porte de sortie).

**SOT (STULTA)** \* Stulta kiel ŝtupo (bûche), ŝafo, ansero, kukurbo, melono \* Li ne estas el la grandaj saĝuloj.

**SOU (SOLDO)** \* Elspezi sian lastan groŝon (en être à son dernier sou) \* Malriĉa kiel muso preĝeja (sans sou ni maille).

**SOUCI (ZORGO)** \* Pezaj zorgoj premas mian bruston (de lourds soucis m'oppressent). Finon de ĉiuj zorgoj! (plus de soucis!) \* Tio kaŭzis al ŝi zorgojn kaj afliktojn (soucis et peines) \* De zorgoj, ne de jaroj blankiĝas la haroj (ce sont les soucis, et non les ans qui font les cheveux blancs) \* Ne mia zorgo! Tio ne koncernas min! (c'est le dernier de mes soucis) \* Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj - doloron (petits enfants, petits soucis ; grands enfants, grands tourments) \* Nenia kauzo havi zorgojn (aucune raison de se faire du souci) \* Malpli da havo, malpli da zorgoj (comme le savetier et le financier!). \* Rusto "rongas" feron, kaj zorgo la homon (comme la rouille ronge le fer, les soucis rongent l'homme).

**SOUFFLE (SPIRO) (V. RESPIRATION)** \* Esti spir-

manka (être à bout de souffle, avoir le souffle court). Fari ion dum unu spiro (faire qqc. d'un souffle). Kun retenata spiro. Ne havi sufiĉe da spiro por... Mankas al li la spiro por io \* Kuri ĝis perdo de spiro (à perdre haleine) \* Havi nur spireton da vivo (plus qu'un petit souffle de vie) \* Spiri la lastan spiron (rendre son dernier soupir) \* La unuaj blovoj de l'printempo (les premiers souffles du printemps).

**SOUFFRIR (SUFERI)** (V. DOULEUR) \* Neelpor-tebla sufero (douleur insupportable) \* Suferi ventojn (avoir des vents). Suferi trafon de sinusito, de brusta tuso (être atteint de sinusite, d'une toux thoracique). Suferi trafon de nerva singulto (de hoquet). KD 31/1...

**SOUPÇON (SUSPEKTO)** \* Atmosfero peza, plena de atakoj kaj suspektoj \* Veki, naski suspekton (éveiller les soupçons). Via suspekto havas nenian bazon. Esti ekster ia ajn suspekto (être au-dessus de tout soupçon) \* Ĝis la lasta momento mi ne havis eĉ la plej malgrandan suspekton, ke li havas ian kaŝitan intencon.

**SOURCE (FONTO)** \* Aŭtentika fonto. Ĉerpi dokumentojn el la fonto mem (à la source). Aŭtoritata fonto de informoj (source autorisée). Serĉi aliajn fontojn de enspezo (rechercher d'autres sources de revenus).

**SOURCIL (BROVO)** \* Arkigi/kuntiri/kunŝovi/sulkigi la brovojn.

**SOURD (SURDA)** \* Dialogo de surduloj \* Kriegi ĝis raŭkiĝo. Orelojn ili havas sed ne aŭdas (il n'y a pire sourd...).

1050. **SOURIRE (RIDETI)** (V. RIRE) \* Rideti tra siaj larmoj. Trudi al si rideton (s'obliger à sourire).

**SOURIS (MUSO)** \* El sub la kanapo la muso kuris sub la liton (du dessous du canapé elle a couru sous le lit). Monto gravediĝis, muso naskiĝis (la montagne qui accouche d'une souris) \* Kiam kato promenas, la musoj festenas (quand le chat n'est pas là les souris dansent).

**SOUVENIR (MEMORO)** (V. MEMOIRE) \* Atakas lin la memoroj. Svarmas la memoroj (fourmillent). Revivigi/refreŝigi memorojn. Gardi la memoron. Klare memori ion \* Senti kul-ton por ies memoro.

Honori ies memoron. KD 41/1...

**SPECTACLE** (SPEKTAKLO) \* Spektaklo amuza, riĉa, kurioza, alloga, grandioza, korŝira (déchantant).

\* Konduiti spektakle (se donner en spectacle).

**STYLE** (STILO) \* Stilo klara, glata, natura, lapidara, familiara, konciza, lakona, pompa. Stilon poluri/rafini/glatigi \* Doni reliefon al sia stilo \* La pompo de la stilo ne sufiĉas por kaŝi la senenhav-econ de la verko (le vide).

**SUCCÈS** (SUKCESO) (V. RÉUSSIR) \* Brua/laŭta sukceso (retentissant) \* Havi fidon pri la sukceso. Helpi iun al sukceso (conduire qq. au/vers le succès). Rikolti brilan sukceson. Sukceso kronas liajn klopod-ojn (le succès couronne ses efforts).

**SUEUR** (ŜVITO) \* Perlas lia frunto pro ŝvito (des gouttes de sueur perlent sur son front). Lin ekkovras frida ŝvito (il a des sueurs froides). Fari ion ŝvitante sangon (suer sang et eau) \* Akiri vivpanon per ŝvito de la frunto (= perlabori la porvivon kun ŝvito de sia vizaĝo) (gagner son pain à la sueur de son front).

**SUITE** (SEKVO. TUJ) (V. CONSÉQUENCE) \* Havi konsekvencon en la ideoj (de la suite dans les idées) \* Li tuj kredas la plej nekredoblajn aferojn.

\* La urbo troviĝas tuj sur la bordo de la maro.

**SUIVRE** (SEKVI) \* Sekvi iun kiel ties ombro/lia ombro.

**SUJET** (TEMO) \* Fari ion temo de parolo (faire de qqc. un sujet de conservation). Tio estas temo/objekto de diskuto. Penetri ĝis la koro de la temo (aller jusqu'au coeur du sujet). Por ke ni ne forgesu la temon (pour ne pas s'écarter du sujet).

1060. **SURPRISE** (SURPRIZO) \* Trafi el unu surprizo en alian (aller de surprise en surprise). Eksalti de surprizo. Muta de surprizo. Granda surprizo vin atendas. Surprizo najlis lin al la tero (l'a cloué au sol).

**SURNOM** (V. SOBRIQUET).

**SURPRENDRE** (SURPRIZI) \* Li estis surprizita, kiam mi montris al li, ke...

**SUSPENDRE** (PENDI) \* Pendi je la lipoj de iu (être suspendu aux lèvres de qq.) \* Oni pendigis la kanajlon, la kapon malsupren (= kun la kapo) (on a suspendu la canaille la tête en bas).

**SYMPATHIE** (SIMPATIO) \* Alkroĉi al si simpation (attirer la sympathie). Havi por iu grandan simpation. Ili vivis en mirinda simpatio (en parfaite sympathie). Reciproka simpatio.

## T

**TABLE** (TABLO) \* Primeti tablon (mettre la table). Prilevi la tablon (débarrasser). Servi ĉe tablo (servir à table). Manĝi ĉe komuna tablo (à table d'hôte). Leviĝi de ĉe tablo (se lever de table). Inviti iun ĉe sia tablo. Bati la tablon per pugno (donner du poing sur la table).

**TÂCHE** (TASKO) \* Superhoma tasko (tâche surhumaine) \* Mi starigis al mi la taskon fari... (je me suis donné comme tâche de...) \* Preni sur sin malfacilan taskon organizi ion (se charger de).

**TÂCHER** (PENI) \* Mi penos atingi, ke... (je tâcherai de...)

**TACITE** \* Silenta konsento (accord tacite).

**TAIRE** (SILENTI) (V. SILENCE) \* Gardu vian langon! \* Sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti (c'est bien de savoir parler, mais aussi de se taire).

1070. **TALENT** (TALENTO) \* Disvolvi sian tutan talenton (exercer son talent).

**TALON** (KALKANO) \* Turni sin sur la kalkanoj (tourner les talons).

**TANT** (QUE) \* Mi ne trankviliĝos tiel longe, ĝis la demando estos solvita (je ne serai pas tranquille tant que la question ne sera pas résolue)

\* Mi ne kredis al la diroj, ĝis mi venis (je n'ai rien cru de ce qu'on disait jusqu'à ce que j'arrive).

**TAPAGE** (BRUEGO) \* Kiu bruas tiel terure en tiu ĉi noktomeza horo? (qui fait tout ce tapage à cette heure tardive de minuit?).

**TAPER** (QQ.) (V. QUÉMANDER)

**TARD** (MALFRUE) \* Pli bone malfrue ol neniam (mieux vaut tard...)

**TATONS** (A) \* Palpi en mallumo.

**TAUREAU** (VIRBOVO) \* Preni la bovon per la kornoj.

**TAXI** (TAKSIO) \* Signi per la mano al taksio (héler).

**TÉMOIN** (ATESTANTO) \* Vid-aŭda atestanto

(témoin qui a vu et entendu) \* Mensoga/malvera/  
falsa atestanto \* Fari/meti ateston \* Alvoki  
iun, kiel atestanton \* Ne diru kontraŭ proksimulo  
malveran ateston (pas de faux témoignage envers  
votre prochain).

1080. **TEMPÊTE** (TEMPESTO) \* Granda frakaso en  
akvoglaso (une tempête dans un verre d'eau)  
\* Kiu semas venton, rikoltas fulmotondron (qui  
sème le vent récolte la tempête).

**TEMPS** (TEMPO) \* Ne havi tempon por perdi  
(ne pas avoir de temps à perdre). Perdi tempon  
por bagatelaĵoj. Ne indas perdi tempon por tio  
(cela ne vaut pas la peine de perdre son temps  
à cela) \* Steli de iu ties karan tempon (= forrabi  
de iu valoran tempon) (faire perdre à qq. un  
temps précieux). Domaĝi sian tempon (plaindre  
son temps). Tempo estas mono. Tire pasigi la  
tempon (tuer le temps). Trovi la horojn longaj.  
\* La fluado de la tempo (la fuite du temps).  
La radon de tempo oni ne povas haltigi (on ne  
peut arrêter le cours du temps). Tempo pasinta  
neniam revenos. Mi esperas, ke le tempo ĉion  
bonigos/aranĝos \* Tio postulos ankoraŭ multe  
da tempo (= bezonos ankoraŭ multe da tempo)  
(il faudra encore du temps pour...) \* Ekde tempo  
nememorebla (depuis un temps immémorial).  
La aŭroro de novaj tempoĵoj. Anticipi sian tempon  
(être en avance sur son temps). En la bona malnova  
tempo (au bon vieux temps) \* Por ĉiu faro estas  
horo (il y a temps pour tout). Estas tempo por  
plori kaj tempo por ridi \* Konsolon tempo donas  
al la koro \* Aliaj tempoĵoj, aliaj moroj (autres  
temps, autres moeurs) KD 60/1... (120 expressions).  
**TEMPS** (VETERO) \* Prema/peza, sufoka, kaprica  
vetero. La severo, rigoro de la vetero \* Ŝanĝiĝas  
la vetero (le temps change) \* Atendi bonan veteron.  
Promeni en ĉia vetero (par tous les temps) \*  
\* Post vetero malbela, lumas suno plej bela (après  
la pluie, le beau temps) \* Estis tia vetero, ke  
eĉ hundon oni ne elpelus (il faisait un tel temps  
qu'on n'aurait pas mis un chien dehors) (= un  
temps à ne pas mettre un chien dehors) KD 60/1  
(150 expressions).

**TENIR** (TENI) \* Doni al iu teni ion (donner qqc.

à tenir à qq.) \* La knabo provis paŝteni kun mi (l'enfant essayait de me tenir pied) \* Pasero kaptita estas pli bone ol aglo kaptota (un "tiens" vaut mieux que deux "tu l'auras" = mieux vaut tenir que courir = ne pas lâcher la proie pour l'ombre).

**TENTATION** (TENTO) \* Delogi iun. Lasi sin delogi (tenter). Ne cedi al la tento. Stari forte kontraŭ ĉiuj forloj (résister à la tentation). Ne enkonduki min en tenton (ne me laissez pas succomber à la tentation).

**TERRAIN** (GRUNDO) \* Favors grundo/kondiĉo por io (terrain favorable) \* Esti sur glita grundo. Resti sur firma grundo.

**TERRE** (TERO) \* Nia tero rotacias, ĝi rivoluas ĉirkaŭ la suno. Kredi je la sfereco de la tero. \* Stari firme sur la plandoj (avoir les pieds sur terre) \* Ĵeti sin vizaĝaltere(n) (face contre terre).

**TERREUR** (TERURO) \* Li estas la teruro de iu. Preskaŭ ŝtoniĝi de teruro (être pétrifié).

**TÊTE** (KAPO) \* Bone notu tion en la kapon (mettez vous bien ça dans la tête) \* Ĉu mi puŝu/batu la kapon al la muro? (est-ce que j'avais me cogner la tête contre le mur?) \* Perdi la kapon/la saĝon (perdre la tête, la raison) \* Skui senkrede la kapon (secouer la tête avec incrédulité) \* Turni la kapon de iu (tourner la tête de qq.) \* Rompi al si la kapon pri ruzaĵo (se casser la tête pour trouver une ruse) \* Li volas agi laŭ sia kapo (n'en faire qu'à sa tête) \* Honesta de la kapo ĝis piedoj (= de verto ĝis plandoj) (de la tête aux pieds = du vertex à la plante des pieds).

\* Havi la kapon fortike sur la kolo (avoir la tête sur les épaules) \* Stari surverte/surmane (faire le poirier) \* Ne valoras cerbumi pri tiu bagatelo (se casser la tête pour rien) \* Esti superŝutita (en avoir par-dessus la tête) \* Ĉiu sin direktas, kiel la kapo al li diktas (chacun n'en fait qu'à sa tête) \* Juĝiĝas kazo laŭ plaĉo de nazo (à la tête du client). (V. Avis. Se payer de. Jambe (quand on n'a pas de tête). Laver la tête. Mettre la tête à prix). KD 30/1

**TÊTU** (OBSTINA) \* Obstina kiel azeno, mulo, kapro \* Fleksi, rompi ies obstinon (faire plier qq.).

1090. **THÉORIE** (TEORIO) \* Senbaza teorio. Teorioj, kiuj enhavas eĉ ne la plej malgrandan eron da probable (qui n'ont pas la moindre chance d'application) \* Apliki teorion en la praktiko (mettre une théorie en application).

**THERMOMÈTRE** (TERMOMETRO) \* Kia estas la lego sur la termometro? (combien marque le thermomètre).

**TIMBRE** \* Muŝo zumas al li en la kapo (avoir le timbre un peu fêlé/ une araignée au plafond).

**TIRER** (TIRI) \* Tiri sin el afero sendifekte (= sana kaj savita = eskapi kun sendifekta/sengrata haŭto) (s'en tirer sain et sauf/ à bon compte). Li trovas ĉiam eblon por elturniĝi (trouve toujours moyen de s'en tirer) \* Movi iun kiel marioneton (tirer les ficelles) \* Eltiri por aliaj la maronojn el la fajro (tirer les marrons du feu) \* Eltiri la tapiŝon el sub iu (tirer la couverture à soi) \* Kiu sin enjungiĝas devas tiri (quand le vin est tiré il faut le boire).

**TOISER** \* Rigardmezuri iun de la piedoj ĝis la verto.

**TOIT** (TEGMENTO) \* Proklami sur la tegmentoj (= diskrii tion sur la stratoj = distrumpeti) (le crier sur les toits).

**TOLÉRER** (TOLĒRI) \* Tio estas ja ne rajto sed tolero (ce n'est certes pas un droit mais une tolérance) \* Lerni sin toleri reciproke (apprendre à se tolérer).

**TOMBÉ** (TOMBO) \* De lulilo ĝis ĉerko (du berceau à la tombe) \* Stari per unu piedo en la tombo (avoir un pied dans la tombe) \* Li fosas al si mem tombon (il creuse sa propre tombe) \* Li turnadas sin en sia tombo (se retourne dans sa tombe).

**TOMBER** (FALI) \* Fali laŭ sia tuta long(ec)o. Fali plandalsube kiel kato (retomber sur ses pieds). Fali dorsen (à la renverse). Fali kapantaŭe en la foson (la tête la première dans la fosse). Atentu, ke vi ne falu (attention à ne pas tomber). Riski fali \* Pasko ĉi-jare falas en marton \* Fali el sub pluvo en riveron (= salti el potu en fajron = fali de sitelo en barelon) (tomber de Charibde en Scylla) \* Kiel bonokaze! (ça tombe bien!/vous tombez bien!).

**TORT (MALPRAVO)** \* La forestanto estas ĉiam malprava (les absents ont toujours tort).

...

\* Paroli tekse-mikse/ aĉe-klaĉe (à tort et à travers)

\* Anstataŭ blinde ŝetadi frazojn, iru kaj rigardu (au lieu de parler sans savoir, à tort, allez et regardez).

1100. **TÔT (FRUE)** \* Pli frue ol bezone (plus tôt que prévu). Ju pli frue, des pli certe (le plus tôt sera le mieux).

**TOUCHER (TUŜI)** \* Per kio la afero lin tuŝas? (en quoi est-il touché par cette affaire?). La afero ne tuŝas min, mi staras ekstere (l'affaire ne me touche en rien, je suis en dehors) \* Li ne indas esti tuŝata eĉ per mia kota ŝuo (pas digne...).

**TOUR (VICO)** \* Nun estas lia vico paroli \* Per turno de mano (en un tour de main).

**TOURNER (TURNI)** \* Antaŭ la lango laboru la cerbo (il faut tourner sa langue sept fois...)

**TOUT (ĈIO)** \* Aŭ ĉio, aŭ nenio (tout ou rien). \* Fino bona, ĉio bona (tout est bien qui finit bien).

**TRACE (SPURO)** \* Esti sur la spuroj de iu (= iri laŭ la spuroj de iu) (sur les traces). Postlasi spurojn/signojn. Malaperi senspuro/ne lasante spurojn.

**TRAIN (TRAJNO)** \* Ŝanĝi la trajnon (changer de train) \* Tiu trajno kursadas nur sabate (ne circule que le samedi) KD 67/17

**TRAIT** \* Fari ion dum unu spiro (d'un trait).

**TRAITER (TRAKTI)** \* Trakti iun de alte/malestime.

**TRANQUILLE (TRANKVILA)** \* Lasu min trankvila/en paco. Sopiri je trankvilo. Gardi sian trankvilon. Retrovi la trankvilon \* Plena anima trankvilo (complète tranquillité d'esprit).

1120. **TRAQUER (ĈIRKAŬPELI)** \* Esti kiel ĉasata besto (comme une bête traquée).

**TRAVAIL (LABORO)** \* Laboro : laciga, vana, intensa, herkula, sizifa. Laboro : urĝas, premas, nobligas \* Ek al la laboro! (au travail!). Sin ŝeti febre al la laboro. Esti superŝutita de/per laboro (être débordé). Droni, sidi en la laboroj ĝis super la oreloj (avoir du travail par dessus les oreilles). \* Labori por propra profito (à son compte) \*



\* Labori por pago plej bagatela (travailler pratiquement pour rien) \* Li ne kuras post la laboro. Elekti la plej facilan parton/flankon de la laboro.

\* Laboro estas balzamo kontraŭ ĉagreno \* Laboro finita - ripozo merita. KD 32/1...15 (120 expressions) **TRAVERS** \* Gluti misvojen (avalier de travers)

\* Paroli tekse-mikse (à tort et à travers)

**TRAVERSER** (TRAIRI) \* Trairi landon laŭ longo kaj larĝo.

**TREMBLER** (TREM) \* Tremi de timo/kiel aŭtuna folio/ ĉiufibre/ per la tuta korpo/ per ĉiuj membroj.

**TREMPER** \* Malsekiĝi ĝis la haŭto/ la ostoj (trempe jusqu'aux os) \* Via maniko trempigas en la saŭco (votre manche trempe dans la sauce).

**TREMLIN** \* Uzi ion kiel saltotabulon (se servir de qq. comme tremplin).

**TRISTE** (MALGAJA) \* Morte malgaja (mortellement triste) \* Malĝojo/ĉagreno sidas sur lia vizaĝo (la tristesse se lit sur son visage) \* Droni/konsumiĝi en tristo \* Pistu triston, ŝutu ĝin en venton (pulvérissez la tristesse, jetez-la aux quatre vents).

**TROMPER** (TROMPI) \* Ŝajno trompas (les apparences sont trompeuses) \* Trompi/misuzi ies konfidon (tromper la confiance de qq.). Ili akordiĝas por vin trompi (comme larrons en foire) \* Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras (celui qui ne fait rien ne se trompe pas) \* Pli bone ne fari ol erari (il vaut mieux ne rien faire que se tromper).

**TROP** (TRO) \* Kio estas tro, tio estas tro (trop c'est trop).

**TRUC** (TRUKO) \* Scii la trukon/artifikon de io (connaître le truc).

1130. **TUYAU** (TUBO) \* Paroli dolĉe en la orelo (dans le tuyau de l'oreille).

## U

**UN** (UNU) (V. AUTRE) \* Edzo kaj edzino estas nur unu (ne font qu'un) \* Komprenante unu la alian... Ni staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, sed kiel fratoj.

**UNION** (UNUECO) \* Unueco donas forton (l'union fait la force).

**USAGE** (UZADO) \* Ĝi jam eltenis la elprovadon de l' uzado (a résisté à l'épreuve de l'usage).

**UTILA (UTILE) \*** Per kio mi povas vin servi? (en quoi puis-je vous être utile?). Oferi la agrablan pro la utila (sacrifier) \* Ligi utilon kun agrablo (joindre l'utile à l'agréable).

**UTOPIE (UTOPIO) \*** Hodiaŭ fiktivo, morgaŭ efektivito (utopie d'aujourd'hui, réalité de demain).

## V

**VACARME (V. TAPAGE)**

**VACHE (BOVINO) \*** Senfine melkebla bovino (une vache à lait) \* Manĝi la sekan panon de migrulo (manger de la vache enragée).

**VALABLE (VALIDA) \*** Pri la partícipo epíteto de la subjekto validas tio sama, kio pri la partícipo de la verbo (ce qui est valable pour... l'est aussi pour...) \* La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj (est le même que dans les autres langues).

**VALIDITÉ (VALIDECO) \*** La limtempo de valideco de tiu bileto estas du monatoj.

1140. **VALOIR (VALORI) \*** Pli bona io ol nenio (cela vaut mieux que rien).

**VANITÉ (VANTAĴO) \*** Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.

**VEINE \*** Esti favorato/ dorlotato de Fortuno (avoir de la veine).

**VENDRE (VENDĪ) \*** Vendi pogrande, popece (en gros, au détail). Vendi ion por iom da neniom ( vendre qqc. pour moins que rien). Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon (ne pas vendre la peau de l'ours avant de l'avoir tué).

**VENGEANCE (VENĜO) \*** Venĝi amikon. Venos la tago de repago. Ĵuri venĝon kontraŭ iu. Satigi sian venĝemon (satisfaire son esprit de vengeance). Soifi venĝon (avoir soif de vengeance).

**VENT (VENTO) \*** Li scias de kie blovas la vento (sait d'où vient le vent) \* Disblovi ĉion al ĉiuj ventoj (jeter tout aux quatre vents) \* Kio vin venigis ĉi tien? (quel bon vent vous amène?) \* Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron (qui sème le vent, récolte la tempête) \* Li la nazon ŝovas, kien vento blovas (il flaire d'où vient le vent).

**VENTRE (VENTRO) \*** Teni al si la ventron pro

ridego \* Ventre malsata orelon ne havas (ventre affamé...).

**VÉRITÉ** (VERO) \* Diri la puran veron (c'est la pure vérité) \* Mi diras al vi nenion alian krom plej pura vero \* Diri/konfesi la veron malkaŝe/senŝminke (sans fard). Diri al iu kelke da "dura" vero (dire à qq. ses quatre vérités) \* En vino estas vero (in vino veritas) \* Se diri la veron/se diri sincere... (en toute sincérité) \* Aplombe, senhonte aserti malveraĵon (sans vergogne faire une entorse à la vérité).

**VERRE** (GLASO) \* Levi sian glason je/al la sano/honoro de... \* La glasoj intertintas. Eltrinki ĝis-funde la glason (vider son verre) \* Kiu rompis, tiu pagu (qui casse les verres...).

**VERTU** (VIRTO) \* Ludi la virtulon (se faire passer pour vertueux). Doni virtan ekzemplon (donner le bon exemple). Agi sub masko de virto \* Ŝi ne estas virtmodelo (ce n'est pas un modèle de vertu).

1150. **VIE** (VIVO) \* Ĝui gajan vivon (mener belle vie) \* Vivi duoblan vivon \* Veneni ies vivon (empoisonner la vie de qq.) \* Tia estas la vivo (ainsi va la vie) \* Ŝvebi inter vivo kaj morto (être entre la vie et la mort). KD 66/1 (50 expressions).

**VIEILLESSE** (MALJUNECO) \* En la daŭro de kelkaj semajnoj li maljuniĝis je pluraj jaroj.

**VIF** \* Aspekti pli morta ol vivanta (être plus mort que vif) \* Eksplodema kiel pulvo (vif comme la poudre).

**VIN** (VINO) \* Vino : juna, dolĉa, seka, fajna (fin). \* Por vino bona ŝildo ne bezona (à bon vin point d'enseigne) \* Kiu sin enjungis devas tiri (quand le vin est tiré...).

**VISAGE** (VIZAĜO) \* Vizaĝo osta, zorgoplana (soucieux), senesprima (inexpressif), nepenetrebla (impenétrable). KD 30/8

**VITESSE** (RAPIDECO) \* Kun fulma rapideco (à la vitesse de l'éclair) \* Per helika irado (un train de sénateur) \* Persekunda, perhora rapideco (la vitesse à la seconde, à l'heure). Veturi po 100 km hore (ne : po horo!).

**VIVRE** (VIVI) \* Vivi sate kaj glate (à l'aise) ; larĝe kaj lukse (dans l'abondance). Naĝi en riĉo/

abundo \* Havi per kio ŝmiri sian panon (avoir de quoi mettre sur son pain) \* Vivi iele-trapele (au petit bonheur) \* Vivi nur por la tago kuranta (au jour le jour) / de tago al tago.

**VOCATION** \* Ne senti alvokiĝon por io.

**VOEU** (BONDEZIRO) \* Mi reciprokas viajn bondezir-ojn (je vous adresse mes vœux en retour).

**VOILE** (VUALO) \* Ne kovru la pasintaĵon/paseon per vualo (jeter un voile sur le passé). Demeti la vualon de sur io (lever le voile).

1160. **VOIX** (VOĈO) \* Levi la voĉon en ies intereso (en faveur de qq.) \* Ilia voĉo restos longe voĉo krianta en la dezerto.

**VOLONTÉ** (VOLO) (V. VOULOIR) \* Volo : energia, forta, malforta, firma, nefleksebla, formala. \* Malgraŭ mia plej bona volo, mi... / eĉ ĉe la plej bona volo, mi... (avec la meilleure volonté du monde). Lia volo rompiĝis sur la cirkonstancoj (les circonstances ont eu raison de sa volonté). Febra volo ardas en liaj vejnoj (une volonté fébrile bout dans ses veines). Altrudi al iu sian volon (imposer). Li skribis tion vole sen trudiĝo (de sa propre volonté sans intervention extérieure). Ĉar tia estas mia volo (car telle est ma volonté). Agi kontraŭ sia volo. La dia volo plenumiĝu (que la volonté de Dieu soit faite). Kontraŭ volo de Dio nenio helpas (on ne peut s'opposer aux desseins de Dieu).

**VOLUPTÉ** (VOLUPTO) \* Venu, ni ĝuu volupton ĝis la mateno.

**VOLUTE** (SPIRALO) \* Fumo spiralas el la cigaredo.

**VOMIR** (VOMI) \* Li vomis sian tutan tagmanĝon.

**VOULOIR** (VOLI) (V. VOLONTÉ) \* Kiu volas, tiu povas. Volu-ne-volu / vole-nevole (que vous le vouliez ou non = bon gré mal gré) \* Ju pli oni posedas, des pli oni avidas (plus on en a plus on en veut) \* Havi venĝemon kontraŭ iu (en vouloir à qq.).

**VRAI** (VERA) (V. VÉRITÉ) \* Se diri la veron (à dire vrai). Tio estas tro bela por esti vera. \* Se vi nur pruviĝus bona profeto/aŭguristo (si seulement vous pouviez dire vrai).

**VUE** (VIDO) \* Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj

\* Je la unua rigardo (à première vue). Okuloj ne povas satiĝi je la vidado de... (les yeux ne peuvent se rassasier de la vue de ...). Havi panoraman vidon de la regiono ĝis vidlinio / ĝis kie la rigardo povas atingi. Neesprime bela ili trovis la vidaĵon \* Fenestroj, kiuj donas vidon sur la straton (qui donnent sur la rue) \* Perdi la vidadon. Havi akran, konfuzan vidadon \* Blindigi iun per vortoj (en mettre plein la vue à qq.) \* Pagi ĉekon, ekludi arion, traduki la grekan ĉe vido (à vue).  
KD 46

**ZÉRO (NULO)** \* Li estas nul oble nul / senvalora nulo (un zéro en chiffre, un double zéro).

En la sama serio  
ĉe  
Cercle amical esperantiste de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut

### KIEL DIRI...? (Kompilinto : Lentaigne)

**Praktika Esperanta Frazologio.** Ofsetita. 148 paĝoj.

Enhavas ĉ. **5000 esprimojn** pri **67 temoj** (Amo, Amoro, Armeo, Edz(in)o, Familio, Gazeto, Karaktero, Muziko... Sporto, Vetero, Vojaĝi).

**Ekz:** La vorton **KARAKTERO** akompanas **44** epitetoj. **KONGRESO** enhavas ĉ. **140** esprimojn. Bazita sur la principo : **ASOCIADO DE LA IDEOJ.**

### **KION ILI OPINIAS :**

"**Mi alte taksas ĝin kaj ofte rekomendas**" (Marjorie Boulton)/ "**Tre bona kaj utila**" (Waringhien)/ "**Vere tre utila kaj riĉenhava verko**" (Marĉek, Ĉekoslovakio)/ "**KIEL DIRI vekis kaj vekas ĉe ĉinaj esp-istoj grandan intereson**" (Ĉinaj E-istoj)/ "**Bonega iniciato**" (Symoens, Belgio)/ "**Tre instrua kaj nepre bezona**" (Gjivoje, Jugoslavio)/ "**Mi trovis vian libron vera trezoro**" (Thom, Britio)/ "**Libro vere valoro kaj praktika**" (Radio Pekino)/ "**Mi forte rekomendas la libron**" (en la japana LA MOVADO), ktp, ktp.

### ABRÉGÉ PRATIQUE de la GRAMMAIRE ESPERANTO (Lentaigne)

Mimeografita. 40 paĝoj.

"Il ne s'agit absolument pas d'une Grammaire. Cet ABRÉGÉ répond **par avance** à la plupart des erreurs commises par les Français, débutants ou non. C'est donc essentiellement un "catalogue de remarques". Nous espérons néanmoins qu'il rendra quelques services aux utilisateurs. Il les aidera aussi à aborder certains ouvrages plus complets."

Uzenda kune kun "**TIEL DIRU!**".

### LINGVAJ ANGULOJ (F. Baronnet)

Mimeografita. 80 paĝoj. En Esperanto.

Gramatika superrigardo. La plej oftaj malfacilaĵoj.

Konsiloj pri la stilo. Kiel perfektigi sin...

(Kolekto el artikoloj aperintaj en "Esperanto-Lernejo" kaj "SAT-Amikaro").

...kaj centoj da valoraj tekstoj pri plej diversaj temoj.

\*\*\*

Cercle espérantiste de l'Agenais  
"Laûte!" \* F 47340 Laroque Timbaut  
Imprimeur : Baudé, 47340 Laroque Timbaut